

EL Popola ĈINIO



Varma huraado pro la fondiĝo de la Pekina Revolucia Komitato.

K O R E K T O

paĝo	*kolono*	*linio*	*eraro*	*korekto*
5	dekstra	11-13 (malsupre)	...en la laŭ-dego...filmo.	de tio, ke ili laŭdis la reakcian, ĝisfunde naci-perfidisman filmon kiel "patriotisman".

Cirkulero

de la Centra Komitato
de la Komunista Partio de Ĉinio

(La 16-a de majo, 1966)

Al ĉiuj regionaj burooj de la Centra Komitato, ĉiuj provincaj, urbaj kaj aŭtonom-regionaj partikomitatoj, ĉiuj departementoj kaj komisionoj de la Centra Komitato, ĉiuj grupoj de gvidantaj partianoj kaj partikomitatoj en la registaraj institucioj kaj la popolaj organizoj, la Ĝenerala Politika Departemento de la Popola Liberiga Armeo:

La Centra Komitato decidis aboli la "Raportan Skizon de la Kvinpersona Grupo de la Kultura Revolucio pri la Kuranta Akademia Diskuto" sankciitan kaj distribuitan je la 12-a de februaro de 1966, **malorganizi la "Kvinpersonan Grupon de la Kultura Revolucio" kaj ĝiajn oficejojn kaj refondi Grupon de la Kultura Revolucio sub la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio.** La raporta skizo de la tiel nomata "Kvinpersona Grupo" estas radikale erara, kontraŭa al la linio de la socialisma kultura revolucio elmetita de la Centra Komitato kaj kamarado Maŭ Zedong kaj kontraŭa al la gvida orientilo pri la problemoj de klasoj kaj klasbatalo en la socialisma socio, certigita de la 10-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio en 1962. Tiu ĉi skizo, en maniero de ŝajna obeo kaj vera malobservo, plenforte kontraŭstaras la grandan kulturan revolucion persone iniciatitan kaj gvidatan de kamarado Maŭ Zedong kaj la direktivon pri la kritikado kontraŭ Vu Han elmetitan de kamarado Maŭ Zedong en la Labora Konferenco de la Centra Komitato en septembro kaj oktobro de 1965 (t. e., en la kunveno de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato kiun ĉeestis respondecaj kamaradoj de ĉiuj regionaj burooj de la Centra Komitato).

La Raporta Skizo de la tiel nomata "Kvinpersona Grupo" fakte estas nur raporta skizo de Peng Ĝen sola, elfabrikita de Peng Ĝen laŭ lia propra opinio post la dorsoj de kamarado Kang Ŝeng, membro de la "Kvinpersona Grupo" kaj ceteraj kamaradoj. Ellaborante tian dokumenton pri grava problemo koncernanta la socialisman revolucion en la tuto, Peng Ĝen tute ne prezentis ĝin al la "Kvinpersona Grupo" por diskuti kaj konsultiĝi, neniam petis opiniojn de iu ajn loka partia komitato, neniam diris ke ĝi estas prezentota al la Centra Komitato por kontroli kiel oficiala dokumento de la Centra Komitato, kaj des pli ne ricevis aprobon de kamarado Maŭ Zedong, la Prezidanto de la Centra Komitato, sed li haste dissendis ĝin al la tuta Partio per ekstreme malhonestaj rimedoj, en arbitra ago, superuzante sian povon kaj uzurpante la nomon de la Centra Komitato.

La ĉefaj eraroj en tiu ĉi skizo estas la jenaj:

(1) Starante sur la burĝa pozicio kaj rigardante la situacion kaj karakteron de la

kuranta akademia kritikado per la burĝa mondkoncepto, tiu ĉi skizo tute inversigas la rilaton inter la malamikoj kaj ni mem. Nia lando alvizaĝas la altan tajdon de la granda proleta kultura revolucio. Tiu ĉi alta tajdo forte sturmas kaj atakas ĉiujn putriĝintajn ideologiajn kaj kulturajn poziciojn ankoraŭ konservatajn de la burĝaro kaj la feŭda postrestaĵo. Anstataŭ kuraĝigi la tutan Partion por senrezerve mobilizi la vastajn amasojn de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj proletajn kulturajn batalantojn daŭre sturmi antaŭen, tiu ĉi skizo plenenergie klopodas turni tiun ĉi movadon dekstren. Tiu ĉi skizo, per ĥaosaj, interkontraŭdiraj kaj hipokritaj vortoj, nebuligas la aktualan akran klasbatalon sur la kultura kaj ideologia fronto, precipe la celon de tiu ĉi granda batalo, kiu estas ĝuste kritikado kontraŭ Vu Han kaj **arego da ceteraj kontraŭpartiaj, kontraŭsocialismaj burĝaj reprezentantaj personoj (troviĝas po nombro da tiaj burĝaj reprezentantaj personoj en la Centra Komitato, en la diversaj institucioj de CK kaj la Centra Popola Registaro, kaj ĉe la provinca, urba kaj aŭtonomregiona nivelo).** Tiu ĉi skizo tute ne mencias, ke la esenco de la dramo *Deoficigo de Haj Ĵuj* verkita de Vu Han, kiel foje kaj refoje montrite de Prezidanto Maŭ, estas problemo de deoficigo, kaj kovras la seriozan politikan naturon de tiu ĉi batalo.

(2) Tiu ĉi skizo malobservas la bazan tezon de marksismo, ke ĉiuj klasbataloj estas politikaj bataloj. Kiam la gazetaro nur ektuŝis la politikajn problemojn en *Deoficigo de Haj Ĵuj* verkita de Vu Han, la aŭtoroj de la skizo eĉ tiel diris, ke "la diskuto en la gazetaro ne devas esti limigita al politika problemo, sed devas iri plene en la problemojn pri diversaj akademiaj teorioj". Rilate al la kritiko kontraŭ Vu Han, ili deklaris en diversaj okazoj, ke estas nepermeseble tuŝi la kernon de la problemo, nome, la deoficigon de la dekstraj oportunistoj ĉe la Luŝan-kunveno en 1959 kaj la kontraŭpartiajn kaj kontraŭsocialismajn problemojn de Vu Han kaj aliaj. Kamarado Maŭ Zedong ofte diras al ni, ke la batalo en ideologio kontraŭ la burĝaro estas longdaŭra klasbatalo, kiu ne povas esti solvita per hasta faro de politika konkludo. Tamen, Peng Ĝen intence fabrikis onidirojn, dirante al multaj homoj, ke Prezidanto Maŭ opinias, ke la politika konkludo pri la kritiko kontraŭ Vu Han povas esti farota post du monatoj. Peng Ĝen ankaŭ diris, ke oni povos paroli pri la politikaj problemoj post du monatoj. Lia celo estas konduki la politikan batalon en la kultura sfero en la tiel nomatan "pure akademian" diskuton, konstante predikatan de la burĝaro. Tre evidente, tio signifas oponi la elstarigon de proleta politiko sed elstarigi burĝan politikon.

(3) La skizo speciale emfazas la tiel nomatan "disvolvon". Sed, ludante ruzan artifikon, ĝi deradike distordas la orientilon de "disvolvo" eksplikitan de kamarado Maŭ Zedong ĉe la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri la Propaganda Laboro en marto de 1957 kaj forstrekis la klasan enhavon de "disvolvo". Ĝuste parolante pri tiu ĉi problemo, kamarado Maŭ Zedong montris: **"Ni ankoraŭ devas fari longdaŭran bataladon kontraŭ la burĝa kaj etburĝa ideologio. Estas erare ne kompreni tion kaj forlasi la ideologian lukton. Ni devas kritiki ĉiajn ideojn erarajn, ĉiajn herbojn venenajn kaj ĉiajn demonojn kaj diablojn, kaj neniel permesi ilin inundi senbride."** Kamarado Maŭ Zedong diris ankaŭ, ke **"disvolvo" signifas senrezerve permesi ĉiujn esprimi siajn opiniojn libere, por ke oni kuraĝu paroli, kuraĝu kritiki kaj kuraĝu debati."** Tamen, tiu ĉi skizo metas "disvolvon" kontraŭ la malkaŝado de la burĝa reakcia starpunkto fare de la proletaro. Ĝia tiel nomata "disvolvo" estas burĝa liberaligo, kiu nur permesas la burĝaron "disvolvi", sed ne permesas la proletaron "disvolvi" kaj rebati la burĝaron, kaj estas protekto al tiaj reakciaj reprezentantaj personoj de la burĝaro kia Vu Han. La tiel nomata "disvolvo" en tiu ĉi skizo estas kontraŭ la penso de Maŭ Zedong kaj adaptiĝas al la bezono de la burĝaro.

(4) Kiam ni komencis rebaton kontraŭ la frenezaj atakoj de la burĝaro, la aŭtoroj de la skizo tamen elmetis la sloganon "antaŭ la vero ĉiuj estas egalaj". Tiu ĉi estas burĝa slogano. Ili uzas tiun sloganon por protekti la burĝaron kaj oponi la proletaron, oponi marksism-leninismon kaj oponi la penson de Maŭ Zedong, deradike neante la klasan naturon de la vero. En la batalo inter la proletaro kaj

la burĝaro, inter la vero de marksismo kaj la absurdaj teorioj de la burĝaro kaj de ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj, aŭ la orienta vento superas la okcidentan venton, aŭ la okcidenta vento superas la orientan venton, oni absolute ne povas paroli pri ia ajn egaleco. **Ĉu povas esti permesata ia ajn egaleco en tiuj bazaj problemoj kiaj la batalo de la proletaro kontraŭ la burĝaro, la diktaturo de la proletaro super la burĝaro, la diktaturo de la proletaro en la superstrukturo, inkluzive de la diversaj kampoj de kulturo, kaj la kontinuaj penoj de la proletaro por forigi tiujn burĝajn reprezentantajn personojn, kiuj enŝteliĝis en la komunistan partion kaj oponas la ruĝan flagon flirtigante "ruĝan flagon", kaj tiel plu? La malnovaj socialdemokratiaj partioj de kelkdek jaroj kaj la moderna reviziismo de dekkelkaj jaroj neniam permesas al la proletaro havi ian ajn egalecon kun la burĝaro. Ili deradike neas ke la homara historio de kelkmil jaroj estas tiu de klasa batalo. Ili deradike neas la klasan batalon de la proletaro kontraŭ la burĝaro, la revolucion de la proletaro kontraŭ la burĝaro kaj la diktaturon de la proletaro super la burĝaro. Male, ili estas fidelaj lakeoj de la burĝaro kaj imperiismo. Kune kun la burĝaro kaj imperiismo, ili persistas ĉe la burĝa ideologia sistemo de subpremo kaj ekspluato al la proletaro kaj ĉe la kapitalisma socisistemo, kaj oponas la marksismleninisman ideologian sistemon kaj la socialisman socisistemon. Ili estas aro da kontraŭrevoluciuloj kontraŭ la komunista partio kaj la popolo. Ilia batalo kontraŭ ni estas vivmorta batalo, kaj ĉi tie oni povas neniel paroli pri ia ajn egaleco. Tial, ankaŭ nia batalo kontraŭ ili povas esti nenio alia ol vivmorta batalo, kaj nia rilato kun ili povas neniel esti rilato de egaleco. Male, ĝi estas rilato de subpremo de unu klaso super la alia, tio estas, la aŭtokratio aŭ diktaturo de la proletaro super la burĝaro, kaj neniel povas esti ia alia rilato, kia tiel nomata rilato de egaleco, de paca kunekzisto inter ekspluatanta kaj ekspluatata klasoj, aŭ de humaneco, justeco kaj moralo, k. a.**

(5) La skizo diras: "Estas necese ne nur premfaligi la rivalon politike, sed ankaŭ vere kaj ege superi kaj premfaligi ĝin en akademiaj kaj profesiaj normoj." Ankaŭ tiu ideo, kiu ne faras klasan distingon en akademiaj aferoj, estas tre erara. La vero en akademiaj problemoj, kiun la proletaro posedas, la vero de marksism-leninismo kaj la vero de la penso de Maŭ Zedong jam antaŭlonge kaj ege superis kaj premfaligis la burĝaron. La formulado en la skizo montras ke ĝiaj aŭtoroj laŭdas kaj altigas la tiel nomatajn "akademiajn aŭtoritatulojn" de la burĝaro, kaj ke ili malamas kaj subpremas aron da niaj novaj batalaj fortoj reprezentantaj la proletaron en akademiaj rondoj.

(6). **Prezidanto Maŭ ofte diras, ke sen detruo ne estas konstruo. Detruo signifas kritikon, signifas revolucion. Detruo postulas rezonadon kaj la rezonado signifas konstruon. Detruo venas la unua kaj en ĝi troviĝas konstruo.** Marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong estas fonditaj kaj senĉese disvolvataj en la batalado por detrui la burĝan ideologian sistemon. Tamen ĉi tiu skizo emfazas, ke "sen konstruo ne povas esti vera kaj ĝisfunda detruo". Fakte tio estas malpermesi detrui la burĝan ideologion kaj malpermesi konstrui la proletan ideologion. Tio estas pint-kontraŭpinta opono kontraŭ la penso de Prezidanto Maŭ. Tio estas kuri en la kontraŭa direkto de la revolucia batalo, kiun ni kondukas sur la kultura batalfronto por detruegi la burĝan ideologion. Kaj tio estas malpermesi la proletaron revolucii.

(7) La skizo diras, ke ni "ne devas, kiel akademiaj tiranoj, agi arbitre kaj subigi aliajn per potenco" kaj ke ni "devas esti singardemaj kontraŭ tio, ke la maldekstraj akademiaj laborantoj iras sur la vojon de burĝaj specialistoj kaj akademiaj tiranoj". Kio estas, efektive, "akademia tirano"? Kaj kiuj estas "akademiaj tiranoj"? Ĉu la proletaro forĵetu diktaturon kaj ne premfaligu la burĝaron? Ĉu la akademia laboro de la proletaro ne premfaligu kaj eliminu tiun de la burĝaro? Ĉu tio estas agado de "akademia tirano", ke proleta akademia laboro premfaligas kaj eliminas burĝan akademian laboron? La skizo direktas sian lancpinton kontraŭ la proletajn maldekstrulojn. Evidente, ĝi intencas etikedi la marksist-leninistojn per "akademiaj tiranoj" kaj tiamaniere subteni la verajn burĝajn akademiajn tiranojn por konservi ilian ŝanceliĝantan monopolan pozicion en akademiaj rondoj. **Fakte, ĝuste tiuj potenctenantoj en la Partio irantaj la kapi-**

talisman vojon, kiuj subtenas la burĝajn akademiajn tiranojn, tiuj burĝaj reprezentantaj personoj, kiuj enŝteliĝis en la Partion kaj protektas la burĝajn akademiajn tiranojn, estas kolosaj partiaj tiranoj uzurpintaj la nomon de la Partio, kiuj ne legas librojn, nek ĵurnalojn, ne havas kontakton kun la amasoj, scias nenion sciencan kaj nur "agas arbitre kaj subigas aliajn per potenco".

(8) Por sia kaŝita motivo, la aŭtoroj de la skizo postulas fari "stilĝustigadon" kontraŭ la "firmaj maldekstruloj" intencante krei konfuzon, nebuligi la klasajn frontojn kaj deturni homojn de la celtabulo de batalo. Ilia ĉefa celo en hasta elĵeto de tiu ĉi skizo estas ataki la proletajn maldekstrulojn. Ili speciale koleksis materialon pri la maldekstruloj por formi dosierojn, klopodis trovi diversajn pretekstojn por ataki la maldekstrulojn, kaj ankaŭ intencis lanĉi pluapaŝan atakon kontraŭ la maldekstruloj en la nomo de "stilĝustigado", kun vana intenco dispecigi la vicaron de maldekstruloj. Ili publike rezistas la orientilon eksplicite elmetitan de Prezidanto Maŭ protekti kaj subteni la maldekstrulojn kaj doni seriozan atenton al formado kaj plivastigo de maldekstrula vicaro. Aliflanke, al tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro, reviziistoj kaj renegatoj, kiuj enŝteliĝis en la Partion, ili donis la titolon de "firmaj maldekstruloj" kaj protektas ilin. Per tiaj manovroj, ili provas ŝveligi la arogantecon de la burĝaj dekstruloj kaj sufoki la batalspiriton de la proletaj maldekstruloj. Ili estas plenaj de malamo al la proletaro kaj de amo al la burĝaro. Tio ja estas la burĝa koncepto de frateco tenata de la aŭtoroj de la skizo.

(9) En la tempo kiam nova kaj akra batalo lanĉita de la proletaro kontraŭ la reprezentantaj personoj de la burĝaro sur la ideologia fronto estas nur ĵus komencita kaj en multaj flankoj kaj lokoj estas ankoraŭ ne komencita **aŭ, kvankam ĝi estas komencita, tamen absoluta plimulto de partiaj komitatoj havas tre malmulte da kompreno pri la tasko de gvido en tiu ĉi granda batalo kaj ilia gvido estas treege neserioza kaj treege neefika,** la skizo tamen ripetfoje emfazas, ke la batalo devas esti kondukata "sub gvidado", kun "prudento", kun "diskreto" kaj kun "la sankcio de la koncernaj gvidaj institucioj". Ĉio ĉi tio celas fari multajn limigojn al la proletaj maldekstruloj, altrudi multajn malpermesojn kaj leĝojn, por ligi iliajn manojn kaj piedojn kaj meti multajn obstaklojn sur la vojon de la proleta kultura revolucio. Unuvorte, la aŭtoroj volas haste bremsi la movadon kaj lanĉi por venĝo kontraŭatakon. Rilate al la artikoloj skribitaj de la proletaj maldekstruloj por rebati la burĝajn reakciajn "aŭtoritatulojn", la aŭtoroj de la skizo tenas en si ekstreman malamon kontraŭ tiuj jam publikitaj kaj ne aperigas tiujn ankoraŭ ne publikigitajn. **Tamen, ili libere senbridigis ĉiujn demonojn kaj diablojn kiuj en multaj jaroj inundis niajn ĵurnalojn, radiodisaŭdigon, gazetojn, librojn, lernolibrojn, paroladojn, verkojn de literaturo kaj arto, kinon, dramon, ĉjuji-on, belartojn, muzikon, dancon kaj tiel plu. Kaj tiel farante ili neniam pledas por akcepti proletan gvidon kaj neniam petas por aprobo. Tiu ĉi kontrasto montras, sur kia pozicio staras efektive la aŭtoroj de la skizo.**

(10) La nuna batalo iras ĉirkaŭ la problemo, ĉu efektivigi aŭ rezisti la linion de kamarado Maŭ Zedong pri la kultura revolucio. Tamen la skizo diras: "Ni devas, tra tiu ĉi batalo kaj sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong, elhaki la vojon por solvi tiun ĉi problemon (t. e., "ĝisfunde likvidi la burĝajn ideojn en la kampo de akademia laboro"). Kamarado Maŭ Zedong jam antaŭ longe pavimis por ni, la proletaro, la vojon sur la kultura kaj ideologia fronto per siaj verkoj *Pri Nova Demokratio, Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an, Letero Skribita al la Jan-an-a Pekin-opera Teatro post Rigardo al 'Premite al Liangŝan por Ribeli', Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* kaj *Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro* kaj tiel plu. Sed la skizo asertas, ke la penso de Maŭ Zedong ankoraŭ ne pavimis la vojon por ni, kaj la vojo devas esti denove elhakita. Uzante kiel ŝildon la standardon "sub la direktado de la penso de Maŭ Zedong", la skizo intencas elhaki vojon tute kontraŭan al la penso de Maŭ Zedong, t. e., la vojon de moderna reviziismo, vojon de restariĝo de la burĝaro.

Unuvorte, tiu ĉi skizo oponas konduki ĝisfine la socialisman revolucion, oponas la linion pri kultura revolucio de la Centra Komitato de nia partio kun kamarado Maŭ Zedong ĉe la kapo, atakas la proletajn maldekstrulojn, protektas la burĝajn dekstrulojn kaj per tio preparas publikan opinion por la burĝa restariĝo. Tiu ĉi skizo estas respeguliĝo de la burĝa ideologio interne de la Partio, kaj estas reviziisma de la kapo ĝis la piedoj. Batali kontraŭ tiu ĉi reviziisma linio, absolute ne estas bagatelo, sed estas unuarange grava afero koncernanta la sorton kaj la estontecon de niaj partio kaj ŝtato, la estontan fizionomion de niaj partio kaj ŝtato kaj ankaŭ la mondan revolucion.

Partiaj komitatoj de diversaj niveloj devas tuj ĉesigi efektivigon de la "Raporta Skizo de la Kvinpersona Grupo de la Kultura Revolucio pri la Kuranta Akademia Diskuto". La tuta Partio nepre devas sekvi la instrukciojn de kamarado Maŭ Zedong, **alte teni la grandan standardon de la proleta kultura revolucio, ĝisfunde malkaŝi la burĝan reakcian starpunkton de tiu aro da tiel nomataj "akademiaj aŭtoritatuloj" kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, ĝisfunde kritiki la burĝajn reakciajn ideojn en diversaj rondoj de la akademia laboro, eduko, ĵurnalismo, literaturo kaj arto kaj eldono, kaj depreni la gvidantecon en tiuj kulturaj sferoj. Por tion atingi, estas nepre necese samtempe kritiki tiujn reprezentantajn personojn de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj ĉiujn rondojn de la kultura kampo, kaj forigi ilin, kaj iuj el ili devas esti transoficigitaj. Precipe ni nepre ne devas konfidi al tiuj ĉi homoj la laboron gvidi kulturan revolucion. Tamen, aŭ en la pasinteco aŭ en la nuna tempo, multaj el ili ja faras tian laboron. Tio estas ekstreme danĝera.**

Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondojn, estas aro da kontraŭrevoluciaj reviziistoj; tuj kiam la kondiĉoj estos maturaj, ili kaptos la regpotencon kaj turnos la diktaturon de la proletaro en la diktaturon de la burĝaro. El tiuj ĉi homoj iuj jam estas malkaŝitaj de ni, iuj ankoraŭ ne, kaj iuj estas fidataj kaj kulturataj de ni kiel niaj daŭrigantoj, ekzemple, tiaj homoj kia Ĥruŝĉov, estas nun kuŝantaj apud ni; la partiaj komitatoj de diversaj niveloj nepre devas doni plenan atenton al tiu punkto.

Tiu ĉi cirkulero kune kun la erara dokumento dissendita de la Centra Komitato de la Partio en la 12-a de februaro ĉijare, povas esti distribuita al la guberniaj partiaj komitatoj, partiaj komitatoj en la kulturaj institucioj kaj partiaj komitatoj ĉe regimenta nivelo en la armeo, por ke ili disvolvu diskutadon pri tio, kiu el la du dokumentoj estas erara kaj kiu korekta, kiel ili mem komprenas tiujn dokumentojn, kaj kiujn atingojn kaj kiujn erarojn ili havas.

Granda Historia Dokumento

Redakcioj de *Hongqi* (*Ruĝa Flago*)
kaj *Renmin Ribao* (*Popola Ĵurnalo*)

La historia dokumento Cirkulero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio de la 16-a de majo, 1966, ellaborita antaŭ unu jaro sub la persona prezido de nia granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong, estas granda marksism-leninisma dokumento. Tiu ĉi dokumento nun estas konigita al la ĝenerala publiko. Tiu ĉi dokumento elmetis la teorion, linion, orientilon kaj politikojn de la granda proleta kultura revolucio, frakasis la intrigon de la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de Peng Ĝen subfosi la grandan proletan kulturan revolucion en vana provo efektivigi la restariĝon de kapitalismo. Tiu ĉi dokumento sonigis la antaŭenmarŝan klarionon de la granda proleta kultura revolucio.

La "Raporta Skizo" eldonita de Peng Ĝen en februaro de la pasinta jaro estas reviziisma programo de la kapo ĝis la piedoj, programo por kapitalisma restariĝo. La apero de tiu ĉi programo estas granda malkaŝo de la longe kovita kontraŭpartia kaj kontraŭsocialisma konspiro de la reviziisma kliko de Peng Ĝen. La Cirkulero malkovris la kontraŭrevolucian reviziismon klikon de Peng Ĝen kaj deklaris ĝian bankroton. Tio formis breĉon. De tiam, la kontraŭrevolucia reviziisma fronto estrata de la ĉina Ĥruŝĉov estis ĵetita en konfuzon.

Tiu ĉi granda historia dokumento ellaborita sub la persona prezido de kamarado Maŭ Zedong kreive disvolvis marksism-leninismon kaj solvis la problemon de revolucio sub la proleta diktaturo.

Marks kaj Engels fondis la teorion de scienca socialismo. Lenin kaj Stalin disvolvis marksismon, solvis serion da problemoj de la proleta revolucio en la epoko de imperiismo kaj solvis la teorian kaj praktikan problemojn de realigo de la proleta diktaturo en unu lando. Kamarado Maŭ Zedong disvolvis marksism-leninismon, solvis serion da problemoj de la proleta revolucio en la nuna epoko kaj solvis la teorian kaj praktikan problemojn de farado de revolucio kaj prevento de kapitalisma restariĝo sub la proleta diktaturo. Tio estas tri grandaj mejlŝtonoj en la disvolva historio de marksismo.

La klasbatalo sub la proleta diktaturo, centralizita en unu punkto, ankoraŭ estas problemo de regpotenco, tio estas, ke la proletaro volas firmigi la proletan diktaturon dum la burĝaro volas renversi tiun ĉi diktaturon. Kaj la burĝaj reprezentantaj personoj, kiuj vane intencas renversi la proletan diktaturon kaj havas la plej grandan malutilon, estas la potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon, enŝteliĝis en la gvidantajn organojn de la Partio kaj de regpotenco, kaj oponas la ruĝan flagon flirtigante "ruĝan flagon".

En tiu ĉi granda historia dokumento Prezidanto Maŭ montras:

"Troviĝas po nombro da tiaj burĝaj reprezentantaj personoj en la Centra Komitato, la diversaj institucioj de CK kaj la Centra Popola Registaro, kaj ĉe la provinca, urba kaj aŭtonom-regiona nivelo."

La tuta partio nepre devas "alte teni la grandan standardon de la proleta kultura revolucio, ĝisfunde malkaŝi la burĝan reakcian starpunkton de tiu aro da tiel nomataj 'akademiaj aŭtoritatuloj' kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj, ĝisfunde kritiki la burĝajn reakciajn ideojn en diversaj rondoj de akademia laboro, eduko, ĵurnalismo, literaturo kaj arto kaj eldono, kaj kapti la gvidantecon en tiuj kulturaj sferoj. Por tion atingi, estas nepre necese samtempe kritiki tiujn reprezentantajn personojn de la burĝaro, kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj ĉiujn rondojn de la kultura kampo, kaj forigi ilin, kaj iuj el ili devas esti transoficigitaj."

"Tiuj reprezentantaj personoj de la burĝaro kiuj enŝteliĝis en la Partion, la registaron, la armeon kaj diversajn kulturajn rondojn estas aro da kontraŭrevoluciaj reviziistoj; tuj kiam la kondiĉoj estos maturaj ili kaptos la regpotencon kaj turnos la diktaturon de la proletaro en la diktaturon de la burĝaro. El tiuj ĉi homoj iuj jam estas malkaŝitaj de ni, iuj ankoraŭ ne, kaj iuj estas fidataj de ni kaj kulturataj kiel niaj daŭrigantoj, ekzemple, tiaj homoj kia Ĥruŝĉov, estas nun kuŝanta apud ni; la partiaj komitatoj de diversaj niveloj nepre devas doni plenan atenton al tiu punkto."

La grandsignifa praktiko de la granda proleta kultura revolucio dum unu jaro pruvis, kiel saĝaj estas ĉi tiuj sciencaj tezoj de Prezidanto Maŭ!

Ĉi tiuj sciencaj tezoj estas la brila vojmontra lampo por la granda proleta kultura revolucio, por firmigi la diktaturon de la proletaro kaj por garantii la transiron de socialismo al komunismo.

Ĉu ekzistas ankoraŭ klasoj kaj klasbatalo en la socialisma socio, precipe post kiam la socialisma transformado de la posedsistemo de produktaj rimedoj estas fundamente plenumita? Ĉu ĉiuj klasbataloj en socio ankoraŭ centraliĝas ĉirkaŭ la problemo de la batalo por kapti regpotencon? Ĉu ankoraŭ necesas fari revolucion sub la diktaturo de la proletaro? Kontraŭ kiu fari revolucion? Kiel konduki la revolucion? Tiun serion da gravaj teoriaj problemoj Marks kaj Engels ne povis solvi en sia tempo. Lenin vidis, ke post kiam la proletaro kaptis la regpotencon, la venkita burĝaro restas eĉ pli forta ol la proletaro kaj ĉiam intencas restariĝi; ke samtempe, la etproduktantoj senĉese generas novan kapitalismon kaj novan burĝaron, minacante la diktaturon de la proletaro, tial, por lukti kontraŭ tiuj kontraŭrevoluciaj minacoj kaj ilin venki, estas necese fortigi la diktaturon de la proletaro por longa periodo, kaj krom tio estas nenia alia vojo. Tamen, Lenin forpasis tro frue kaj ne havis tempon por solvi tiujn problemojn en praktiko. Stalin estas granda marksist-leninisto, kiu efektive forigis tre grandan nombron da kontraŭrevoluciaj reprezentantaj personoj de la burĝaro kiuj enŝteliĝis en la Partion, kiaj Trockij, Zinoviev, Kamenev, Radek, Buĥarin, Rikov kaj similaj. Sed lia manko estis ne rekoni teorie, ke en la socio ekzistas klasoj kaj klasbatalo tra la tuta historia periodo de la diktaturo de la proletaro kaj ke la problemo "kiu venkos kiun" en la revolucio ankoraŭ ne estas fine solvita, kaj, se ĉio ĉi tio ne estas ĝuste traktita, estas ebleco de restariĝo de la burĝaro. En la jaro antaŭ sia morto li jam rimarkis ĉi tiun punkton kaj diris ke en la socialisma socio ekzistas kontraŭdiroj kaj, ne ĝuste traktate, ili povas fariĝi antagonismaj. Kamarado Maŭ Zedong donis plenan atenton al la tuta historia sperto de Sovetunio. Li korekte solvis tiun serion da problemoj en sia serio da grandaj verkoj kaj instrukcioj, en tiu ĉi granda historia dokumento kaj en la grandsignifa praktiko de la granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de li. Tio estas la plej grava signo markanta, ke marksismo jam disvolviĝis en tute novan stadion. En la fruaj jaroj de la dudeka jarcento, marksismo disvolviĝis en la stadion de leninismo. En la nuna epoko, ĝi denove disvolviĝis en la stadion de la penso de Maŭ Zedong.

Prezidanto Maŭ diras al ni, ke la ĉefa objekto de la revolucio sub la proleta diktaturo estas la reprezentantaj personoj de la burĝaro kiuj enŝteliĝis en la aparaton de la proleta diktaturo, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon.

La kontraŭdiro inter la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon en unu flanko kaj la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj en alia flanko estas la ĉefa kaj antagonisma kontraŭdiro. La batalo por solvi tiun ĉi kontraŭdiron estas la koncentra manifesto de la batalo inter la du klasoj — la proletaro kaj la burĝaro, kaj inter la du vojoj — socialismo kaj kapitalismo. Malkovri la plenmanon da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, montri al la publiko kaj ĝisfunde kritiki iliajn reviziismajn varojn, komplete refuti, senkreditigi kaj renversi ilin kaj konduki la batalon por depreni potencon de ili, tio ja estas la ĉefa problemo kiun devas solvi la granda proleta kultura revolucio. Tio ja estas la ĝenerala direkto de la batalo. Ni nepre devas firme teni tiun ĝeneralan direkton de batalo.

"Tia homo kia Ĥruŝĉov" kuŝanta apud ni, kiun mencias Prezidanto Maŭ en tiu ĉi dokumento, nun estas malkovrita de la vastaj amasoj. Tiu ĉi Ĥruŝĉov de Ĉinio estas ĝuste la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, ĝuste la ĉefa reprezentanto de la burĝaro interne de la diktaturo de la proletaro. Faktoj malkaŝitaj nun pruvas, ke tiu ĉi plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas veterana oportunisto. Antaŭ la venko en la tuta lando, li oponis la kapton de regpotenco fare de la proletaro. Post la venko en la tuta lando, li oponis la diktaturon de la proletaro, oponis la socialisman revolucion kaj deziris praktiki kapitalismon en Ĉinio. Post kiam la socialisma transformado en la posedsistemo de produktaj rimedoj estis fundamente plenumita, li deziris restarigi kapitalismon en Ĉinio. Nun estas konstatite post esplorado, ke la kontraŭrevolucia reviziisma "Februara Skizo" de Peng Ĝen ja estis subtenata de li kaj efektive estis ankaŭ lia programo.

Kian rolon li ludis en la amasa movado de la granda proleta kultura revolucio? **Prenante reakcian burĝan starpunkton, li praktikis la burĝan diktaturon kaj subpremis la ardan movadon de la granda kultura revolucio de la proletaro, inversigis pravon kaj malpravon, nomis nigron blanko, organizis sieĝekstermon kontraŭ revoluciuloj, subpremis malsamajn opiniojn, praktikis blankan teroron, kaj estis tre memkontenta pri sia faro. Li ŝveligis la arogantecon de la burĝaro kaj subpremis la batalvolon de la proletaro. Kia vipura malico!**

Nun estas kristale klare por ĉiuj, ke tia kontraŭrevolucia reviziisto, tia ĉefa persono kiu, kiel priskribite de Prezidanto Maŭ en tiu ĉi granda historia dokumento, kaptos regpotencon kaj turnos la proletan diktaturon en la burĝan kiam kondiĉoj estos maturaj, estas ĝuste la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon.

La malkovro de la plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon estas unuaranga grava afero koncernanta la sorton de nia socialisma ŝtato kaj estontecon de la monda revolucio kaj estas la plej grava frukto de la granda proleta kultura revolucio. La revolucia popolo de Ĉinio kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo unuvoĉe aklamas tiun ĉi grandan venkon. La intrigo de imperiismo kaj moderna reviziismo kun vana intenco fari renversan agadon en Ĉinio pere de iliaj agentoj suferis la plej grandan malvenkon.

Ke en la unua socialisma lando Sovetunio, la reviziisma kliko uzurpis la gvidantecon de la Partio kaj ŝtato kaj efektivigis restarigon de kapitalismo, tio estas la plej granda leciono en la historio de la internacia proleta diktaturo. Ankaŭ en kelkaj aliaj socialismaj landoj okazis tiaj eventoj. Ĝuste resuminte la historian sperton de la internacia proleta diktaturo, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ mobilizis amasojn en nombro de cent-milionoj por entrepreni tiun ĉi senprecedencan grandan proletan kulturan revolucion — tio estas la plej sekura garantio ke niaj partio kaj ŝtato neniam ŝanĝos sian koloron. Tio estas la plej granda kontribuo de kamarado Maŭ Zedong al la internacia proletaro en teorio kaj praktiko.

En tiu ĉi dokumento estas deklaritaj la malorganizo de la "Kvinpersona Grupo de la Kultura Revolucio" kiun monopolis la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de Peng Ĝen kaj la refondo de Grupo de la Kultura Revolucio metita rekte sub la Konstanta

Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Partio. Tio estas unu el la gravaj aranĝoj por konduki la grandan proletan kulturan revolucion.

La publikigo de tiu ĉi granda historia dokumento estas grava evento en la politika vivo de nia lando kaj grava evento en la internacia komunisma movado.

Nuntempe, ni jam gajnis grandan venkon en la granda proleta kultura revolucio de nia lando, tamen antaŭ ni staras ankoraŭ serioza bataltasko. Ni devas ĝisfunde kritiki la plenmanon da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, en politiko, ideologio kaj teorio. Ni devas pluapaŝe realigi la grandan unuiĝon de la proletaj revoluciuloj, solidarigi plej vastajn amasojn kaj la plejmulton de la kadroj. Ni devas efektivigi la revolucian "Triopan Kombiniĝon" kaj depreni potencon vere en la manojn de la proletaro en regionoj kaj departementoj, kie estas necece depreni la potencon. Ni devas kombini la movadon de la granda kritiko kun la batalo-kritiko-reformo de nia propra unuo kaj venke plenumi la taskon de la batalo-kritiko-reformo de ĉiuj unuoj. Kaj ni devas pli bone **"teni la revolucion kaj stimuli la produktadon"**, por ke diversaj aferoj de la socialisma konstruado pluapaŝe prosperiĝu.

La Centra Komitato de la Partio alvokas, ke ĉiuj revoluciaj kamaradoj senescepte devas serioze kaj atente lerni tiun ĉi dokumenton kaj, lernante ĉi tiun dokumenton, devas kombini ĝin kun la nova situacio de la kuranta batalo kaj kun la batala sperto dum unu jaro, pluapaŝe armi sin per la penso de Maŭ Zedong, pluapaŝe kompreni kaj mastri la teorion, linion, orientilon kaj politikojn pri la granda proleta kultura revolucio elmetitajn de Prezidanto Maŭ kaj konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino.

La nuna kultura revolucio estas nur la unuafoja, kaj en la estonteco ĝi neeviteble okazos plurajn fojojn. Dum la lastaj jaroj kamarado Maŭ Zedong konstante diris, ke la problemo "kiu venkos kiun" en la revolucio povos esti solvita en tre longa historia periodo. Kaj ĉiam eblas la restariĝo de kapitalismo, se aferoj ne estas ĝuste traktataj. Ĉiuj partianoj kaj la tutlanda popolo ne opiniu ke ĉio jam estos en ordo post unu aŭ du, tri aŭ kvar grandaj kulturaj revolucioj. Nepre, nepre atentu kaj neniel perdu singardemon kaj viglecon.

CIRKULERO

de la Centra Komitato de la

Komunista Partio de Ĉinio

(La 16-a de majo, 1966)

GRANDA HISTORIA DOKUMENTO


Redakcioj de Hongqi (Ruĝa Flago)

kaj Renmin Ribao (Popola Ĵurnalo)

EL POPOLA ĈINIO



La Granda Gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong



Manskribaĵo de Vicprezidanto Lin Biaŭ okaze de la festo de "1-a Majo" en 1967: Vivu! Vivu! Longe vivu granda instruanto, granda gvidanto, granda ĉefkomandanto kaj granda direktilisto Prezidanto Maŭ!"

Vortoj de Prezidanto Maŭ pri Komunista Partio

La kerna forto, kiu gvidas nian aferon, estas la Komunista Partio de Ĉinio.

La teoria bazo, kiu orientas nian penson, estas marksism-leninismo.

Inaŭgura parolado en la Unua Sesio de la Unua Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj de la Ĉina Popola Respubliko (15 septembro 1954).

Por revolucii, estas necese havi revolucian partion. Sen revolucia partio, sen revolucia partio konstruita laŭ la revolucia teorio kaj revolucia stilo de marksism-leninismo, estas ne eble gvidi la laboristan klason kaj la vastajn popolamasojn venki imperiismon kaj ĝiajn lakeojn.

"Unuiĝu Tutmondaj Revoluciaj Fortoj, Batalu kontraŭ Imperiisma Agresado!" (novembro 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Sen klopodado de la Komunista Partio de Ĉinio, sen ĉinaj kompartianoj kiel la ĉefa subtenilo de la ĉina popolo, ne estas eblaj la sendependiĝo kaj liberiĝo de Ĉinio, nek estas eblaj la industriigo kaj modernigo de agrikulturo en Ĉinio.

"Pri Koalicia Registaro" (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verko de Maŭ Zedong*, vol. III.

La Komunista Partio de Ĉinio estas la gvidkerno de la tuta ĉina popolo. Sen tia kerno, la socialisma afero ne povas venki.

Parolo je la ĝenerala akcepto al la delegitoj de la Tria Tutlanda Kongreso de la Nov-demokratia Junulara Ligo de Ĉinio (25 majo 1957).

Partio bone disciplinita, armita per la teorio de marksism-leninismo, aplikanta la metodon de memkritiko kaj kunligiĝanta kun la popolamaso; armeo gvidata de tia partio; unueca fronto de ĉiuj revoluciaj klasoj kaj ĉiuj revoluciaj grupoj sub la gvido de tia partio — jen estas la tri ĉefaj armiloj, per kiuj ni venkas la malamikojn.

"Pri Popol-demokratia Diktaturo" (30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ni devas fidi la amasojn, ni devas fidi la Partion — tio estas du fundamentaj principoj. Se ni dubas tiujn principojn, ni elfaros nenion.

Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo (31 julio 1955).

La Komunista Partio de Ĉinio armita per la teorio kaj ideologio de marksism-leninismo alportis al la ĉina popolo novan stilon de laboro, stilon, kiu ĉefe estas kombiniĝo de teorio kun praktiko, intima interligiĝo kun la popolamasoj kaj apliko de memkritiko.

"Pri Koalicia Registaro" (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Neniu politika partio, kiu gvidas grandan revolucian movadon, povas gajni venkon, se al ĝi mankas revolucia teorio, historia scio kaj profunda kompreno pri la praktika movado.

"La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito" (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ni iam antaŭe diris, ke la stilĝustiga movado estas "ĝenerala marksisma eduka movado". Stilĝustigado signifas, ke la tuta Partio lernu marksismon per kritiko kaj memkritiko. Dum la stilĝustiga movado ni certe lernos pli da marksismo.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Estas tre malfacila kaj giganta tasko bonigi la vivkondiĉojn de la centmilionoj da loĝantoj de Ĉinio kaj konstrui nian landon ekonomie kaj kulture postrestintan en landon riĉan, potencan kaj kulture altedisvolvitan. Ni devas konduki stilĝustigadon, nun kaj estonte kaj senĉese elimini el ni ĉion eraran ĝuste por tio, ke ni povu pli kompetente surŝultrigi tiun taskon kaj pli bone kunlabori kun ĉiuj honestaj samaspirantoj ekster la Partio, kiuj decideme dediĉas sin al la reformo.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Politiko estas la elirpunkto de ĉiuj praktikaj agadoj de revolucia partio kaj sin manifestas en la procezo kaj fina rezulto de la agadoj. Ĉiu ajn agado de revolucia partio estas efektivigo de politiko. Se ĝi ne efektivigas ĝustan politikon, ĝi do efektivigas eraran politikon; se ĝi ne efektivigas ian politikon konscie, ĝi do efektivigas ĝin blinde. Tio, kion ni nomas sperto, estas la procezo kaj fina rezulto de la efektivigo de politiko. Nur tra la praktiko de la popolo, tio estas, tra sperto, ni povas konstati, ĉu la politiko estas ĝusta aŭ ne, kaj determini, en kia grado ĝi estas ĝusta aŭ erara. Sed la praktiko de homoj, precipe la praktiko de revolucia partio kaj revoluciaj amasoj, ne povas ne ligiĝi kun tiu aŭ alia politiko. Tial, antaŭ ol efektivigi ĉiun agadon, ni devas ekspliki al la partianoj kaj amasoj la politikon, kiun ni difinis laŭ la cirkonstancoj. Alie, la partianoj kaj amasoj apartiĝos de la gvido de nia politiko, agos blinde, kaj efektivigos eraran politikon.


"Pri la Politiko Koncerne al Industrio kaj Komerco" (27 februaro 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Nia partio difinis la ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon de la ĉina revolucio kaj ankaŭ diversajn specifajn liniojn por laboro kaj diversajn specifajn politikojn. Sed, dum multaj el niaj kamaradoj ofte memoras apartajn specifajn liniojn por laboro kaj apartajn specifajn politikojn de nia partio, ili forgesas ĝiajn ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon. Se ni efektive forgesas la ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon de nia partio, ni do fariĝos blindaj, neperfektaj kaj nebulkapaj revoluciuloj, kaj, kiam ni efektivigos specifan linion por laboro kaj specifan politikon, ni perdos la orientiĝon kaj ŝanceliĝos jen dekstren jen maldekstren, kaj nia laboro suferos.

"Parolado en Konferenco de Kadroj en la Liberigita Regiono de Ŝanhi kaj Sujjuan" (1 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Politiko kaj taktiko estas la vivo de la Partio; gvidantaj kamaradoj de ĉiuj niveloj devas plene priatenti ilin kaj en neniu okazo ilin neglekti.

"Cirkulero pri la Situacio" (20 marto 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.



Manskribaĵo de Prezidanto Maŭ (*lia propra poemo*)



Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Kiel ni sopiras vin! Lasu nin bone rigardi vin, premi vian manon, kaj por ĉiam revolucii, sekvante vin!

Prezidanto Maŭ Celebris la "Majan Feston" Kune kun Trimiliona Amaso

Je la unua de majo, Prezidanto Maŭ, la plej estimata kaj amata granda gvidanto de la ĉina kaj tutmondaj popoloj, kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ ĝoje celebris, kune kun trimiliona revolucia amaso de la ĉefurbo, reprezentantoj de la revoluciaj amasoj el aliaj lokoj de la tuta lando kaj internaciaj komunismaj batalantoj kaj fremdlandaj amikoj el kvin kontinentoj, la internacian laboristan tagon, feston de solidareco kaj batalo de la proletaro kaj laborantaj popoloj de la tuta mondo.

Ĉijare, la Maja Festo — internacia laborista tago alvenis en la tempo, kiam prospere leviĝas la revolucia tajdo de la tutmondaj revoluciaj popoloj en batalo



Granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ alvenas por partopreni la ĝardenan kunfeston de "1-a Majo" de ĉefurbaj revoluciaj amasoj! Plej varme ni ĝojkriu: Senfine longan vivon al Prezidanto Maŭ! Ĉiaman sanon al Vicprezidanto Lin!

kontraŭ imperiismo kun Usono ĉe la kapo, kontraŭ la moderna reviziismo kun la sovetia gvidanta kliko kiel ĝia centro kaj kontraŭ ĉiulandaj reakciuloj, en la tempo kiam la granda proleta kultura revolucio en nia lando akiris grandegan venkon, kaj en la alta tajdo de amasa kritiko disvolvita de nia popolo kontraŭ la manpleno da plej grandaj potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. La proletaj revoluciuloj kaj vastaj revoluciaj amasoj de la ĉefurbo kun revolucia pasio varme aklamis la novan grandan venkon de la penso de Maŭ Zedong kaj fidoplene decidis konduki la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino.

Tagmeze, je la tridek minutoj post la dekdua horo, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ alvenis al la Kultura Palaco de Laboranta Popolo per senkovra aŭto. Tiutempe ekbolis la tuta Palaco, kaj varma fluo de senkompara feliĉo ŝveliĝis en la koroj de la homamasoj.

La senkovra aŭto, en kiu sidis Prezidanto Maŭ kaj kamarado Lin Biaŭ, veturis de la Kultura Palaco al la Parko Sun Jatsen en la huraado simila al tajdo. Prezidanto Maŭ kaj kamarado Lin Biaŭ senĉese svingadis la manojn por sendi festtagan saluton al la revoluciaj amasoj, kiuj antaŭenmarŝas en la granda proleta kultura revolucio, kaj al la revoluciaj batalantoj kaj internaciaj amikoj el la kvin kontinentoj.

La aŭton de Prezidanto Maŭ kaj kamarado Lin Biaŭ sekvis tri aliaj senkovraj aŭtoj, sur kiuj estis kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Li Fuĉun, Hie Fuĝi,

Prezidanto Maŭ estas ĉiam kune kun ni, kaj lia koro ligiĝas ĉiam kun la nia.





Kiel sunfloroj rigardantaj al la suno, la koroj de la centmiliona popolo inklinas al Prezidanto Maŭ. La revoluciuloj partoprenantaj la ĝardenan kunfeston de "1-a Majo" prezentas la Sunfloran Dancon antaŭ la statuo de Prezidanto Maŭ.

Hiaŭ Hua, Jang Ĉeng-vu, Su Ju, Giang King, Vang Li, Guan Feng, Ki Benju, Je Kjun kaj aliaj.

Kiam Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ alvenis inter la amasojn, Tian-anmen-placo tuj fariĝis maro de ĝojo. La grandegaj portretoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, kiuj staris alte ĉe ambaŭflankoj de Tian-anmen-placo sub la brila sunlumo, la sennombraj grandegaj rubandoj kun revoluciaj sloganoj kaj ruĝaj flagoj kaj la huraoj de nekalkuleblaj ĝojplenaj amasoj donis al la festo de solidareco kaj batalo de la internacia proletaro aspekton grandiozan, imponan kaj pompan. Miloj kaj dekmiloj da laboristoj, kamparanoj, komandantoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo, ruĝaj gvardianoj, revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj revoluciaj kadroj hurais kun revolucia pasio pro la alveno de Prezidanto Maŭ. Ili kantis kaj dancis, prikantante nian grandan gvidanton kaj la plej ruĝan sunon en nia koro Prezidanto Maŭ kaj dezirante al li senlime longan vivon! Kaj per tio ili esprimis al Prezidanto Maŭ la profundan senton de senlima amo, senlima fideleco, senlima estimo kaj senlima adoro, kiun havas por li la popolo nombranta en centmilionoj.

En la granda decida batalo de la granda proleta kultura revolucio, Prezidanto Maŭ refoje alvenis inter la revoluciajn amasojn de la ĉefurbo. Tio fortege stimulis la altan batalvolon de la proletaj revoluciuloj en ilia senhalta luktado. Ili unuanime esprimis: Prezidanto Maŭ, ho Pre-

zidanto Maŭ! Ni ĵuras per nia vivo defendi vin kaj vian revolucian linion, firme tenos la revolucion kaj energie stimulos la produkton, decideme faligos la manplenon da plej grandaj potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj batalakiros novajn venkojn en la granda proleta kultura revolucio kaj socialisma konstruado.

Ankaŭ la internaciaj komunismaj batalantoj kaj fremdlandaj amikoj el kvin kontinentoj de la mondo ĝoje pasigis la festtagon kune kun la ĉefurbaj proletaj revoluciuloj kaj vastaj revoluciaj amasoj. Kien ajn ili iris, ili renkontis ĉiam aplaŭdojn kaj ekstreme varman bonvenigon.

Noktiĝis. Hele brilis la lampoj sur la grandioza Tian-anmen-placo kaj la Orienta kaj Okcidenta Ĉang-an-stratoj. *Navigadon en la Maro Oni Dankas al la Direktilisto* kaj aliaj revoluciaj kantoj sonis ĝis la ĉielo. La brilaj multkoloraj artfajraĵoj simbolantaj la flamantan fajregon de la granda proleta kultura revolucio suprenleviĝis unu fojo post alia kaj faris la noktan ĉielon de la ĉefurbo senkompare bela. Je la 40 minutoj post la naŭa horo nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ suriris Tian-anmen-pordegon en la majesta melodio de *Ruĝas la Oriento* por ĝoje pasigi la majfestan nokton kune kun la vastaj revoluciaj amasoj kaj intime manpremis kaj interparolis kun la respondecaj kamaradoj de diversaj departementoj kaj reprezentantoj de revoluciaj amasoj kaj internaciaj amikoj el kvin kontinentoj, gratulante ilin okaze de la festo de solidareco kaj batalo de la proletaro de la tuta mondo.

"Prezidanto Maŭ havas komunan korsenton kun la popolo!" En la tago, kiam la tuta lando estis en ĝojego, Prezidanto Maŭ kunestis kun la vastaj amasoj. Tio ankoraŭfoje emociis la korojn de la ĉina popolo kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo. La huraoj "Vivu! Vivu! Vivu longe Prezidanto Maŭ!" tondris tra Pekino, tra la tuta lando kaj tra la tuta mondo!

Albanaj kamaradoj kaj Ĉen Jongguj, fama tutlanda labormodelo, sekretario de la Partia Filio de Daĝaj-brigado kaj vicprezidanto de la Revolucia Komitato de Ŝanhi-provinco, en la ĝardena kunfesto de "1-a Majo" de la ĉefurbaj revoluciaj amasoj.



Ni Vidis la Grandan Gvidanton Prezidanto Maŭ

— Prezidanto Maŭ Akceptis Respondeculojn de la Revoluciaj Komitatoj de Ses Provincoj kaj Urboj kaj Rigardis la Baledon "Blankhara Knabino"

EN la 24-a de aprilo, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis respondeculojn de la revoluciaj komitatoj de Ŝanhajo, Ŝanhi-, Gujĝoŭ-, Hejlonggiang- kaj Ŝandong-provincoj, kaj Pekino.

La akceptadon akompane ĉeestis vicprezidanto Lin Biaŭ kaj kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng kaj Li Fuĉun, membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

La akceptitaj respondeculoj de la revoluciaj komitatoj de la ses provincoj kaj urboj estis jenaj kamaradoj: Ĝang





Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin inter la geaktoroj

Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Liu Geping, Ĝang Ĵiking, Li Zajhan, He Guangju, Pan Fuŝeng, Vang Giadaŭ, Vang Hiaŭju kaj Hie Fuĝi.

La akceptadon ĉeestis ankaŭ la unua vic-grupestro de la Grupo de la Kultura Revolucio de la Centra Komitato de la Partio, kamaradino Giang King, kaj ĝiaj membroj kamaradoj Vang Li, Guan Feng kaj Ki Benju.

Post la akceptado, Prezidanto Maŭ, kamaradoj Lin Biaŭ kaj Ĝoŭ Enlaj kune kun aliaj respondecaj kamaradoj rigardis la modernan revolucian baledon *Blankhara Knabino* prezentatan de la Ŝanhaja Danca Lernejo.

Post la prezentado, la orkestro laŭte ludis la melodion *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto*, kaj la tuta aktoraro svarmis al la fronto de la sceno, alte kriante fojo post fojo kun emocio: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu longe!"

Kun mieno plena de rido, Prezidanto Maŭ manklakadis kune kun vicprezidanto Lin Biaŭ, ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj respondecaj kamaradoj. Krome Prezidanto Maŭ kaj vicprezidanto Lin Biaŭ sursceniĝis kaj fotografiĝis kun la aktoroj.



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Biaŭ, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj respondecaj kamaradoj rigardis la baledon Blankhara Knabino. *La foto montras Prezidanton Maŭ, Vicprezidanton Lin kaj aliajn respondecajn kamaradojn inter la geaktoroj.*

Dahaj Hangŝing Kaŭ Dŭoŝoŭ

(Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto)




*mp
Maŭ Zedong si – ŝjang.
Ju – er li bu kaj ŝuj ja,
Gŭa – er li bu kaj jang,
Go - ming ĉjun - gong li bu kaj gong – ĉan –
cresc.
f
dang, Maŭ Zedong si - ŝjang ŝi bu lŭo di taj –
ff
D.S.
jang. bu lŭo di taj – jang.
D.S.

Salutletero al Prezid

Plej plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ:

En la momento kiam la granda batalo kaj la granda kritiko estas kondukataj kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto, kiu iras la kapitalisman vojon, ni proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo kun ekstrema emocio raportas al vi, la plej plej ruĝa suno en nia koro, la korekscitan, ĝojigan novaĵon, ke la Pekina Revolucia Komitato estas fondita. Tio estas alia ĝisfirmamente sonanta triumfokanto de via brila penso kaj alia granda venko de la proleta revolucia linio reprezentata de vi!

En tiu ĉi plej granda festotago de proletaj revoluciuloj, ni aklamas kaj kantas, kaj el miloj kaj dekmiloj da ruĝaj koroj ŝprucas la sama voĉo: Vivu, vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Kiam ni revokas al nia memoro la gloran pasintecon de la revolucio de nia lando, miloj kaj eĉ dekmiloj da vortoj ne povas eldiri plene nian senliman fidelecon al vi, miloj kaj eĉ dekmiloj da kantoj ne povas esprimi nian entuziasman laŭdon al vi, kaj la grandega maro ne povas enteni la senliman estimon kaj senliman amon, kiujn ni havas por vi.

Estas vi, kiu kombinis marksism-leninismon kun la laborista movado, fondis la grandan Komunistan Partion de Ĉinio kaj kreive disvolvis marksism-leninismon;

Estas vi, kiu bruligis la fajreron sur Ginggang-montaro kaj malfermis la vojon de triumfo al la ĉina revolucio;

Estas vi, kiu gvidis la Laboristan kaj Kamparanan Ruĝan Armeon de Ĉinio transpasi milojn da riveroj kaj montoj kaj efektivigi la 25,000-lian Longan Marŝon fame konatan tra la tuta mondo;

Estas vi, kiu likvidis en Zunji-kunveno, kiu eterne brilos en la historio, la regadon de la "maldekstra" kaj dekstra oportunismaj linioj en la Partio kaj metis la bazon de triumfo de la ĉina revolucio;

Estas vi, kiu montris en la sankta urbo de revolucio Jan-an la direkton de la antaŭenmarŝo de la Kontraŭjapana Rezistmilito;

Estas vi, kiu komandis la grandegan popolan armeon eniri en Pekinon kaj alportis printempon al la malnova ĉefurbo;

Estas vi, kiu hisis sur Tian-anmen-placo la unuan kvinstelan ruĝan standardon kaj fondis la grandan Popolan Respublikon.

En tiuj longaj militaj jaroj kaj sur la vojo de la grandioza revolucia marŝo, vi kondukis nin venki malfacilojn kaj danĝerajn obstaklojn unun post la alia kaj

anto Maŭ

trapasi vicon post vico da teruraj ondegoj por ke la suferplena patrio transiru de mallumo al lumo, aperu kiel giganto en la oriento de la mondo, alportante esperon de triumfo al la popoloj de la mondo, kaj brile leviĝu el la horizonto kvazaŭ la ruĝa suno, lumigante la vojon de liberigo por la proletaro kaj subpremataj nacioj en la tuta mondo.

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Por garantii, ke nia socialisma patrio neniam ŝanĝos sian koloron de generacio al generacio, vi persone iniciatis kaj gvidas la senprecedencan, grandan proletan kulturan revolucion kaj kondukas nin komenci novan longan marŝon.

Estas vi, kiu forŝiris la nigran vualon de la antaŭa Partia Komitato de Pekino kaj la antaŭa Pekina Popola Komitato kaj disrompis la belan sonĝon pri restarigo de kapitalismo de la tie sinkaŝinta plenmano da karieristoj;

Estas vi, kiu persone decidis brodkastigi la unuan marksism-leninisman opiniafiŝon en la tuta lando kaj bruligis la flamantan fajregon de la granda proleta kultura revolucio;

Estas vi, kiu direktis la ellaboradon de la *Decido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio pri la Granda Proleta Kultura Revolucio*, kaj per tio proklamis la bankroton de la burĝa reakcia linio kaj reĝustigis la direkton de la granda proleta kultura revolucio;

Estas vi, kiu sagace trovis kaj entuziasme subtenas la mondskuan ruĝgvardian movadon, kaj tio estis sub la gvido de via proleta revolucia linio, ke la junaj ruĝaj gvardianoj faris eterne memoratajn meritplenajn kontribuojn al la granda proleta kultura revolucio;

Estas vi, kiu revuis en Pekino la armeegon de kultura revolucio el pli ol 10,000,000 personoj venintaj de diversaj lokoj de la patrio. Kaj per tio kreis grandan iniciatoĵon en la historio de la internacia komunisma movado;

Estas vi, kiu faris en Pekino la antaŭenmarŝan ordonon pri granda unuiĝo de la proletaj revoluciuloj por depreni la potencon de plenmano da potenctenantoj en la Partio, irantaj la kapitalisman vojon, kaj antaŭenpuŝis la grandan proletan kulturan revolucion al nova etapo;

Estas vi, kiu decideme subtenas la proletajn revoluciulojn fari ĝeneralan atakon kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kaj per tio klarionis antaŭenmarŝon al nova granda kampanjo de la granda proleta kultura revolucio.

Ĉiuj ĉi tiuj emociaj scenoj kaj animskuaj bildoj prezentas la brilan perspektivon de kompleta triumfo de la granda proleta kultura revolucio, formas la laŭdkanton pri via brila penso kaj la plej heroan ĉapitron de la historio de la internacia komunisma movado, kaj malfermis novan epokon en la historio de la homaro.

Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, vi instruis al ni: **"Se nova socia sistemo volas fondiĝi sur la bazo de la malnova, ĝi devas purigi tiun bazon."** Plenmano da kontraŭrevoluciaj reviziistoj de la antaŭa Partia Komitato de Pekino kaj la antaŭa Pekina Popola Komitato, sub la protekto kaj ŝirmo de la plej granda enpartia potenc-

tenanto iranta la kapitalisman vojon faris Pekinon sendependa reĝolando, en kiun "povas eniĝi nek pinglo nek akvo", kaj vane provis transformi Pekinon en bazon por la restarigo de kapitalismo en nia lando. En la daŭro de pli ol dek jaroj ili freneze sin okupis pri krimaj agadoj kontraŭ la Partio, kontraŭ socialismo kaj kontraŭ la penso de Maŭ Zedong. Vidante iliajn ekstreme krimajn agadojn, ĉu ni povas ne indigni?! Ĉu ni povas ne fari ribelon?! Ĉu ni povas ne depreni ilian potencon?! Kun la decido defendi vin kaj la Centran Komitaton de la Komunista Partio de Ĉinio ĵure promesante oferi nian vivon, ni koncentris nian grandan kaj profundan malamon kontraŭ la klasa malamiko kaj komencis fortegan atakon al la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la antaŭa Partia Komitato de Pekino kaj la antaŭa Pekina Popola Komitato. Kiam ni ĵus elpafis la unuan obuson, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon tuj elĵetis la burĝan reakcian linion kaj vane provis strangoli en nia granda ĉefurbo la grandan proletan kulturan revolucion. Por defendi vian brilan penson kaj vian proletan revolucian linion, ni faris ribelon kontraŭ la burĝa reakcia linio kaj malkovris la ĉinan Ĥruŝĉov kiu preparis tiun reakcian linion. Sub la direktado de via proleta revolucia linio, ni rompis ĉiujn malhelpojn kaj forbalais ĉiujn barojn kaj senhezite faris decidon kvazaŭ rompante feron: decideme faligi komplete la kontraŭrevolucian reviziisman linion de la antaŭa Partia Komitato de Pekino kaj la antaŭa Pekina Popola Komitato! decideme fari ĝisfundan kritikon kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj ĵeti lin al la historia rubejo! Ni decidis kombini la kritikon kontraŭ la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon kun la batalo de kompleta frakaso de la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la antaŭa Partia Komitato de Pekino kaj la antaŭa Pekina Popola Komitato kaj kun la taskoj de batalo, kritiko kaj reformo de la propraj institucioj por detranĉi la nigran manon, kiun la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon etendis en diversajn sferojn!

Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, vi instruis al ni: **"Ĉiu mortonta reakcia forto ĉiam faras sian lastan barakton kontraŭ la revolucia forto."** La plenmano da potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon ne forlasis sian malican intencon kaj vane provas renversi la verdikton al ili donitan; ili ne volontas esti venkitaj kaj klopodas reataki kaj venĝi, levante kontraŭfluon de kapitalisma restariĝo. Ilia postkulisa ĉef-subtenanto estas la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Ni fikse memoros vian instruon:

La seneliran malamikon persekutu per supera forto,
Kaj ne ĉasadu kiel Hiang Ju l' vanan famon de bonkoro.

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de via brila penso, ni kondukos ĝeneralan atakon kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, kritikos ĝis faliĝo, kolapsiĝo kaj senkreditiĝo la burĝan reakcian linion de li reprezentatan kaj la venenegan herbon *Memkulturo* kiun li zorgeme preparis, kontraŭbatalos la plenmanon da potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon ĝis ili estos faligitaj, kolapsigitaj kaj senkreditigitaj, frakasos komplete la kontraŭfluon de kapitalisma restariĝo, decideme plenumos la grandan historian mision, kiun vi asignis al ni, nome unue batali, due kritiki kaj trie reformi, kaj decideme kondukos la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino!

Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, **"teni la revolucion, stimuli la produkton"** estas granda politiko elmetita de vi, kaj ni nepre efektivigos ĝin sen ia ajn rezervo. Ni nepre metos revolucion sur la unua loko por ke ĝi komandu en produktado.

Ni firme tenos la revolucion kaj forte stimulos la produkton, por levi novan alttajdon de socialisma konstruado en maniero fari ĝin multe, rapide, bone kaj ŝpareme kaj definitive akiri duoblan venkon de revolucio kaj produkto!

Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, ni decideme efektivigas kaj defendas la politikon de revolucia "triflanka kombiniĝo" elmetitan de vi. Ni akcelos la grandan unuiĝon de proletaj revoluciuloj kaj efektivigos la revolucian "triflankan kombiniĝon" en la batalo de ĝisfunda kritiko pri la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj en la ĝisfunda kritiko pri lia burĝa reakcia linio rilate al funkciuloj "vaste bati la plejparton por protekti parteton". Ni decideme frakasos la intrigon de plenmano da potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon, kiuj ŝajnigante sin "revoluciuloj", vane provas enŝteliĝi en la povohavan provizoran organizon de revolucia "triflanka kombiniĝo" por efektivigi kontraŭrevolucian restariĝon. Ni nepre deprenos, tenos kaj uzos bone la potencon.

En la grava momento de decida batalo inter la proletaro kaj burĝaro, vi faris al la Ĉina Popola Liberiga Armeo la batalalvokon, ke ili aktive subtenu la vastajn maldekstrajn amasojn. Tio estas via plej granda zorgo kaj plej granda subteno al ni. La Popola Liberiga Armeo estas proleta revolucia armeo, kiun vi propramane kreis kaj k-do Lin Biaŭ rekte gvidas, kaj estas subtenilo de la proleta diktaturo. Ni decideme frakasos la intrigon de la klasa malamiko direkti sian lancpinton kontraŭ la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ni nepre lernos bone de la liberiga armeo, unuiĝos kun ili kaj batalos kune kun ili, energie plifortigos la proletan diktaturon, decideme subpremos la subfosajn kaj detruajn agadojn de ĉiuj klasaj malamikoj kaj konstruos la popolan ĉefurbon solida kiel roko kaj forta kiel ŝtalo.

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Vi estas nia plej alta ĉefkomandanto kaj nia plej sagaca direktilisto. Ni ĉiam sekvos vin por fari revolucion kaj kuraĝe iri antaŭen meze de ventegoj kaj ondegoj! Kiu ajn kuraĝos oponi vin, kalumnii vian brilan penson aŭ stari kontraŭ via proleta revolucia linio, ni faros ribelon kontraŭ li kaj faligos lin, por ke li neniam povos returni sin.

Estimata kaj amata Prezidanto Maŭ, ni ĵuras al vi, ke ni ĉiam studos viajn verkojn, aŭskultos viajn vortojn, agos laŭ viaj instrukcioj kaj fariĝos viaj bonaj batalantoj. Ni nepre studos la brilajn verkojn "tri malnovajn artikolojn", *Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio* kaj *Kontraŭ Liberalismo* kiel sentencojn, disvolvos en la profundo de nia animo grandan revolucion por frakasi "egoismon" kaj starigi "kolektivismon" kaj por ege depreni la potencon de "egoismo" en la kapo. Ni nepre kaj batalos kaj reĝustigos nian stilon samtempe, laŭ via instruo. Ni forte oponos anarkismon; komplete venkos montpintismon, grupetismon, sektismon, ekscesan demokration kaj organiz-ignorajn ideojn; plifortigos proletajn revoluciecon, sciencecon, organizitecon kaj disciplinemon; starigos novan proletan revolucian ordon; firmigos la grandan unuiĝon de proletaj revoluciuloj; kaj konstruos niajn vicojn en armeon eksterordinare proletecan kaj batalecan.

Pekino estas la ĉefurbo de nia granda patrio kaj estas la espero kaj lumturo de la revoluciaj popoloj de la mondo. Sub via sagaca gvido, ni proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo plenplenaj de fido kaj batalvolo nepre konstruos Pekinon en plej plej ruĝan urbon de proleta revolucio, kiu ĉiam brilos per la lumo de la penso de Maŭ Zedong, kaj en ruĝan socialisman citadelon en la mondo, kiu oponas kontraŭ imperiismo kaj reviziismo.

Ni plej plej kore deziras al vi, la plej plej ruĝa suno en nia koro, senfine longan vivon! senfine longan vivon!

Fondiĝa kaj Celebra Kunveno de Pekina Revolucia Komitato

La 20-an de aprilo 1967



Prezidanto Maŭ lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ, kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng k.a. estas kun la tuta membraro de la Pekina Revolucia Komitato sur Tian-anmen-pordego.

Pekino, Urbo Ĉiam per la Penso de Maŭ

EN la senfina orienta vento, flirtas la ruĝaj standardoj. Ĝuste en la tempo, kiam la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio eniris la venkdecidan etapon kun la imponeco de **"miliona armeo transiranta Jangzi-riveron"**, en la gravega momento, kiam centmiliona revolucia armeo de nia lando lanĉis ĝeneralan ofensivon kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, la Pekina Revolucia Komitato — provizora povohava organizo revolucia, reprezentiva kaj kun proleta aŭtoritato, proklamis sian fondiĝon sub la amema prizorgo kaj direktado de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Tio ĉi estas granda venko de la senlime brilanta penso de Maŭ Zedong! Ĝi estas granda



Brilanta Zedong

venko de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ! Ĝi estas firmamentoskua triumfa kanto de la granda proleta kultura revolucio!

La 20-an de aprilo, cent mil revoluciaj popolanoj de la ĉefurbo solene kunvenis por celebri la venkan naskiĝon de la revolucia komitato.

En tondra aplaŭdo, ĉefministro Ĝoŭ Enlaj faris gravan paroladon en la mitingo. En la nomo de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima batalamiko kamarado Lin Biaŭ, la Centra Komitato de la Partio, la Ŝtata Konsilantaro kaj la Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPĈ, li esprimis varman gratulon pro la fondiĝo de la Pekina Revolucia Komitato kaj proklamis, ke la Centra Komitato de la Partio ĝin sankciis.

Ankaŭ kamaradoj Ĉen Boda, Kang Ŝeng, Li Fuĉun, Hiaŭ Hua, Jang Ĉengvu k. a. ĉeestis la mitingon por esprimi sian gratulon. Paroladis en ĝi, unu post alia, ankaŭ kamaradino Giang King, en la nomo de la Grupo de Kultura Revolucio de CK de KPĈ; kamarado Hie Fuĝi, en la nomo de la Pekina Revolucia Komitato kaj kamarado Ĝang Ĉunkiaŭ, en la nomo de la reprezentantaro de la kvin revoluciaj komitatoj de la provincoj Ŝanhi, Gujĝoŭ, Hejlonggiang kaj Ŝandong kaj la urbo Ŝanhajo.

La fondiĝo de la Pekina Revolucia Komitato estas evento kun granda historia signifo, ĉar ĝi okazis en la ĉefurbo de nia granda socialisma patrolando, en la centro de la monda revolucio de la nuna epoko, en la naskiĝloko de la mondskua, granda proleta kultura revolucio. Ĝi signas la plenan disfalon de la malnovaj Partia Komitato kaj Popola Komitato de Pekino, en kiuj nestiĝis la kontraŭrevolucia reviziisma kliko; ĝi signas la ĝisfundan bankroton de la burĝa reakcia linio, praktikata de la ĉefaj respondeculoj de la nova Partia Komitato de Pekino; ĝi signas la novan grandan venkon akiritan de la granda proleta kultura revolucio en la ĉefurbo; ĝi kreis novan sperton por la firmigo kaj disvolvo de la proleta diktaturo kaj konduko de la socialisma revolucio ĝis la fino, sub la kondiĉoj de proleta diktaturo kaj la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj donos grandan influon al la venko de la granda proleta kultura revolucio en ĉiuj lokoj de la tuta lando.

Pekino estas la loko, kie loĝas Prezidanto Maŭ, la plej plej ruĝa suno en nia koro; ĝi estas la sidejo de la plej alta komandejo de la proletaro; ĝi estas la gvida centro de la senprecedenca, granda proleta kultura revolucio; kaj ĝi estas la lumturo, al kiu la subpremataj nacioj kaj popoloj de la mondo direktas siajn

esperajn rigardojn. De 17 jaroj post la Liberiĝo, la penso de Maŭ Zedong sune brilas super la vasta tero de la patrolando kaj super la ĉefurbo Pekino.

Sub la brilo de la penso de Maŭ Zedong, la vasta revolucia popolo de la ĉefurbo firme decidis konstrui Pekinon en ruĝan citadelon de la proleta diktaturo.

Sed, sub la protekto kaj subteno de plenmano da plej grandaj potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon, la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la malnova Partia Komitato de Pekino kolektis sub si kapitulaculojn kaj perfidulojn, formis sekton kun egoismaj celoj kaj ŝanĝis Pekinon en reĝlandon, en kiun povas eniĝi nek akvo nek pinglo, vane provante fari ĝin bazloko por sia kontraŭrevolucia restarigo. Ili konstante oponas kontraŭ la ruĝa standardo, flirtigante "ruĝan standardon", praktikas centpocente reviziisman linion en la sferoj de politiko, ekonomio, ideologio kaj kulturo, malice atakas nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ kaj freneze oponas kontraŭ la Partio, socialismo kaj la penso de Maŭ Zedong. Ili kolektis aron da reakciaj literaturistoj kaj utiligis la ĵurnalojn, gazetojn, radiostaciojn, librojn, propagandajn podiojn, kinon, teatrojn, literaturajn verkojn k. s. troviĝantajn en siaj manoj por energie disvastigi la venenon de kapitalismo, reviziismo kaj feŭdismo kaj senskrupule prepari per tio publikan opinion por renversi la proletan diktaturon kaj restarigi kapitalismon. Tiel grandaj kaj multegaj estas la krimoj de tiu kontraŭrevolucia reviziisma kliko, ke oni ne povas ilin plene skribi eĉ per ĉiuj skribiloj de la mondo.

Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ diris jam antaŭ longe: **"Por renversi regpotencon estas ĉiam necese, unue, krei publikan opinion, fari laboron en la ideologia sfero. Tiel agas la revolucia klaso, kiel ankaŭ la kontraŭrevolucia klaso."**

Ekde la jaro 1959, la kontraŭpartia kliko "Trifamilia Vilaĝo" formita de la kontraŭrevoluciaj reviziistoj Deng Tuo, Vu Han kaj Liaŭ Moŝa jam verkis grandan nombron da reakciaj eseoj kaj elpafis aron post aro da venenaj sagoj kontraŭpartiaj kaj kontraŭsocialismaj. La publikigo de *Noktaj Babiloj ĉe Janŝan* kaj la *Deoficigo de Haj Ĵuj* estas granda ofensivo kontraŭ la Partio kaj socialismo, zorge projektita de la "Trifamilia Vilaĝo" kun difinita celo, antaŭpreparita plano kaj organiziteco. En la printempo de 1962, la malica ofensivo de la "Trifamilia Vilaĝo" atingis sian kulminon. Subtenate de plenmano da plej grandaj potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon, ili vane provis ŝanĝi la koloron de la ĉefurbo kaj de la tuta lando kaj fari la ĉefurbon pontkapa fortikaĵo por sia restarigo de kapitalismo en Ĉinio. Ilia malico estis vere venenega!

Sed nigraj nuboj ne povas bari la sunan brilon de la penso de Maŭ Zedong. En la pasintaj 17 jaroj, la vastaj revoluciaj amasoj kaj funkciularo de Pekino, kiuj havas gloran revolucian tradicion, senŝanceliĝe praktikis la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj firme bojkotis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de malnova Partia Komitato de Pekino kaj kondukis pinto-kontraŭ-pintan batalon kontraŭ ĝi.

Estis nia granda direktilisto Prezidanto Maŭ, kiu je la kriza momento de la revolucio forŝovis la nebulon kaj ĝustigis la direkton de la pruo tiel, ke la revolucia ŝipo prenis ĝustan navigacian linion kaj iras de venko al venko.


En septembro de 1962, en la Deka Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Prezidanto Maŭ refoje faris la grandan alvokon al la tuta Partio kaj la tuta popolo nepre ne forgesi la klasbatalon. Prezidanto Maŭ montris, ke en socialisma socio ekzistas ankoraŭ klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, ekzistas la batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo, kaj ekzistas la danĝero de restarigo de kapitalismo. Tiu kunveno alte tenis la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj laŭte klarionis la signalon por decidema batalo kontraŭ la fortoj provantaj restarigon de kapitalismo kaj feŭdismo.

En 1963, la literatura kaj arta revolucio, komencita en nia lando sub la persona direktado de Prezidanto Maŭ kaj kun la reformo de la pekina opero kiel la ĉefa signo, formis la uverturon de la granda proleta kultura revolucio de nia lando.



En kantado pri la venko de la granda proleta kultura revolucio la Pekina Revolucia Komitato proklamis sian fondiĝon.

Por garantii, ke la socialisma ŝtato neniam ŝanĝu sian koloron tra senfinaj generacioj komenciĝis la granda proleta kultura revolucio, persone iniciatita kaj gvidata de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Sed, antaŭsentante la alproksimiĝon de sia pereo, la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la malnova Partia Komitato de Pekino terure malamas kaj timas tiun ĉi grandan proletan kulturan revolucion. Foje-refoje ili faris artifikon de duvizaĝulo, malkaŝe rifuzante plenumi la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri kritiko al la *Deoficigo de Haj Ĵuj*. Post la publikigo de la artikolo de kamarado Jaŭ Venjuan "Pri la Nova Historia Dramo *Deoficigo de Haj Ĵuj*" en la ŝanhaja ĵurnalo *Wen Hui Bao*, ili agis eĉ tiel arogante, ke ili malpermesis la pekinajn ĵurnalojn ĝin represi kaj malpermesis ankaŭ ĝian eldonon en broŝuro. Ili faris serion da subteraj aktiva-



Garnizonaj trupoj en Pekino per tondraj aplaŭdoj esprimas sian firman subtenon al la Pekina Revolucia Komitato.

doj por freneze kontraŭstari kaj subfosi la grandan proletan kulturan revolucion.

Ilia kontraŭpartia intriga aktivado ja ne povas atingi sian celon. La proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo firme respondis al la alvoko de la granda proleta kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ, frakasis la nigran gastejon "Trifamilia Vilaĝo" per unu frapo kun impeto de lavango kaj fulmtondro, kaj rekte pistis la reviziismian neston de la malnova Partia Komitato de Pekino en mil pecetojn.

La 25-an de majo, 1966, Nie Juanzi k. a. kamaradoj de la Filozofia Fakultato de la Pekina Universitato skribis la unuan opiniafiŝon kaj malkaŝis per ĝi la krimagon de freneza subfosado kontraŭ la granda proleta kultura revolucio, faritan de la kontraŭrevolucia reviziisma kliko en la malnova Pekina Universitato estrata de ĝia rektoro Lu Ping. Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio tuj decidis brodkastigi kaj publikigi en ĵurnaloj tiun ĉi unuan marksism-leninisman opiniafiŝon en la lando, kaj decidis reorganizi la malnovan Partian Komitaton de Pekino per starigo de iu nova. Tiu decido ricevis varman subtenon de la popolo de la tuta urbo kaj la tuta lando, kaj fortege antaŭenpuŝis la ĵus leviĝintan grandan proletan kulturan revolucion. Tamen, la ĉefaj respondeculoj de la nova Partia Komitato reorganizita praktikis ne la proletan revolucian linion reprezentatan de Prezidanto Maŭ, sed la burĝan reakcian linion elmetitan de la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Dum junio kaj julio de 1966, la granda proleta kultura revolucio en Pekino estis kondukata sub la rekta kontrolo de plenmano da plej grandaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj direktis la lancpinton de la batalo tuj post ĝia komenciĝo kontraŭ la proletaj revoluciuloj kaj protektis la kontraŭrevolucian reviziismian klikon de la malnova Partia Komitato de Pekino. Ili subpremis la ŝtormon de la granda proleta kultura revolucio en Pekino kaj praktikis tiun burĝan reakcian linion tra la tuta lando.

En la kunveno celebranta la fondiĝon de la Pekina Revolucia Komitato, la revolucia amaso aklamas la grandan venkon de la penso de Maŭ Zedong.



En tiu kriza momento, nia granda direktilisto Prezidanto Maŭ revenis al Pekino kaj savis la grandan proletan kulturan revolucion. Li denove flamigis tiun grandan revolucion. Apenaŭ la ruĝaj gvardianoj kaj la granda revolucia interkontakto por spertoŝanĝo elmergiĝis kiel novaj aferoj sur la orienta horizonto, Prezidanto Maŭ tuj donis al ili sian varman subtenon. La movado de ruĝaj gvardioj tuj envolvis la tutan landon kaj skuegis la mondon. La ruĝaj gvardianoj iris el la lernejoj al la socio kaj el Pekino al la tuta lando, plenenergie detruas la kvar malnova-ojn de la ekspluataj klasoj kaj starigas la kvar nova-ojn de la proletaro; ili faris senmortan kontribuon en la granda proleta kultura revolucio.



En alta ĝojo la revolucia amaso pendigas la nomtabulon de la Pekina Revolucia Komitato.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"zorgu pri la ŝtataj aferoj kaj konduku la grandan proletan kulturan revolucion ĝis la fino"**, la proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo frakasis la blankan teroron de la burĝa reakcia linio kaj foje-refoje fiaskigis la reatakojn de la reakciuloj, disvolvante la sentiman spiriton de **"Se mortpunon per mil trancoj oni spitas, imperiestron tiri de sur ĉevalo oni ne hezitas"**, kaj akiris unu venkon post alia.

"Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo celas kapti kaj firmigi la regpotencon. Kaj la morta batalo de kontraŭrevoluciularo kontraŭ la revoluciaj fortoj ankaŭ celas nur teni sian regpotencon." Je la tempo de venko, la proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo relernis la cititan instruon de Prezidanto Maŭ kaj sentis la vortojn des pli intimaj kaj ilin komprenis pli profunde.

La ŝtormo de la "Januara Revolucio" de Ŝanhajo envolvis la tutan landon kaj puŝis la grandan proletan kulturan revolucion en la novan stadion de deprenado de la potenco el la manoj de plenmano da potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon. Ankaŭ la proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo tuj mobiliziĝis kaj komencis la batalon por depreni, de malsupre ĝis supre, la potencon el la manoj de plenmano da potenctenantoj en la Partio irantaj la kapitalisman vojon.

Dum la longa batalado, la revoluciuloj profunde konvinkiĝis, ke la proletaj revoluciuloj devas unuiĝi en batalo por akiri la ĝisfundan venkon, kaj ke nur per la efektivigo de la granda unuiĝo de la revoluciuloj ili povos sukcese depreni la potencon kaj bone ĝin tenadi.

La proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo disvolvis sian revolucian iniciatemon, kaj post relative sufiĉa preparado kaj interkonsiliĝo okazigis, unun post alia, la Kongreson de Ruĝaj Gvardianoj de Ĉefurbaj Altlernejoj, la Konferencon de Pekinaj Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj, la Konferencon de Pekinaj Revoluciaj Oficistoj kaj Laboristoj kaj la Kongreson de Ruĝaj Gvardianoj de Ĉefurbaj Mezlernejoj. La granda kunligiĝo, granda unuiĝo kaj granda kolektiĝo, efektivigitaj, sub la granda standardo de la penso de Maŭ Zedong, de la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la ĉefurbo, kiel la ĉefforto de la granda proleta kultura revolucio, kaj junaj ruĝaj gvardianoj de la altaj kaj mezaj lernejoj de la ĉefurbo, kiel la avangardo de la granda proleta kultura revolucio, metis vastan, firman fundamenton kun amasa karaktero por la fondo de provizora revolucia povohava organizo de "triflanka kombiniĝo", nome la Pekina Revolucia Komitato. La garnizonaj trupoj de la granda Ĉina Popola Liberiga Armeo en Pekino firme subtenas la proletajn revoluciulojn kaj fariĝis bazoŝtono por la granda unuiĝo de la ĉefurbaj revoluciuloj kaj la "triflanka kombiniĝo".

Kompreneble, la unuiĝo signas nur la komencon de nova batalo. **"La malamikoj ja ne malaperos mem"** kaj **"ili ankoraŭ faros sian lastan baraktadon"**. Ili kredeble subfosos diversmaniere la grandan unuiĝon de la proletaj revoluciuloj kaj vane provos restarigi kapitalismon. Sed la morta baraktado de la klasa malamiko ja ne povos bari la antaŭenruliĝantajn radojn de la historio. Ili jam suferis kaj ankoraŭ suferos ĉiam pli pezajn malvenkojn.

La granda proleta kultura revolucio de nia lando jam eniris en la novan periodon de alta tajdo de kritikado pri la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon. Tiu ĉi estas la periodo de granda decida batalo de la granda proleta kultura revolucio. La plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon estas la ĝenerala postkulisa apoganto de reviziismo en nia lando, kaj estas necese lin renversi sur la tero, por ke li neniam povu sin returni supren. La proletaj revoluciuloj jam sin organizis en milionan revolucian armeon de kritiko, por fari ĝeneralan ofensivon en politiko, ideologio kaj teorio kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la malnova Partia Komitato de Pekino kaj ĝia ĝenerala postkulisa apoganto, la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, ĝisfunde likvidi kaj elimini la venenon postlasitan de ili en ĉiuj sferoj, detranĉi iliajn demonajn ungojn disetenditajn en diversajn kampojn kaj sekciojn, kaj repreni ĉiujn de ili uzurpitajn poziciojn.

Alte tenante la revolucian kritikan standardon, la proletaj revoluciuloj de la ĉefurbo, kiuj jam venkis en la granda batalo por depreno de la potenco, sen ia paŭzo en sia batalado nun furioze pafas kontraŭ la plej granda enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon, por plie ĝisfunde kritiki la tutan reviziismanlinion praktikitan en ĉiuj sferoj de la kontraŭrevolucia reviziisma kliko de la malnova Partia Komitato de Pekino, komplete elimini ĝian postlasitan venenon kaj plenumi la grandan historian taskon faligi per luktado la enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon, kritiki la burĝajn reakciajn akademiajn "aŭtoritatojn" kaj la ideologion de la burĝaro kaj ĉiuj ekspluataj klasoj kaj reformi edukadon, literaturon kaj arton kaj ĉiujn aliajn partojn de la superstrukturo, kiuj ne konformas al la socialisma ekonomia fundamento.

Tra tiu granda kritika movado, leviĝos nova tajdo de kreiva lernado kaj kreiva aplikado de la verkoj de Prezidanto Maŭ, por ke la revoluciaj amasoj centmilione nombrantaj mastru la penson de Maŭ Zedong, ke la penso de Maŭ Zedong okupu ĉiujn poziciojn, kaj ke la granda ruĝa standardo de la penso de Maŭ Zedong flirtu alte kaj flirtu por ĉiam super la ĉefurbo! La ruĝa ĉefurbo, kie loĝas Prezidanto Maŭ, neniam ŝanĝu sian koloron tra senfinaj generacioj!

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Kamaradino Giang King k. a. Akceptis Japanajn Gastojn

POSTTAGMEZE de la 4-a de majo, ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj kamaradino Giang King, la unua vicestro de la Grupo de Kultura Revolucio de CK de la Komunista Partio de Ĉinio, akceptis la Japanan Virinan Delegacion kaj havis koran interparolon kun ĝiaj membroj. La delegacio, estrata de Ĉijo Nakaĝima, estas alsendita de la Japani-Ĉinia Amikeca Asocio (Ortodoksa).

En la sama tago, por bonvenigi la delegacion, Jang Junju, membro de la sekretariejo de la Tutlanda Virina Federacio, aranĝis te-kunsidon, kiun ĉeestis reprezentantinoj de la Konferenco de Pekinaj Revoluciaj Oficistoj kaj Laboristoj, la Konferenco de Pekinaj Malriĉ-kamparanoj kaj Malsuperaj Mez-kamparanoj kaj la Kongreso de Ruĝaj Gvardianoj de Ĉefurbaj Altlernejoj kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj libere interparolis kun la japanaj amikinoj pri la batala amikeco inter la revoluciaj virinoj de Ĉinio kaj Japanio.

Foto pri la akcepto



GAŬ ĈAŬ:

Sturmanto en Revolucio kaj Modelo en Laboro

KIEL LOKOMOTIVO EN KONDUKADO DE REVOLUCIO

En februaro ĉijare, du labormodeloj de Ŝanhi-provinco fame konataj tra la tuta lando publikigis leteron al Ŝanhi-aj komunumanoj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj, en kiu ili alvokis ke la lastaj estu sturmantoj kaj en la granda proleta kultura revolucio kaj en la produkto kaj levu alttajdon de printempa plugado, por turni la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion kaj stimuli la produkton"** en efektivajn agadojn, kaj tiel frakasi la subfosan intrigon de la manpleno da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj batalakiri abundan rikolton ambaŭ en revolucio kaj en produkto. Unu el la labormodeloj estis Ĉen Jongguj, sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado de Daĝaj-komunumo de Hijang-gubernio kaj konata tutlanda standardo de agrikulturo, pri kiu ni jam raportis en nia gazeto n-ro 2 de la jaro 1965. La alia estis Li Ŝunda, estro de Higoŭ-brigado de Higoŭ-komunumo, Pingŝun-gubernio, kiun ni nun konatigos al vi.

Li Ŝunda ja estas efektive revolucia sturmanto kaj modela laboranto. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ diris ke modelaj personoj havas tri bonajn kvalitojn kaj ludas tri rolojn, nome: la roloj de lokomotivo, de skeleto kaj de ponto. Ili elpaŝas la unuaj por doni ekzemplon al aliaj en miloj da okazoj kaj plej grave en la okazo de revolucio. En la nuna granda proleta kultura revolucio, Li Ŝunda rompis vicon post vico da baroj, kuraĝe faris fortan atakon kontraŭ la manpleno da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, kaj decideme kritikis la potenctenanton n-ro 1 en la Partio irantan la kapitalisman vojon kaj malkaŝis serion da liaj krimoj, nome: subfosi ĉiurimede la kolektivan ekonomion en la kamparo, pledi por ekspluatado de dunglaboristoj kaj vane provi restarigi kapitalismon en Ĉinio. Li montris: estis li, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, kiu intencis grandkvante forhaki agrikulturajn kooperativojn en 1953; estis ankaŭ li, kiu sendis homojn al Higoŭ-brigado por devigi ĝin forlasi la vojon de organiziĝo en 1955; kaj estis denove li, kiu, profitante la ekonomian malfacilecon en nia lando, plenforte pledis en 1961 por plivastigi parcelojn por privata uzo kaj liberajn merkatojn, pliigi etajn entreprenojn mem respondecajn pri la propraj profitoj aŭ perdoj kaj fiksi produktan kvoton bazitan sur familia mastrumado por deradike ruinigi socialismon. Sed Li Ŝunda kaj la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj sub lia gvido tamen sukcesis rezisti tiujn nigrajn ventojn kaj persistis en la vojo de agrikultura kolektivigo montrita de Prezidanto Maŭ.

En la nuna, historie senprecedenca, granda proleta kultura revolucio iniciatita kaj gvidata persone de Prezidanto Maŭ, Li Ŝunda des pli brave leviĝis por ribeli kontraŭ la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon. Nun li estas elektita kiel membro de la Revolucia Komitato de Ŝanhi-provinco. Kaj sekvante la vortojn de Prezidanto Maŭ, li klopodas kune kun la vastaj amasoj de proletaj revoluciuloj por sukcesigi, en la tempo de aktiva partopreno en la granda proleta kultura revolucio, la ideologian revoluciigon kaj agrikulturan produkton kaj konstrui la popolajn komunumojn en la kamparo en grandajn ruĝajn lernejojn de la penso de Maŭ Zedong.

IRI LA VOJON DE ORGANIZIĜO

"La vortojn de Prezidanto Maŭ ni obeos firme kaj la vojon de kolektivigo ni iros definitive!"



Kamarado Li Ŝunda (la tria, maldekstre) pristudas kaj diskutas kune kun respondeculoj de la revoluciaj ribeluloj kaj la PLA-a garnizono en la gubernio, kiel "teni la revolucion kaj stimuli la produkton", por gajni duoblan triumfon en la revolucio kaj produkto.

diris Li Ŝunda, kiam li kritikis la potenctenanton n-ro 1 en la Partio irantan la kapitalisman vojon. Tio manifestas la profundan komprenon de Li Ŝunda kaj la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj de Higoŭ-brigado, rezultintan el ilia 24-jara sperto.

La vilaĝo Higoŭ, kie vivas Li Ŝunda, estis antaŭe iom dezerta kaj izola montvilaĝo en Tajhang-montaro, Ŝanhi-provinco. Ĝi situas alte je 1,200 metroj super la marnivelo. Tie la montoj estis kalvaj, la kampoj estis disaj kaj malgrandpecaj kun maldika tertavolo sed abundo da ŝtonoj, kaj la terkulturistoj ĉiujare rikoltis po muo nur kelkdek ĝin-ojn da greno. La vilaĝanoj tute ne havis rimedon kontraŭ naturaj katastrofoj kaj cirkulis la diro: "El dek jaroj naŭ rikoltas malabunde kaj el dek loĝantoj naŭ mienas ĉagrene". En 1937, post kiam la Kontraŭjapana Rezistmilito komenciĝis, la Oka-voja Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio liberigis tiun montregionon kaj tieaj loĝantoj ekspluatataj longtempe de bienuloj emancipiĝis sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Sed la individua et-kamparana ekonomio kaj la malfavoraj naturaj kondiĉoj, kiel tigro sidanta sur vojo, ankoraŭ baris al ili la vojon de disvolvo de produkto.

En 1943 publikiĝis la brila verko de Prezidanto Maŭ *Organiziĝu*. La vilaĝanoj ekhavis vojlumigantan lampon. Sub la gvido de la Partio, komunisto kaj malriĉ-kamparano Li Ŝunda kaj aliaj la unuaj organizis sin kun kelkaj familioj de malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj en interhelpan grupon. Burĝono de socialismo ekaperis en Higoŭ.

Sub la gvido de Li Ŝunda, malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj alte levis la ruĝan standardon de organiziĝo de Prezidanto Maŭ en Tajhang-montaro. Ili kulturebligis virgan teron kaj disvastigis novajn kulturajn teknikojn, tiel ke la produktkvanto de grenoj kreskis jaron post jaro. En 1951, la pomua produkto altiĝis de kelkdek ĝinoj antaŭ la Liberiĝo ĝis pli ol 300 ĝinoj.

La interhelpa grupo akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj, kaj la vivo de la grupanoj pliboniĝis paŝon post paŝo. Tamen, iuj ankoraŭ ne havis fidon al organiziĝo kaj ne volis organiziĝi en interhelpajn grupojn. "Ni iru nian vojon, se ili ne!" Li Ŝunda decideme diris al la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj en la interhelpa grupo. Ankaŭ tiuj ĉi diris fidplene: "Nia Higoŭ certe prosperiĝos, se ni energie laboros unuanime!"

ĜUSTE SOCIALISMO ESTAS BONA

Kiel prosperigi Higoŭ? Laŭ la partia politiko pri konstruado de montregiono: "ĉiuflanka dis-

volvo de agrokulturo, forstado kaj bestbredado", la gubernia partia komitato de Pingŝun kaj la partia filio de Higoŭ mobilizis la amasojn fari vastajn diskutojn por ke ili vere komprenu ke ĝuste la vojo de socialismo estas bona.

Decembre de 1951 en Higoŭ fondiĝis Ginhing-a Produkta Kooperativo de Agrokulturo, Forstado kaj Bestbredado. Multiĝis la membroj, kreskis la energio, kaj plifortiĝis la volo de Higoŭ-anoj por ŝanĝi la fizionomion de la vilaĝo kaj reformi ĝiajn montojn kaj riverojn. En la komenco de 1952, la gubernia partia komitato gvidis la Higoŭ-anojn fari konsciencan esploradon kaj detalan kalkulon por ekspluati la latentajn eblecojn en agrokulturo, forstado kaj bestbredado kaj surbaze de tio ellabori trijaran totalecan planon de konstruado por la jaroj de 1952 ĝis 1954. Aŭtune de 1952 Li Ŝunda ŝanĝis la trijaran planon en kvinjaran. Post la publikigo de la Ĝenerala Linio de la Partio dum la Transira Periodo, Li Ŝunda kaj aliaj vaste kolektis la opiniojn de la amasoj kaj ellaboris 15-jaran perspektivan planon de plenampleksa disvolvo de agrokulturo, forstado kaj bestbredado. Laŭ tiu plano, en la tuta areo, estos rezervitaj por kreskigi forstojn kaj porpaŝtajn herbojn la kalvaj montoj kun surfaco de 18,000 muoj; estos formitaj 300 muoj da fekundaj kampoj sur seka river-malprofundejo de pli ol 500 muoj; kaj estos grandkvante bredataj bonspeciaj ŝarĝ- kaj dom-bestoj, kortbirdoj kaj abeloj. Kiam estos plenumita tiu plano, Higoŭ estos loko plena de fruktarboj kaj kun svarmo da bovoj kaj ŝafoj, kaj la enspezo de ĉiu kamparano pliiĝos okoble ol en 1952.

ŜANĜO DE RIVER-MALPROFUNDEJO EN FEKUNDAJN KAMPOJN

Por efektivigi tiun grandan planon, en la vintro de 1952 Li Ŝunda kaj Ŝen Gilan, vicestrino de la kooperativo, gvidis la kooperativanojn komenci la batalojn por akiri kampojn de river-malprofundejoj kaj ŝtonoj, per hakado de montoj, kolektado de ŝtonoj kaj starigo de akvobarajoj. Pro manko de mono por aĉeti pulvon, ili uzis ŝtonfendigilojn, martelojn kaj ŝtalstangojn en la hakado de montoj; kaj ŝtonojn ili transportis homforte kelkope aŭ dekkelkope. Tiamaniere ili fine sukcesis konstrui sep muojn da kampo en 1953. Kaj en printempo de 1954, ili plie konstruis ŝtonan akvobarajon longan je ĉirkaŭ 600 futoj, kiu havigis al ili 70 muojn da fekunda kampo sur river-malprofundejo.

Ili estas kuraĝaj ne nur por batali kontraŭ solida roko kaj sovaĝa malprofundejo, sed ankaŭ por rezisti naturajn katastrofojn. En junio kaj julio de 1954, kvarfoje la akvobarajo estis difektita de akvego, kaj kvarfoje ili ĝin riparis. Iufoje la fluego estis tiel furioza ke la barajo falis parto post parto. "La akvego faligis nur la barajon, sed ne la homojn; kaj forportiĝis de la torento nur la ŝtonoj, sed ne la montoj," fidplene diris en tiu okazo komunisto kaj malriĉ-kamparano Ma Juhing. "Haku la montojn, kaj ni denove ricevos ŝtonojn. Havante homojn kaj ŝtonojn, ni havos ankaŭ barajon."

Tiuj vortoj kuraĝigis la kooperativanojn kaj ankaŭ plifirmigis la volon de Li Ŝunda ŝanĝi la fizionomion de la montvilaĝo apogante sin sur la amasoj. Li ankoraŭfoje petis konsilojn de la malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj el la membroj de la kooperativo, resumis la spertojn kaj lecionojn kaj ellaboris novan planon. La sekvintan tagon, denove leviĝis bruoj de homoj kaj ŝtonhakado sur la river-malprofundejo en Higoŭ.

Tagon post tago, la akvobarajo plilongiĝis kaj ankaŭ la kampoj plimultiĝis sur la river-malprofundejo. Kaj ĉiun jaron aperis novaj ŝtuparaj kampoj kaj riĉaj rikoltoj ĝojigis ĉiujn en rikolt-sezonoj.

KALVAJ MONTOJ KOVRATAJ PER NOVA VERDO

Por protekti la kampojn sur river-malprofundejo oni devas bridi la monttorentojn, kaj por bridi la monttorentojn oni devas reformi la montojn kaj kreskigi vastajn forstojn por verdigi la kalvajn montojn. Tiun sperton akiris Li Ŝunda kaj Higoŭ-aj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj en sia batalado por akiri kampojn. Sed estas ja malfacile verdigi la kalvajn montojn, sur kiuj neniam kreskis arboj. Unue, iuj opiniis ke tio estas vana foruzo de labortempo por afero, kiun neniu faris antaŭe. Sed Li Ŝunda kaj iuj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj diris: "Ni provu ankaŭ tion, kion neniam faris la antaŭuloj! Ni provu ĝuste tion, kion iuj opiniis neebla!" En 1952, ili unuafoje prisemis sur kalvaj montoj 300 muojn da tero per pinsemoj. Sed la semoj ĝermis tre malmulte en la printempo de la sekvinta jaro.

"300 muojn Li Ŝunda prisemis, sed nur unu pinarbido elkreskis!" ekmokis la kontraŭopiniantoj. Sed Li Ŝunda diris kun rideto: "Tio ja estas nesupereble bona afero, ĉar tiu sola pinarbido montras la veron ke arbo povas kreski sur la montoj de Higoŭ." Tiu vero rompis la malnovan

konkludon de neeblo de arbokreskigo kaj ekscitis la entuziasmon de la kooperativanoj por plantado de arboj. Ĉie sur la montoj, ili enterigis la semojn de espero. Eĉ sur la river-malprofundejo plena de ovalaj ŝtonetoj, ili alplantis unu apud alia pomarbidojn, kvankam por planti ĉiun arbidon ili devis forporti dekojn da korboj da ŝtonetoj por fosi kavon kun diametro de pli ol unu metro kaj poste alporti vekte teron de fore por plenigi ĝin kiel grundon kun aldono de sterkado kaj akvumado.

ĈIAMA SEKVADO DE LA INSTRUKCIOJ DE PREZIDANTO MAŬ

Li Ŝunda kaj la Higoŭ-aj malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj komencis suriri la vojon de kolektivigo laŭ la instrukcio **"organiziĝu"** donita de Prezidanto Maŭ. Dum la tuta procezo de kolektivigo ili solvis la alfrontitajn problemojn ankaŭ ĉiam laŭ la direktivoj de Prezidanto Maŭ. Ili kredas, ke ĉiu vorto de Prezidanto Maŭ estas vero kaj ĉiu lia frazo egalvaloras al dek mil frazoj de aliaj. Ili komprenas el sia propra sperto ke la baza kialo de ĉiuj iliaj progresoj estas la revoluciigo de ilia ideologio kaj la sciado solvi la kontraŭdirojn laŭ la vortoj de Prezidanto Maŭ.

En 1953, kiam la kooperativo ĵus fondiĝis, aperis antaŭ ili multaj problemoj. Tiam Li Ŝunda kaj aliaj kadroj de la kooperativo studis la verkon de prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiroj*. El tiu brila verko, ili lernis ke por solvi problemojn oni devas kapti la ĉefan kontraŭdiron, kaj trovis ke la radiko de ĉiuj problemoj de la kooperativo estas la kontraŭdiro inter la vojo socialisma kaj la vojo kapitalisma. Cele al solvo de tiu ĉefa kontraŭdiro, ili multe klarigis inter la kooperativanoj la superecon de socialismo kaj kolektiva ekonomio. Kun la leviĝo de la socialisma konscio de la amasoj, la aliaj neĉefaj problemoj estis solvitaj jam relative facile.

Sen revolucia politika kaj ideologia laboro, estas neebla antaŭensalto en produkto. Ankaŭ pri tio la kadroj kaj amasoj en la Higoŭ-a produkta brigado havas profundan komprenon el persona sperto. Depost la fondiĝo de la kooperativo en 1952, la pomua meznombra produkto de greno senĉese kreskis, kaj en 1956 ĝi jam atingis 200 kilogramojn. Sed post tiam, dum la ok jaroj de 1956 ĝis 1963, ĝi tamen fariĝis preskaŭ stagna variante inter 200 kaj 235 kilogramoj kaj ne plu progresis. Ĉu vere "la produkto jam atingis la ekstremon"? Ne. Li Ŝunda kaj Ŝen Gilan informis la kamparanojn pri la atingoj de Daĝaj kaj aliaj novaj progresintaj agrokulturaj unuoj kaj mobilizis ilin lerni de Daĝaj kaj kuratingi ĝin. Sed multaj el la kamparanoj opiniis, ke en tiu montregiono la pomua produkto de pli ol 200 kilogramoj estas jam ne malbona. Iu eĉ diris: "Nia Higoŭ estas malnova modelo kun historio de pli ol 20 jaroj. Troviĝas ĉe ni jam tiom da honordiplomoj kaj honorflagoj. Lasu la aliajn veni ĉi tien kaj lerni de ni!" Sen pli alta celado, kompreneble ne povis esti volo de penado, nek eltrovo de novaj rimedoj, kaj de kie, tiam, povus veni pli alta produkto?

Vidinte ke aperis ĉe iuj klasaj fratoj memkontento pri la jamaj atingoj kaj analizante laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ pri klasoj kaj klasbatalo, Li Ŝunda, tiu malnova komunisto kiu aliĝis al la Partio en 1938, konkludis ke ilia penso estas speguliĝo de la ankoraŭ neradikale remuldita ideologio de et-kamparana ekonomio. Kiam

Kamarado Li Ŝunda (staranta) diskutas pri aktualaj taskoj kune kun la revoluciaj ribeluloj, malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Higoŭ-brigado.





Kamarado Li Ŝunda iras en intimeco al terkultura laboro kun proletaj revoluciuloj, malriĉaj kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

la vivo boniĝis, formalaperis jam la ideo de senĉesa revoluciado kaj estas forgesita la fakto ke ankoraŭ grandaj nombroj da klasaj fratoj suferas subpremadon en la mondo. Se tia penso ne estos korektita, Higoŭ ne nur ne povos lerni de Daĝaj kaj daŭre disvolviĝi, sed eĉ alfrontos la danĝeron forgesi sian originon kaj ŝanĝi sian koloron. Tial, Li Ŝunda diskutis la problemon kun la membroj de la partia filio, kaj la partia filio organizis la kadrojn kaj kamparanojn studi la instruojn de Prezidanto Maŭ pri klasoj kaj klasbatalo kaj la dokumentojn de la Partio pri subigo de memkontenteco kaj energio-malstreĉiĝo. Ili ankaŭ organizis pli ol 120 personojn por viziti entute ok fojojn Daĝaj kaj aliajn progresintajn unuojn por trovi siajn mankojn en laboro kompare kun tiuj unuoj kaj ekspluati siajn latentajn fortojn. Krome ili ankaŭ aranĝis ekspozicion pri familiaj historioj kaj la vilaĝa historio de Higoŭ.

La kadroj kaj kooperativanoj ricevis de la instruoj de Prezidanto Maŭ profundan edukon, lernis de la progresintaj faroj de Daĝaj kaj aliaj revolucian spiriton, kaj levis sian klasbatalan entuziasmon pere de memorigo de la mizerplena historio de siaj vilaĝo kaj familioj. Tiel leviĝis en Higoŭ-a produkta brigado alta tajdo por lerni de Daĝaj kaj kuratingi progresintojn. Ili solide laboris unu tutan jaron. La pomua produkto de greno tuj saltis ĝis 300.5 kilogramoj, t. e., plimultiĝis je pli ol 80 kilogramoj ol tiu en 1963.

Nun, la elstarigo de politiko kaj la ideologia laboro fariĝis jam konstanta tasko en Higoŭ. Stariĝis tie vico de politikaj laborantoj kun sufiĉe da politikaj legaĵoj kaj necesaj propagandaj rimedoj. Krom la komunistoj kaj anoj de la Komunisma Junulara Ligo, sin trovas en la brigado 56 politikaj laborantoj, 47 ĵurnalo-voĉlegantoj, 12 disaŭdigaj laborantoj, 30 verkantoj kaj 40 historiorakontantoj. En Higoŭ estas pli ol 1000 ekzempleroj de *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, *Elektitaj Legaĵoj el Verkoj de Prezidanto Maŭ* kaj apartaj eldonoj de verkoj de Prezidanto Maŭ, 45 ĵurnaloj kaj gazetoj, pli ol 1,000 ekzempleroj de aliaj ruĝaj legaĵoj. Ili havas 24 nigratabulajn gazetojn kaj 12 disaŭdigajn laŭtparolilojn. Tiuj vicoj de politikaj laborantoj fariĝis sturma forto por propagandi la penson de Maŭ Zedong kaj antaŭenpuŝi la ideologian revoluciigon de la komunumanoj.

Dank' al la brila lumo disradianta de la penso de Maŭ Zedong, la Higoŭ-aj komunumanoj ĉiuj zorgas pri la aferoj de la kolektivo, ŝtato kaj mondo, kaj firme starigis en si la penson kulturi teron pro revolucio. Prave diris la komunumano Jang Ĉanghing: "Ni estas novaj socialismaj kamparanoj kaj tio, kion ni faras, estas socialisma agrokulturo. Ni devas havi en nia koro idealon noblan kaj grandan. La vorto 'nobla' aludas komunismon kaj la vorto 'granda' aludas la tutan mondon. Tiel ni povas havi en ni dum terkulturado neelĉerpeblan energion."

Jes, Li Ŝunda kaj la Higoŭ-aj popolanoj ja estas tiaj homoj kun idealo nobla kaj granda kaj energio neniam elĉerpebla, kiuj kuraĝe marŝas antaŭen sur la granda vojo de socialismo, firme sekvante la vortojn de Prezidanto Maŭ.

Vivu la Spirito de Liu Hulan



Surskribaĵo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ por martirino Liu Hulan: **"Vivo Granda, Morto Glora"**




La patro de Liu Hulan rakontas al la junaj revoluciuloj historion pri Liu Hulan. (*maldekstre*)

"Ni lernos de Liu Hulan kaj farigos daŭrigantoj de la proleta revolucia afero!" (*dekstre*)

Revoluciaj amasoj vizitas la lokon, kie Liu Hulan kaj aliaj ses martiroj heroe oferis sian vivon. (*malsupre*)







Komunumanoj de Hulan-komunumo studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*.

Milicaninoj de la subplotono "Hulan" faras ekzercon.



LIU FANG:

La Eminenta Komunisto— Liu Hulan

La 1-a de julio de la kuranta jaro estos la 46-a datreveno de la fondiĝo de la granda, glora, korekta Komunista Partio de Ĉinio.

La Komunista Partio de Ĉinio estas proleta revolucia partio armita per marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong. La venko de la ĉina revolucio estas venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

Dum la pasintaj 46 jaroj, ĉiufoje, kiam la ĉina revolucio sin trovis en grava momento de batalo inter du sortoj, du estontecoj, du vojoj kaj du linioj, ni povis tramarŝi densan nebulon, reĝustigi la navigacian direkton por ke nia revolucia ŝipego ĉirkaŭpasu sennombrajn danĝerajn malprofundaĵojn kaj rifojn, kaj venke puŝiĝu antaŭen tra ondegoj laŭ la vojo de marksism-leninismo, ĉar la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo havas tian genian revolucian direktiliston kia kamarado Maŭ Zedong kaj la grandan penson de Maŭ Zedong kiel orientilon.

Dum la pasintaj 46 jaroj, sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la eminentaj gefiloj de la ĉina nacio kaj la eminentaj membroj de la Komunista Partio de Ĉinio spertis longdaŭran revolucian militon, oferis siajn sangon kaj vivon, aro post aro brave batalis kaj fine gajnis la hodiaŭan venkon. Ĉu ni povas permesi al la plej granda enpartia potenctenanto, kiu iras la kapitalisman vojon, la ĉina Ĥruŝĉov, uzurpi la revolucian frukton akiritan per la sango de la revoluciaj martiroj? Ne, absolute ne!

Prezidanto Maŭ diris: **"Miloj post miloj da martiroj antaŭ ni heroe oferis sian vivon por la interesoj de la popolo. Ni alte tenu ilian standardon kaj marŝu antaŭen laŭ la vojo surverŝita de ilia sango!"**

La juna komunisto Liu Hulan faris firman batalon kontraŭ la malamikoj. Post sia aresto ŝi heroe kaj aplombe martiriĝis sub la fojntranĉilego de la malamikoj. Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ laŭdis la junan kaj grandan komunisman batalantinon — kamaradinon Liu Hulan per sia manskribaĵo: **"Vivo Granda kaj Morto Glora".**


En la movado de la granda proleta kultura revolucio de nia lando, la revoluciaj amasoj kaj revoluciaj kadroj heredis kaj disvolvis la ribelan spiriton de la revoluciaj martiroj, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, plenforte ribelas kontraŭ la plej granda potenctenanto, kiu iras la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio, kaj la manpleno da kontraŭrevoluciaj reviziistoj subtenata de li, furante ĝisfunde ekstermi ĉiujn fiinsektojn, por ke la socialisma Ĉinio neniam ŝanĝu sian koloron kaj la senlime brila penso de Maŭ Zedong prilumu la tutan mondon!

La Red.

Je la 8-a de oktobro 1932, Liu Hulan naskiĝis en kamparana domo de Junĝoŭhi-vilaĝo, Venŝujgubernio de Ŝanhi-provinco. Ŝi estis nur 15-jara, kiam ŝi martiriĝis en januaro 1947. En januaro de la kuranta jaro ni havis la 20-an datrevenon de ŝia glora martiriĝo.

LA INFANAĜO DE LIU HULAN

Liu Hulan pasigis siajn infanjarojn en la ŝtormo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. En 1937, kiam Liu Hulan estis sepjara, eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito. La Laborist-Kamparana Ruĝa Armeo de Ĉinio reorganiziĝis en la Okavojan Armeon. Laŭ la ordono de Prezidanto Maŭ kaj de CK de KPĈ, kaj kun la espero de la nacio, ĝi ekmarŝis de la nordo de Ŝenhi, transpasis la Flavan Riveron kaj venis al la fronto de Ŝanhi-provinco por ekstermi la malamikon.



(Traduko:) Vivo Granda kaj morto glora — surskribo de Maŭ Zedong

Ankaŭ Liu Hulan en infanaĝo skuiĝis pro la ŝtormo kontraŭ Japanio. Ŝia amikineto Liu Fang estis tre saĝa knabino. En la komenco, Liu Fang instruis al ŝi kantojn pri la rezisto kontraŭ Japanio, kaj poste ŝi ofte instruis al ŝi skribi "Prezidanto Maŭ", "Batalu kontraŭ Japanio", "Okavoja Armeo" ktp. Liu Fang ankaŭ rakontis al ŝi historiojn pri atakoj fare de la Okavoja Armeo kontraŭ la japanaj agresantoj. Tiamaniere Liu Hulan iom post iom komprenis la rezistadon kontraŭ Japanio por savi la patrion.

Postnelonge, ŝi ekkonis iujn Japanio-rezistajn laborantojn. Kaj kun la paso de tempo, ŝi aŭdis ĉiam pli multe pri la neceseco de la revolucio kaj la rezisto kontraŭ Japanio. Pro tio, la nomo de kamarado Maŭ Zedong — la granda gvidanto de la ĉina popolo, gravuriĝis profunde en ŝia cerbo.

Ekde tiu tempo, Liu Hulan fojrefoje gardstaris por kadroj, kiuj kondukis revolucian aktivadon en la vilaĝo Junĝoŭhi.

En la rigoraj militaj jaroj, Liu Hulan propraokule vidis, ke la popolo de la vilaĝo Junĝoŭhi heroe kaj persiste batalis kontraŭ japanaj diabloj, naciperfiduloj kaj bienuloj. Por ŝirmi la distriktestron, la malgranda kuriero Vang Ŝihin preferis morton ol submetiĝon, kaj mortis pro skurĝado fare de malamikoj; por ŝirmi Japanio-rezistajn laborantojn, onklino Li Jufang spitis la atakon de japana dogo, kiu ŝin vundis kaj sangfluigis. La sentimeco de la herooj kaj bestaj kruelaĵoj de la malamikoj komprenigis al Liu Hulan la bonon kaj malbonon, amon kaj malamon.

SUR LA REVOLUCIAN VOJON

En aŭgusto 1945, la japanaj agresantoj kapitulacis. Post la okjara sanga rezistmilito, la

ĉina popolo finfine gajnis la finan venkon. La Okavoja Armeo reprenis la gubernian urbon Venŝuj.

Kiam la malamo kontraŭjapana ankoraŭ ne estingiĝis, novaj malamikoj venis. La reakciaj trupoj de Ĉiang Kajŝek kaj Jan Hiŝan, kiuj fuĝis kaj sin kaŝis dum la okjara Kontraŭjapana Rezistmilito, nun tamen intencis rabi de la popolo la frukton de la venko, kaj en septembro tiujare, la reakciaj trupoj de Jan Hiŝan okupis la gubernian urbon de Venŝuj.

Por kontentigi laboran bazonon de nove starigitaj liberigitaj regionoj, la Venŝuj-gubernia Komitato de KPĈ decidis fondi trejnan kurson por virinaj kadroj en Guangiabaŭ okcidente de Fenherivero, kaj Liu Hulan partoprenis la kurson.

En sia infanaĝo Liu Hulan ne vizitis lernejon. Ŝi diligente lernis kun mirigaj persisteco kaj volo, utiligis ĉiun liberan momenton por lerni skribadon, se ŝi ne scipovis skribi iun ideografiaĵon, ŝi faris signon por poste peti de aliaj helpon. Nokte, kiam ĉiuj aliaj ripozis, ŝi ankoraŭ lernis sola sub olelampo ĝis profunda nokto.

En la kurso, Liu Hulan jam havis profundan amon al verkoj de Prezidanto Maŭ kaj ĵuris fari sin tia homo kiaj Bethune kaj Ĝang Side.

La kursanoj ankaŭ partoprenis la batalon kontraŭ naciperfiduloj kaj tiranoj ĉe la vilaĝo Guangiabaŭ. Dank' al la lernado kaj la praktikado de klasbatalo Liu Hulan multe altigis sian klasan konscion kaj komencis starigi revolucian mondkoncepton.

Nelonge post la fino de la kurso, reakciaj trupoj de Jan Hiŝan komencis grandskale invadi la liberigitan regionon. Dum la batalado, Liu Hulan tuttage okupiĝis pri mobilizado de virinoj fari ŝuojn, transporti grenon por la revoluciaj armeanoj, kaj flegi vunditojn ktp.

En februaro 1946, Liu Hulan partoprenis batalon ĉe Dongĝuang-vilaĝo. Ĉe la fronto ŝi preparis manĝaĵojn kaj boligis akvon por batalantoj. La brava kaj sentima spirito de la popolaj batalantoj kortuŝis ŝin profunde. Kaj riskante sian vivon, ŝi fojrefoje eskortis vunditojn ĝis la finiĝo de la batalo.

STURMO POR LA REVOLUCIO

La revolucia ŝtormo alruliĝis, la granda movado de agrara reformo en la liberigitaj regionoj komenciĝis.



Statuo de la martirino Liu Hulan

Por mobilizi la amason, Liu Hulan disvolvis batalon kontraŭ Ŝi Tingpu, granda bienulo en Junĝoŭhi-vilaĝo. En nokto, ŝi venis en la domon de dungito-kamparano Liu Maer kaj mobilizis lin batali kontraŭ la bienulo. Liu Maer estis maljuna jardungito de Ŝi Tingpu kaj la plej malriĉa en la tuta vilaĝo. Se li konsciiĝos, la krimoj de Ŝi Tingpu ja povos esti ĝisfunde malkaŝitaj, kaj tio ankaŭ kuraĝigos multajn aliajn partopreni la batalon. Sed, Liu Maer estis malkuraĝa kaj malriskema homo. Vidinte lian hezitadon, Liu Hulan unue faris al li klasbatalan edukon, dirante: "Havante la subtenon de la savanto Prezidanto Maŭ kaj de la Komunista Partio, nenion ni mal-

riĉuloj timas, se nur ni unuiĝas. Kalkulu, onklo, unu jaron da plenlaborego vi ricevis de la bienulo nur 70 litrojn da fabo. Kiom da jaroj Ŝi Tingpu ekspluatis nin malriĉulojn! Ĉu vi volontas esti ekspluatata?" Ĉiuj vortoj de Liu Hulan tuŝis la koron de la maljuna jardungito, kaj Liu Maer iom post iom konsciiĝis. Li indigne diris: "Kun la subteno de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio al ni malriĉuloj, nenion mi timas, mi nepre likvidos la konton kun Ŝi Tingpu."

En la kontraŭbienula mitingo, fingromontrante la nazon de la bienulo, la maljuna jardungito eldiris siajn suferojn kaj malkaŝis krimagojn de Ŝi Tingpu. Liu Maer ankoraŭ movis multajn malriĉulojn-fratojn partopreni la batalon.

En la mitingo, Liu Hulan kuraĝe elstaris kaj kondukis bravan batalon por ĝisfunda liberiĝo de malriĉuloj.

En la ŝtormo de klasbatalo, Liu Hulan honore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio.

En la komenco de junio, subtenate de la usona imperiismo reakciaj trupoj de Ĉiang Kajŝek lanĉis ĉiuflankan kaj furiozan ofensivon kontraŭ la liberigita regiono. Nigraj nuboj tuj vualis Venŝuj-gubernion.

La venŝuj-gubernia Komitato de KPĈ decidis tuj mobilizi la amasojn por aktive prepari militon, kaj organizi armitajn laborbrigadojn por bati la malamikojn. Kiam la gubernia komitato proklamis ke Liu Hulan transiĝu sur monton, ŝi firme diris: "Mi ne povas transiĝi sur monton, mi ne povas forlasi la amason de Junĝoŭhi-vilaĝo. Ju pli malfacila estas la stato, la komunistoj des pli devas esti kun la amaso." Fine, la gubernia komitato konsentis, ke Liu Hulan restu por daŭre labori en la vilaĝo. La sekretario de la gubernia komitato persone interparolis kun ŝi, dirante: "Kamaradino Hulan, vi devas esti ĉiam preta alfronti malfacilan cirkonstancon. Se vi estos kaptita de malamikoj, vi nepre tenu la noblan kvaliton de komunisto. La Partio kredas ke tion vi povos."

Liu Hulan kapjesis kaj decideme diris: "Estu certa, ke mi nepre agos laŭ la vortoj de Prezidanto Maŭ, mi venkos ĉiujn malfacilojn kaj timos nek sangadon nek vivoferon."

En la tre malfacila batala cirkonstanco, ŝi ĉie influis la aliajn per siaj modelaj agoj, antaŭ ĉio konsideris la sekurecon de la klasfratoj kaj neniam pripensis la sian. Nokte ŝi ofte vivriske sendis al partianoj de najbaraj vilaĝoj sloganojn, flugfoliojn kaj leterojn.

Tiel tagnokte Liu Hulan persistis en la batalo.

BONA PARTIANO DE PREZIDANTO MAŬ

Je la 12-a de januaro 1947, Liu Hulan ricevis instrukcion de la Partio, ke ŝi tuj forlasu Junĝoŭhi-vilaĝon. Sed reakciaj trupoj de Jan Hiŝan subite sieĝis la vilaĝon kaj metis gvatantajn soldatojn ĉe ĉiuj stratbuŝoj kondukantaj eksteren. Trarompi la sieĝon estis tre malfacila.

Post kiam la malamikoj eniris la vilaĝon, barbulo Ĝang Kjuanbaŭ, speciala sendito de la 1-a bataliono de la reakcia armeo de Jan Hiŝan, ordonis siajn soldatojn kaj lakeojn de bienuloj peli popolanojn el domo post domo por kunveno antaŭ la templo.

Samvilaĝanoj konsilis Liu Hulan kaŝiĝi kaj nepre ne iri al la kunveno. Sed Liu Hulan pensis en si: Se la malamikoj volas buĉi, tion la komunisto devas elteni sed ne kaŭzi suferon al la samvilaĝanoj. Ne, nepre ne.

Kun levita kapo kaj firma paŝo Liu Hulan iris al la placo sude de la vilaĝo.

Liu Hulan sin ŝovis en la homamason. Dum la ĥaoso, kiam malamikoj kaptis homojn, ŝi iris apud sian patrinon. Ŝi demetis de sia fingro ŝatatan ringon, elpoŝigis uzitan sed puran naztukon, kaj donis ilin al la patrino. Ŝi rigardis la bonaniman vizaĝon de sia patrino, kaj aplomba rideto aperis sur ŝia vizaĝo, kvazaŭ ŝi volis diri al la patrino, ke ŝi firme decidis renkonti la novan provon.

Ĝuste tiutempe, malamikoj elkonis Liu Hulan inter la homamaso, kaj kelkaj el ili furioze trenis ŝin antaŭen. Vidinte Liu Hulan, la barbulo rondigis siajn okulojn kaj kriegis: "Kiu mortigis la vilaĝestron?"

Liu Hulan simple respondis: "Mi ne scias!"

"Kiajn laborojn vi faris por la Okavoja Armeo?"

"Ĉiajn laborojn mi faris!" respondis Liu Hulan senhezite.

"Nun iu konfesis, ke vi estas komunisto."

"Vi diris ke mi estas komunisto, mi ja estas komunisto! Kion vi volas fari al mi?" Plena de justecsento, Liu Hulan demandis la barbulon.

"Ankoraŭ kiuj estas komunistoj en via vilaĝo?"

Liu Hulan decideme respondis: "Nur mi!"

La barbulo saltis de eksploda kolero kaj muĝis per tuta gorĝo: "Estante nur dekkelkjara, ĉu vi ne timas morton?"

Liu Hulan laŭte diris: "Se mi timus morton, mi ne estu komunisto."

Kontraŭ la dekkvinjara komunisto, la barbulo povis trovi nenian rimedon. Eĉ en sonĝo li ne imagis ke Liu Hulan estas tiom firmvola. Li eksvingis sian manon kaj diris: "Fojntranĉilegon!"

Liu Hulan iris al tranĉilego kaj haltis 5-6 paŝojn for de ĝi. Ŝi indigne rigardis la gregon de ekzekutistoj, kaj ŝia koro pleniĝis de senlima malamo.

En la homamaso leviĝis tumulto, la samvilaĝanoj puŝiĝis antaŭen, laŭte kriante "Ne mortigu la senkulpan!" La barbulo konfuziĝis kaj kriaĉis: "Direktu maŝinpafilon ĉi tien kaj pafbalau ĉiujn for!"

Liu Hulan laŭte kriis: "Ne mortigu la vilaĝanojn, mortigu min solan." Kaj ŝi aplombe paŝis al la fojntranĉilego. Falis la klingo de la tranĉilego de la krimuloj por buĉi revoluciulojn.

Liu Hulan — la eminenta filino de la ĉina nacio kaj eminenta partiano eledukita de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio oferis sian junan vivon por la liberiga afero de la ĉina popolo kaj la komunisma afero.

La revolucia spirito de Liu Hulan vivos por ĉiam en la koro de la popolo!

Revolucia amaso vizitas la memorigan domon de Liu Hulan.



La Historia Fono de la Tri Eldonoj de la Nigra Libro "Memkulturo"

LA verko *Memkulturo*, kiun zorgeme ellaboris la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, estas granda cent-pocente venena herbo. Ĉi tiu libro estas pura trompo; ĝi forlasas la realan klasbatalon, la revolucion kaj politikan batalon kaj silentas pri tio, ke la radika problemo de revolucio estas tiu de regpotenco, kaj silentas pri la problemo de diktaturo de la proletaro, sed distrumpetas la ideisman teorion de memkulturado, ĉirkaŭparole pledas por burĝa individuismo kaj sklavismo kaj oponas kontraŭ marksismleninismo kaj la penso de Maŭ Zedong.

En la pasintaj pli ol dudek jaroj, ĉiufoje kiam la ĉina revolucio troviĝis en kriza momento, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon eldonigis tiun ĉi libron, por ataki malice nian plej grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, oponi freneze kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la granda revolucia batalo gvidata de la Partio.

LA UNUA ELDONO

En julio 1939, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon la unuan fojon elmetis ĉi tiun grandan venenan herbon *Memkulturo*, kiam li faris raporton en la Instituto de Marksism-leninismo, Jan-an.

Tiutempe, la japanaj agresantoj okupis pli ol duonon de Ĉinio. La Komunista Partio de Ĉinio gvidis la tutan popolon fari la heroan rezistan militon. Dume, Kuomintango sub Ĉiang Kajŝek aktive kovadis splitigon de la nacia unuecfronto kontraŭ Japanio, ĝi estis aktiva en opono kontraŭ komunismo, sed pasiva en batalo kontraŭ la japana imperiismo kaj intrigis por kapitulaci al la japanaj agresantoj. La imperiismaj Usono, Britio kaj Francio konspiris inter si por fari "Munkenan" intrigon en la oriento por devigi Ĉinion al kapitulaco. En la Partio, kvankam la dekstra kapitulacisma linio, kiun fervore efektivigis la dekstra oportunistaro reprezentata de Vang Ming, estis severe kritikita en la Sesa Plena Sesio de la Sesa Centra Komitato de la Partio, tamen ĝia influo ankoraŭ ne estis tute likvidita. Ĉiam pli disvolviĝis la danĝero de kapitulaco, splitiĝo kaj regreso en la nacia unuecfronto kontraŭ Japanio.

En la situacio, ke la nacia krizo estis tre serioza, kaj la klasa kontraŭdiro tre komplika, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la politikan sloganon **"Persistu en la rezistado, oponu kontraŭ kapitulaco; persistu en unuiĝo, oponu kontraŭ splitiĝo; persistu en progresado, oponu kontraŭ regreso"**, kondukante pinto-kontraŭpintan batalon kontraŭ la kapitulacaj kaj kontraŭkomunismaj aktivadoj de Kuomintango; difinis la ĝustan politikon por la unuecfronto persisti ĉe la **"principo de sendependeco kaj memstareco", "kaj unuiĝi kaj batali", kaj "efektivigi unuiĝon per batalo"**; alvokis la tutan Partion senrezerve mobilizi la amasojn, plivastigi la liberigitan areon kaj popolan armeon en la regiono okupata de la japana imperiismo, kaj preni sur sin la grandan historian taskon de akirado de la venko de la rezistmilito kaj la turnado de tiu venko en venkon de la popolo.

Sed en koluzio kun la dekstra oportunisto Vang Ming, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon senbride distrumpetis kaj praktikis la linion de klasa kapitulaco, malkaŝe pledis por kapitulaco al Kuomintango kaj staris kontraŭ la ĝusta linio de Prezidanto Maŭ.

Ĝuste en tiu kriza momento de la revolucio, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon eldonigis sian malbonfaman libraĉon *Memkulturo*, en kiu li tute ne parolis pri la tiama situacio de revolucia babalo, tute ne parolis pri senrezerva mobilizo de amasoj por faligi la japanan imperiismon kaj savi la nacion el la danĝero de pereo, ,tute ne parolis pri opono kontraŭ la kontraŭkomunismaj kaj porkapitulacaj intrigoj de Kuomintango, tute ne parolis pri la gvida rolo kaj la politiko de sendependeco kaj memstareco de nia Partio en la unuecfronto, kaj tute ne parolis pri la principa batalo kontraŭ la dekstra kapitulacismo interne de la Partio. Kontraŭe, en sia *Memkulturo* li multe parolis pri la doktrinoj de Konfucio kaj Menfucio, pri la burĝa memkulturado. Tio estas kontraŭrevolucia kapitulaca deklaro kaj teoriaĉo de "memkulturado" pereiga por la Partio kaj ŝtato.

LA DUA ELDONO

En aŭgusto 1949, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon reviziis la reakcian libron *Memkulturo* kaj ĝin eldonigis en granda kvanto.

Tiam, la Liberiga Milito estis baldaŭ gajnonta la venkon tra la tuta lando, kaj la ĉefa problemo kuŝanta antaŭ la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo estis: Kien direktu sin Ĉinio post la venko de la demokratia revolucio en la tuta lando? Ĉu ĝi iru la vojon kapitalisman aŭ la vojon socialisman? Pri ĉi tiu radika problemo disvolviĝis intensa kaj komplika batalo inter la proletaro kaj la burĝaro.

En la antaŭvespero de la venko de la revolucio tra la tuta lando, Prezidanto Maŭ montris en la Dua Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Partio, en marto 1949, ke la fundamenta kontraŭdiro en la lando post la venko tra la tuta lando estos **"la kontraŭdiro inter la laboristaro kaj la burĝaro"**, kaj elmetis la taskon **"firmpaŝe transformi Ĉinion el lando de agrokulturo en landon de industrio kaj konstrui Ĉinion en grandan socialisman landon"**. Poste, Prezidanto Maŭ konkludis: **"Kien iros Ĉinio post kiam la popolo renversos la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo? Al kapitalismo aŭ al socialismo? Multaj homoj ne havas klaran ideon pri ĉi tiu demando. Sed la faktoj jam respondis ĝin: Nur socialismo povas savi Ĉinion."**

La enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, tamen, bruis laŭte por la malo, tutforte distrumpetante pri "firmigo de la ordo de nov-demokratio". Iufoje en kunveno, li eĉ difinis, ke la kompartianoj devas "batali por firmigi la ordon de nov-demokratio". Li kriaĉis, ke "kapitalismo ne estas tro multa, sed tro malmulta en Ĉinio", ke estas necese "fari kompanion" kun la burĝaro "por 10 ĝis 15 jaroj", kaj eĉ ke oni "lasu la kapitalistojn ekzisti kaj disvolviĝi ankoraŭ dekojn da jaroj"; li prilaŭdis la burĝaron dirante ke "ekspluato estas merito" kaj "ekspluato estas laŭleĝa ago"; li distrumpetis "longtempan konservon de la riĉkamparana ekonomio" kaj pledis por la "kvar grandaj liberoj" por disvolvi kapitalisman ekonomion en la kamparo. Per ĉiuj fortoj li pledis por la disvolvo de kapitalismo, t.e., en efektiveco, returni Ĉinion sur la malnovan vojon de duonkolonio kaj duonfeŭdismo.

En la reviziita eldono de sia libro *Memkulturo*, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon, tamen, silentis pri tio, ke la radika problemo de revolucio estas la problemo de regpotenco, kaj silentis pri la granda batalo de la ĉina popolo por kapti regpotencon kaj pri la diktaturo de la proletaro; kontraŭe, li forstrekis la tutan paragrafon pri "disvolvado de nia penso en politiko", kiu troviĝis en ĝia unua eldono 1939, ja por pli forte paralizi la revolucian batalvolon de la komunistoj kaj la revolucia popolo kaj deturni ilian atenton por ke ili forlasu la aktualan klasbatalon, la revolucion kaj la politikan batalon, tiel ke la burĝaro povu uzurpi la fruktojn de la venko de la popola revolucio. Jam en la tempo post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, li prilaŭdis per sia tuta forto parlamentan demokration kriante pri "sukcesigo de la demokratia revolucio sen enlanda milito, kaj pri tio, ke la fundamenta sukceso estos la starigo de konstitucio, establo de parlamento kaj fondo de parlamenta ŝtato".

En la batalo inter la du klasoj kaj inter la du vojoj, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon malkaŝe staris sur la reakcia pozicio de la burĝa klaso, vane intencante fondi burĝan respublikon, efektivigi en Ĉinio la diktaturon de la burĝaro kaj iri la kapitalisman vojon. La ankoraŭfoja eldonigo de la *Memkulturo* ja celis doni ideologian kaj teorian bazon por disvolvi kapitalismon en Ĉinio.

LA TRIA ELDONO

En aŭgusto 1962, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon la trian fojon eldonigis en granda kvanto sian *Memkulturon*.

Prezidanto Maŭ diris: **"Por renversi regpotencon estas ĉiam necese, unue, krei publikan opinion, fari laboron en la ideologia sfero. Tiel agas la revolucia klaso, kiel ankaŭ la kontraŭrevolucia klaso."**

Reeldonigante ĉifoje sian *Memkulturon* en granda kvanto, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon ja vane celis krei publikan opinion por la restarigo de kapitalismo.

Sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado en nia lando akiris ekstreme brilan sukceson. Ĉirkaŭ 1962, pro la subfosado de la sovetuniaj reviziistoj kaj la gravaj naturaj katastrofoj dum tri sinsekvaj jaroj, nia lando suferis portempan malfacilon en ekonomio. Profitante la okazon, la reakciaj fortoj en kaj ekster la lando lanĉis furiozan atakon kontraŭ nia partio kaj la socialisma sistemo de nia lando. Ĝuste en tiu tempo, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon reeldonigis, post sekreta planado kaj atenta reviziado, la *Memkulturon*, kiu servis kiel deklaro por intrige efek-

tivigi kontraŭrevolucian restarigon de kapitalismo en Ĉinio.

Ĉirkaŭ la jaro 1962, profitante la portempan malfacilecon en ekonomio de nia lando, la modernaj reviziistoj reprezentataj de la Ĥruŝĉov-kliko de Sovetunio energie disvolvis kontraŭĉiniajn aktivadojn kune kun imperiismo kaj diverslandaj reakciuloj. Ili freneze atakis niajn tri ruĝajn flagojn, malice kalumniis nian partion kaj Prezidanton Maŭ pri "dogmismo", "sektismo" "skismismo" ktp. En tiu tempo, ruliĝis nigraj nuboj kaj ekblovis ĉie demonaj ventoj. Sub la gvidado de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Maŭ, nia popolo firme batalis kontraŭ tiu kontraŭrevolucia kontraŭfluo kaj frakasis iliajn frenezajn atakojn unun post alia.

Sed, en sia reeldonita *Memkulturo*, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon per neniu vorto parolis pri opono kontraŭ imperiismo kaj moderna reviziismo, male, kunage kun alilandaj modernaj reviziistoj, li febre atakis la tiel nomatajn "dogmismon" kaj "maldekstran oportunismon". En la unua eldono de tiu libro tute ne estis la vorto "dogmismo", kiu estis intence aldonita kaj forte atakata en 1962. Tio estis evidente furioza atako kontraŭ la penso de Maŭ Zedong kaj Prezidanto Maŭ mem, kunage kun la reakciaj fortoj internaciaj.

Krome, en kunagado kun Ĥruŝĉov, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon forte atakis Stalin. Li ŝanĝis la frazon en la libro "Kiel Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, oni devas en diversaj flankoj altigi siajn kvalitojn kaj fariĝi unu el iliaj plej bonaj lernantoj" en "oni devas tiel lerni de Marks kaj Lenin iliajn ideologion kaj kvalitojn kaj fariĝi bona lernanto de Marks kaj Lenin". Por kontentigi la bezonojn de Ĥruŝĉov-reviziismo li forstrekis la nomon de Stalin, vane provante neigi ke Stalin estas **"granda marksist-leninisto"** kaj publike oponante kontraŭ la takso farita de Prezidanto Maŭ pri Stalin. Cetere, la sovetunia reviziisma kliko jam delonge perfidis la revolucian aferon de la internacia proletaro, tamen, li fervore laŭdaĉis en tiu eldono de *Memkulturo* la "sukceson de la socialisma konstruado en Sovetunio" kaj ke "socialismo jam gajnis grandan sukceson en Sovetunio — sesono de la tero".

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **Post la baza efektiviĝo de la socialisma transformado de posedsistemo, "klasbatalo ankoraŭ ne finiĝis. La klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klasbatalo en ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj."** Plenmano da reakciaj elementoj, kiuj havas malamikan senton kontraŭ nia ŝtato, **"ne ŝatas nian ŝtaton kun diktaturo de la proletaro, ili inklinas al la malnova socio. Je favora okazo, ili tuj aktivas por faligi la komunistan partion kaj restarigi la malnovan Ĉinion."**

En 1962, kiam enlande ĉiuspecaj demonoj kaj diabloj, dekstraj oportunistoj kaj dekstruloj ekblovis la venton de "renverso de verdikto" kaj "individua entreprenado", kaj furioze atakis la Partion kaj socialismon, la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon per sia reeldonita *Memkulturo* pliapaŝe atakis kaj kalumniis malice la batalon de nia partio kontraŭ la dekstra oportunismo, malkaŝe subtenis la dekstrajn oportunistojn en ilia renverso de la verdiktoj por prepari publikan opinion kun la celo plene restarigi kapitalismon en Ĉinio, kaj tiel lumigis la verdan signallampon al la demonoj kaj diabloj por iliaj furiozaj atakoj.

En la Deka Sesio de la Oka Centra Komitato, en 1962, Prezidanto Maŭ elmetis la taskon reeduki la kadrojn kaj decidis disvolvi movadon de socialisma edukado en la urboj kaj kamparoj de la tuta lando. La Centra Komitato de la Partio opiniis, ke armi la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, revoluciajn intelektulojn kaj vastajn amasojn de kadroj per la penso de Maŭ Zedong kaj pliapaŝe akceli ideologian revoluciigon de la homoj, estas la plej fidinda kaj radika garantio por preventi reviziismon kaj restarigon de kapitalismo, kaj gajni la venkon de la socialisma kaj komunisma afero.

La ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong estas la plej granda malhelpo por la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en lia klopodo de restarigo de kapitalismo en Ĉinio. Tial, en sia reeldonita *Memkulturo* li pli inside kaj pli malice atakis Prezidanton Maŭ kaj la penson de Maŭ Zedong. Per la tuta forto li subtaksis la grandan kontribuon de Prezidanto Maŭ faritan al la afero de proleta revolucio kaj marksism-leninismo. Kamarado Lin Biaŭ alvokis nin "legi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti liajn vortojn, agi laŭ liaj instrukcioj kaj fariĝi liaj bonaj batalantoj." Sed la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon kun sia kaŝita celo alvokis, ke oni "devas fariĝi fidela lernanto de la iniciatintoj de marksism-leninismo", kaj nenion diris pri lernado de la penso de Maŭ Zedong. Ĝuste kiam la amasa movado por lernado de la verkoj de Prezidanto Maŭ ĉiam pli leviĝis en la tuta Partio, la tuta armeo kaj la tuta lando, li distribuigis grandkvante la reeldonitan *Memkulturon* en kaj ekster la lando, ĝin rekomendis ĉie kaj movis siajn kunulojn por ĝin vaste laŭdaĉi, celante per sia nigra varo de reviziismo rezisti kaj oponi kontraŭ la penso de Maŭ Zedong. Li intencis konduki niajn vastajn amasojn de kompartianoj, kadroj kaj junuloj sur la eraran vojon de kontraŭrevolucia reviziismo kaj renversi la diktaturon de la proletaro por restarigi kapitalismon en nia lando kaj ŝanĝi la koloron de niaj partio kaj ŝtato.

En la historio de nia partio, ĉiam ekzistis la batalo inter du linioj. La enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon ĉiam eldonigis sian libron *Memkulturo* en la gravaj momentoj de la disvolviĝo de la revolucia historio de nia lando. Tio estas neevitebla respeguliĝo de la intensa batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. Tute nerealigebla estas la vana intenco de la enpartia potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon turni la direkton de la ĉina historio. Ĉar ni havas la saĝan gvidon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la ĉiamvenkan penson de Maŭ Zedong kiel orientilon, neniu malamiko kaj nenia malfacilo povas malhelpi al nia popolo konduki la socialisman revolucion ĝis la fino kaj antaŭen marŝi kuraĝe al komunismo!

Ĝisfunde Kritiku la Nigran Libron "Memkulturo"

SIDNEY RITTENBERG, amiko el Usono

LA potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Komunista Partio de Ĉinio estas perfidulo de la monda revolucio. Li perfidis la liberigan movadon de la proletaro kaj subpremataj nacioj de ĉiuj landoj de la mondo, sin adaptis al la bezono de la agresa kliko de usonaj imperiistoj, kolportis la serion de ideoj pri "'paciĝo' kun imperiismo, 'paciĝo' kun ĉiulandaj reakciuloj, 'paciĝo' kun moderna reviziismo kaj malmulto da subteno al la revoluciaj bataloj de diverslandaj popoloj". Sed ĉar la granda direktilisto Prezidanto Maŭ senŝanceliĝe tenas la direktilon de la revolucio, tial ne povis efektiviĝi la ideoj de la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Komunista Partio de Ĉinio.

La *Memkulturo* verkita de la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Komunista Partio de Ĉinio ludis ege malbonan rolon en la revolucia movado de la tutmonda proletaro. En kelkaj landoj, iuj homoj misprenis la *Memkulturon* de la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Komunista Partio de Ĉinio kiel opinion de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj studigis ĝin kiel devigan lernolibron. Ĝuste pro tio, ke en tiu ĉi libro la verkinto oponas kontraŭ la ruĝa flago tenante en la manoj "ruĝan flagon", tial estas pli vasta la fiinfluo kaŭzita de ĝi.

Por oponi kontraŭ la penso de Maŭ Zedong, kiu reprezentas la plej altan nivelon de marksism-leninismo en la nuna tempo, reviziismaj partioj de diversaj landoj nun tre eble represos tiun ĉi libron reviziisman kaj kontraŭrevolucian, kiu ekskluzive oponas kontraŭ marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong. Ĝia titolo devus esti: "Kiel enŝteliĝi en kompartion, reformi revolucian kompartion per burĝara mondkoncepto, lasi burĝajn elementojn uzurpi la gvidantecon de kompartio kaj ĝin ŝanĝi en reviziisman partion". Ni nepre devas kritiki la libron profunde kaj ĝisfunde ĝis ĝi fariĝos malfurora kaj fetora!

La *Memkulturo* de la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio instigas homojn sin altigi, supren grimpi, fariĝi "estro" kaj "heroo" inter la amasoj. Sed la libro preskaŭ neniom parolis pri la ideo tutkore kaj tutanime servi al la popolo, esti servanto de la popolo kaj esti humila lernanto de la amasoj. Evidente, ĝi estas tute kontraŭstaranta al la proleta mondkoncepto kun kolektivismo kiel la kerno, elmetita de Prezidanto Maŭ.

La potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio estas cent-pocenta burĝa elemento, kaj lia *Memkulturo* estas burĝa teorio. Efektive li instruis burĝajn elementojn kiel uzurpi la Partion. Pro tio lia reakcia penso ne povis ne malkaŝiĝi. Lia teorio "fari malgrandan oferon por akiri grandan profiton" estas tute sama kun la negocaj artifikoj de kapitalistoj. Ĉiu ajn kapitalisto akiras profiton nur post kiam li faras certan investon; por fariĝi "famulo", oni nepre devas iom pagi. La potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio instigis homojn memkulturi por fariĝi "lerta" revoluciisto; tio signifas, ke vi servos diligente kelkan tempon en la Partio kaj certe venos al vi la tago por elsalti, eĉ se vi fariĝos lojala vasalo de malprava gvidanto. Tio estas via investo! Sed vi devas persisti kaj ne malkaŝi vian klasan naturon. Jen estas la ruzo de la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio. Koncerne tion, li ankaŭ distrumpetadis sklavismon. Sklavismo ekzistas ne nur en partio granda, sed ankaŭ en partio kun malgranda membraro, kaj povas alporti grandan domaĝon. Ĉar la sklavismo kaj disciplino de la burĝaro estas tute kontraŭstarantaj al la memkonscia kaj fera disciplino de la proletaro. La proletaro ankaŭ devas obei la gvidantojn kaj observi feran disciplinon. Sed ekzistas por tio kriterio kaj fundamento, nome marksism-leninismo kaj la penso de Maŭ Zedong. Se la gvido konformas al marksism-leninismo, al la penso de Maŭ Zedong, do ĝi estas el la stabo de la proletaro, kaj ni devas absolute, rapide kaj senrezerve ĝin obei. Tute mala estas la disciplino de la burĝaro; ĝi ne estas memkonscia. Oni obeas ĝin ne pro tio, ke ili scias ke ĝi estas

prava, sed pro tio, ke ĝi venas de la mastro, kaj oni devas ĝin obei malgraŭ ke tion oni ne volas. Ĝuste tian disciplinon distrumpetadis la ĉina Ĥruĉĉov.

Prezidanto Maŭ instruas nin, ke ideologia batalo devas iri ĉirkaŭ politiko, kaj kritikante, oni devas emfazi politikon. En la Partio, tio estas akcenti la batalon inter la du linioj. Sed la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio neis la batalon inter la du linioj.

Ĉu oni povas disputi, se en la Partio aperas principa malakordo? Pri tio nenion diris la libro *Memkulturo*. Ĝi tute ne parolas pri tio: Kion fari, se gvidantoj eraras? Ĝi parolas nur pri "absoluta obeo", "senrezerva obeo". Jen demando: Kion fari, se restariĝos kapitalismo sekve de la obeado? La potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio per sia tuta forto neis la batalon inter la du linioj en la Partio, neis politikan batalon kaj pledis por blinda "absoluta obeo". Ĝuste tia estis la subtera kompartia organizo de suda Usono. Tiu subtera organizo sufieris kruelajn persekutojn de *Ku Klux Klan* kaj subpremon fare de la armeo kaj polico, kaj estis deinterne subfosita de spionoj de la usona registaro. Tamen la malamikoj neniam povis ĝin frakasi, kaj neniam sukcesis faligi la revolucian organizon en suda Usono en la tridekaj jaroj kaj la unuaj jaroj de la kvardekaj jaroj. Sed kiel ĝi estis faligita poste? Browder, ĉefsekretario de la Kompartio de Usono, ordonis malorganizi ĝin sidante en domego de Novjorko. Reviziismo ĝin malorganizis. La gvidanto malorganizis sian partian organizon — tion vi devis obei eĉ plorante. Tamen nombro da revoluciaj kamaradoj persistadis kaj ne malorganizis ĝin. Sed ĝi fariĝis "kontraŭleĝa" kaj ne estis agnoskita de la gvidantaro de tiu partio. Tial, se oni efektivigas sklavismon, ne distingas disciplinon de la burĝaro disde la memkonscia disciplino de la proletaro, do la revolucio nepre suferos grandan perdon. Tial do estas tre grava problemo kiel trakti revolucian teorion, revolucian sperton kaj revolucian gvidon. Sed la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio kuraĝigis trakti ilin laŭ la maniero de burĝa sklavismo.

La vojo de ideologia remuldado elmetita de la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio estas centpocente ideisma. Lia vojo estas de koncepto al koncepto. Li ankaŭ iom babilis pri sinhardado en la praktikado de la amasoj, sed lia t. n. revolucia praktikado estas nur por memkulturo, sed ne por la revolucio kaj klasbatalo. La nia estas ekiri de klasbatalo, resumi spertojn, remuldi ideologion kaj reveni al klasbatalo. Lia vojo estas ekiri de memkulturo al batalo, daŭre memkulturi en la batalo kaj poste reveni al memkulturo. La celo estas sinaltigi, supren grimpi, fine uzurpi gvidantecon kaj fariĝi t. n. "heroo" kaj "gvidanto". Tia opinio alportis tre malbonan influon al la proleta revolucia movado de la mondo.

En la *Memkulturo* de la potenctenanto n-ro 1, iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio, tute ne troviĝas la jena koncepto: nepre iri en la vivecan batalon de la amasoj, partopreni la batalon de la amasoj, unuiĝi kun la amasoj, esti humilaj lernantoj de la amasoj, lerni de la amasoj marksism-leninismon kaj la penson de Maŭ Zedong, poste resumi sian sperton kaj lecionon, kaj denove studi verkojn de Prezidanto Maŭ, resumi batalan sperton per la starpunkto, vidpunkto kaj metodoj de Prezidanto Maŭ, altigi sian konon, kaj poste denove reveni en revolucian praktikon por pli bone servi al la popolo. Prezidanto Maŭ ĉiam mencias la Partion kune kun la amasoj, prenante ilin kiel neapartigeblajn, kaj akcentas la unuecon de la respondeco al la popolamasoj kaj tiu al la gvidantaj organizoj de la Partio. Ĉar la revolucia linio de Prezidanto Maŭ ĝuste estas kredi la amasojn, sin apogi sur la amasoj kaj iri "el la amasoj kaj al la amasoj". Ĉiufoje menciante la Partion, la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio nur unuflankece substrekas "absolutan obeon", "senrezervan obeon", "esti obeema ilo" de la Partio k.t.p. Sed Prezidanto Maŭ ĉiam priparolas la Partion kaj la amasojn kiel integralon: la Partio estas la gvida kerno kaj la kerna forto de la revoluciaj amasoj, ĝi devas gvidi la amasojn interne de ili en la bataloj, sed ne sin apartigi de ili kaj ilin gvidi starante super ili. Jen la diferenco inter la burĝaro kaj proleta revoluciularo. La vidpunkto de la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio estas burĝa, tute ne elstarigas la ligiĝon kun amasoj nek akcentas servadon al la popolo, kvankam li citis unu frazon de Prezidanto Maŭ. Li ja ne povas eĉ unu frazon ne citi! Unuvorte, la potenctenanto n-ro 1 iranta la kapitalisman vojon en la Partio de Ĉinio traktas la Partion laŭ burĝa vidpunkto. Tial, fremdlandaj revoluciularoj certe ekhavos miskonon, se ili lernos de *Memkulturo*. Kompreneble, jam aliiĝis la situacio en multaj lokoj. La revoluciaj kernaj fortoj en tiuj lokoj jam venis inter amasojn kaj aktive partoprenis la klasbatalon, kaj samtempe esploras, kiel kombini la penson de Maŭ Zedong kun la konkreta revolucia praktiko de sia lando. Certe sukcesos la revolucio, se vi kombinos la penson de Maŭ Zedong kun la konkreta revolucia praktiko de via lando. Se nur tion vi faros, la venko certe apartenos al vi. Kaj tion oni povas efektivigi nur en revolucia batalo. Nun la fudamenta problemo estas problemo de vojo, kaj kiel oni iros laŭ la vojo. En iu ajn lando, se la gvidantaro de la revolucio mastras la penson de Maŭ Zedong, havas unuecan konon pri ĝia universala vero kaj la konkreta revolucia praktiko de sia propra lando kaj surpaŝas la ĝustan revolucian vojon, do ili certe kondukos la revolucion de venko al venko!

La penso de Maŭ Zedong montris la ĝustan direkton al la revoluciuloj en ĉiuj landoj de la mondo, montris al ili la ĝustan revolucian vojon, kaj montris al ili la ĝustan vojon pri sinhardado kaj sinremuldo de la revoluciuloj. Tio estas grandega kontribuo al la proleta revolucio de la mondo. Mi kredas, ke la vicaro de milionoj kaj milionoj da proletaj revoluciuloj, formiĝinta en la granda proleta kultura revolucio de Ĉinio, certe glore plenumos la taskon, kaj donos grandan antaŭenpuŝon al la monda revolucio.

EDE ĜUNIĈIRO (Japanio):

Nepre Irota Vojo al Komunismo*

SAME kiel Lenin kreis la vojon al socialismo en la Oktobra Revolucio, la granda proleta kultura revolucio disvolviĝanta en Ĉinio — la centro de la monda revolucio, malfermas la vojon al komunismo por la proletaro de la mondo. Tial, mi kredas, ke por ĉiuj revoluciaj popoloj kiuj volas komunismon, la vojo, kiun kamarado Maŭ Zedong montras al ni, estas vojo nepre irota.

Tiu ĉi granda proleta kultura revolucio estas granda kontribuo al kaj granda iniciato en marksism-leninismo kaj la internacia komunisma movado fare de kamarado Maŭ Zedong.

KIAL NECESAS DEPRENO DE POTENCO?

Mi havis la jenan demandon: Kial necesas transpreno de potenco en Ĉinio, kiu estas potenca ŝtato de proleta diktaturo sub la gvido de la granda gvidanto k-do Maŭ Zedong? Kion finfine signifas la transpreno de potenco en la granda proleta kultura revolucio?

La proletaro kaj la popolo de Ĉinio, gvidataj de k-do Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio, kaptis la regpotencon en la tuta lando en 1949. Escepte la provincon Tajvan, la tuta Ĉinio estis liberigita kaj stariĝis ŝtato de proleta diktaturo. Tio estas venko de la revolucio de popola demokratio kaj granda venko de tio ke Ĉinio ekiris sur la vojo al socialismo. La venko de la revolucio de Ĉinio fariĝis la decida faktoro por radikala ŝanĝo de la interrilato de klasaj fortoj en la tuta mondo. La granda penso de Maŭ Zedong fariĝis potenca ideologia armilo de la popolo de la mondo por fari revolucian batalon kaj venki imperiismon, reviziismon kaj la reakciulojn en la diversaj landoj, kaj la socialisma Ĉinio fariĝis citadelo de la monda proleta revolucio.

Ĝuste kiel k-do Maŭ Zedong instruis al ni, tiu venko de la ĉina popolo estas nur **"iro de la unua paŝo de dekmil-lia longa marŝo"**. La posta vojo estos pli longa, kaj la estonta laboro estos pli malfacila kaj ankaŭ pli granda.

Kamarado Maŭ Zedong cetere instruis al ni, ke ekzistas ankoraŭ klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo en socialisma socio, kaj samtempe, la renversitaj ekspluataj klasoj ne volonte akceptos sian malvenkon. Pri tio mi iom post iom pli profundigis mian komprenon dank' al la granda kultura revolucio.

La klasbatalo kaj la batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo en la socio neeviteble speguliĝas en la Partio. La renversitaj ekspluataj klasoj komencis senbridan atakon kontraŭ la proletaro unue en la ideologia kampo. Samtempe, ili serĉas por si agentojn en la Partio kaj klopodas subfosi la Partion de interne, por ke la proleta

Portante kartonojn kaj tabulojn kun sloganoj, kiaj "Vivu la venko de la penso de Maŭ Zedong!" kaj "Vivu la granda kultura revolucio", la japanaj revoluciaj popolanoj manifestacias en la urbo Ivakuni.



partio degeneru en burĝan partion, la proleta diktaturo degeneru en burĝan diktaturon, kaj socialismo returniĝu en kapitalismon.

Plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, praktikis la burĝan diktaturon en la departementoj, institucioj kaj entreprenoj, kiujn ili regis dum longa tempo. Se oni ne farus la grandan proletan kulturan revolucion kaj lasus la situacion disvolviĝi libere, do, kiel Prezidanto Maŭ montris, eble en nur kelkaj aŭ dekkelkaj jaroj, maksimume, kelkaj jardekoj, la tuta Ĉinio ŝanĝus sian koloron.

La Oktobra Revolucio gvidata de Lenin estis granda revolucio. Ĝi malfermis la liberigan kaj socialisman vojon por la proletaro de la mondo. Ankaŭ Ĉinio kaj la aliaj socialismaj landoj ĉiuj iris la vojon de la Oktobra Revolucio kaj liberigis sin. Sed, en Sovetunio, oni ne plenumis revolucion en la ideologia kampo post la Oktobra Revolucio. Pro tio naskiĝis tie la reviziismo de Ĥruŝĉov kaj la socialisma Sovetunio transformiĝis en reviziisman landon.

Tiu ĉi grava leciono en la internacia komunisma movado elmetis, antaŭ la marksist-leninistoj de la tuta mondo, la demandon: kiel oni evitu la degeneron de socialismo kaj kiel oni efektivigu komunismon?

Kiu solvis tiun ĉi demandon? La granda kamarado Maŭ Zedong. Li resumis la ĉinajn kaj internaciajn spertojn kaj instruojn, kaj iniciatis kun granda revolucia animo kaj ekstreme alta decidemo tiun grandan proletan kulturan revolucion. Tiu granda kultura revolucio iniciatita kaj gvidata de k-do Maŭ Zedong solvis teorie kaj praktike la problemojn urĝe solvendajn en kaj ekster la lando. Nur granda marksist-leninisto kaj granda gvidanto kun riĉa batalsperto, kia kamarado Maŭ Zedong, povas tion fari.

DEPRENI LA POTENCON DE PLENMANO DA POTENCTENANTOJ EN LA PARTIO, KIUJ IRAS LA KAPITALISMAN VOJON

Kamarado Maŭ Zedong instruas al ni: **"Ĉiuj revoluciaj bataloj en la mondo estas por kapti aŭ firmigi regpotencon."** La centra demando de la granda proleta kultura revolucio estas la transpreno de potenco, nome la proletaj revoluciuloj unuiĝas por transpreni la potencon de plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Tio efektiviĝas ne de supre malsupren per deoficigoj kaj reorganizoj sed estas batalo en kiu la revoluciaj amasoj, revoluciaj gvidantaj kadroj kaj respondeculoj de la Popola Liberiga Armeo, kuniĝas por transpreni la potencon de plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon, per senrezerva mobilizo de la amasoj, kaj movado de amaso de malsupre supren. Fakte, tio estas, ke la proletaro transprenas la potencon de la burĝaro. Ni opinias, ke nur tiamaniere la proletaro povos firme teni la regpotencon kaj solidigi la proletan diktaturon en ĉiuj entreprenoj kaj institucioj, kaj la degenero de socialismo povos esti preventita.

La demando pri transpreno de potenco sub la proleta diktaturo estas nova granda disvolvo de la teorio pri proleta revolucio kaj proleta diktaturo de marksism-leninismo.

En la granda kultura revolucio kamarado Maŭ Zedong kreive disvolvis la sperton de la Pariza Komunumo. Resumante la sperton de la Pariza Komunumo, Marks montris, ke la proletaro absolute ne devas heredi la pretan ŝtatan maŝinon de la burĝaro. Oni absolute ne devas uzi reformismajn metodojn sed devas agi laŭ tiu principo de marksismo komplete frakasi la instituciojn, kiujn uzurpis plenmano da potenctenantoj en la Partio, kiuj iras la kapitalisman vojon. Nur tiamaniere oni povas transformi ĉiujn malnovajn superstrukturojn nekonformajn al la socialisma ekonomia bazo. Tiel, oni povos krei kondiĉojn por ĝisfunde neniigi la burĝan individuismon ideologion formiĝintan sur la bazo de privata posedsistemo, kaj starigi la komunisman ideologion bazitan sur publika posedsistemo — la penson de Maŭ Zedong.

Dum la granda proleta kultura revolucio, oni ne nur devas depreni la potencon el la manoj de la potenctenantoj, kiuj iras la kapitalisman vojon, sed ankaŭ devas disvolvi en sia kapo batalon por transpreni la potencon de la burĝa penso per la penso de la proletaro. Tio estas profunda revolucio, kiu frakasas la burĝan ideologion kaj starigas la penson de Maŭ Zedong. Alivorte, ĝi diras al ni, ke prenante nin kiel movforton de la revolucio, ni devas samtempe preni nin ankaŭ kiel la objekton de la revolucio. Nur tiamaniere oni povas forigi la ideologian bazon de reviziismo, firmigi la rezulton de la granda proleta kultura revolucio kaj garantii ke la socialisma Ĉinio neniam ŝanĝos sian koloron kaj la socialisma revolucio iros ĝis la fino.

IRI LA REVOLUCIAN VOJON DE ĈINIO

La granda kultura revolucio gvidata de k-do Maŭ Zedong efektive malfermis novan eraon en la historio de la proleta revolucio kaj proleta diktaturo de la mondo. Tiu ĉi granda proleta kultura revolucio multe riĉigis kaj disvolvis la spertojn de la Pariza Komunumo kaj de la Sovetoj kaj marksism-leninismon.

La japana popolo varme amas Prezidanton Maŭ. Jen revoluciaj laboristoj, studentoj kaj urbanoj de Tokio, portante portretojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong, plej amata kaj plej respektata de la revolucia popolo de la mondo, partoprenas la manifestacion okaze de la Festo de la Unua de Majo.



Tra la granda kultura revolucio de Ĉinio, la marksist-leninistoj kaj la revoluciaj popoloj de la tuta mondo vidas la vojon, kiun ili mem devas iri. Ĝuste tial ili subtenas kaj laŭdas ĝin per ĉiuj siaj fortoj.

La granda proleta kultura revoluco forte influas al Japanio. Unue, la japana revolucia popolo ekkomprenis, ke la penso de Maŭ Zedong estas la sola ideologia armilo por faligi la japanajn kaj usonajn reakciulojn kaj por liberigi sin, kaj tiel pli urĝeme volas studi la verkojn de Maŭ Zedong. Ekzemple, la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, kiun la ruĝaj gvardianoj ĉiam portas kun si dum la granda kultura revolucio, jam fariĝis inter la japanaj popolamasoj trezora libreto por revolucia batalo. En la pasintaj kelkaj monatoj, 300,000 ekzempleroj de la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estis jam venditaj. Due, kuraĝigite de la revolucia ribela spirito de la junaj ruĝaj gvardianoj, la japana revolucia popolo ne nur batalas kontraŭ la usona imperiismo kaj japanaj reakciuloj, sed decideme batalas ankaŭ kontraŭ la reviziistoj en la Komunista Partio de Japanio. Trie, la granda proleta kultura revolucio komprenigis al la japana popolo, ke nur la revolucia vojo de Ĉinio, la vojo montrita de kamarado Maŭ Zedong, kondukas al komunismo. Ĝi ebligis al la japana revolucia popolo vidi sian luman estontecon kaj plifortigi sian memfidon en batalo.

La vastaj amasoj de Japanio, same kiel la revoluciaj amasoj de la mondokaj tutkore esperas amikiĝi kun la ĉina popolo kaj prenas la grandan kulturan revolucion kiel sian propran aferon, kaj montris sian treege grandan zorgon kaj subtenon al ĝi.

IMPERIISMO, REVIZIISMO KAJ LA REAKCIULOJ ALFRONTAS SENELIREJON

Imperiismo estrata de Usono, la moderna reviziismo kun la sovetia reviziismo kiel sia kerno kaj la reakciuloj de ĉiuj landoj vidas tra la granda kultura revolucio de Ĉinio, ke ili jam alfrontas senelirejon. Ĝuste pro tio, ili forte atakas kaj distordas la grandan kulturan revolucion.

Kion signifas la atako de la reakciuloj en la mondo kontraŭ la granda proleta kultura revolucio? Tio signifas, ke la intrigo malsukcesigi la revolucion de la mondo pere de "paca evoluo" kaj degenero de Ĉinio, la centro de la monda revolucio, jam mizere fiaskis pro la granda kultura revolucio.

Ilia furioza atako montras nur, ke ili jam troviĝas en senelirejo.

Ni japanaj revoluciaj maldekstruloj tenos alte la grandan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj kun plena memkredo batalos por la fina venko de la granda kultura revolucio ŝultro ĉe ŝultro kun la ĉina popolo!

Vivu la granda proleta kultura revolucio!

Vivu la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!

Vivu! Vivu! Longe vivu kamarado Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la tutmonda popolo!

**La artikolo estas tradukita kun ioma mallongigo kaj la subtitoloj estas de la redakcio.*

Trafe Pafis la Herooj de la Aeraj Fortoj

EN la 24-a de aprilo, 1967, la rabistaj aviadiloj de la usona imperiismo — du batalaviadiloj de tipo F-4B — entrudiĝis en la aeran spacon de Ĉinio super iu loko de Guanghi-provinco por fari militprovokon.

La aeraj trupoj de nia Popola Liberiga Armeo jam delonge estis pretaj doni rebaton. La radaristoj nomataj kiel "teleskopoj-okuloj" sagace persekutis la diablajn figurojn de la malamikaj aviadiloj antaŭ la fluoreska ekrano, kaj la notistoj precize signis ilian flugvojon. La komandantoj kaj batalantoj profunde sentis, ke ju pli streĉa estas la momento de militpreparo, des pli necesas la penso de Maŭ Zedong. Kiam ili ricevis la batalordonon, ili foj-refoje recitis la vortojn de Prezidanto Maŭ: **"faru firman decidon, timu nenian oferon, venku ĉiujn malfacilojn por akiri venkon."** Kun granda kaj profunda malamo al la usona imperiismo la komandantoj kaj batalantoj faris sian ĵuron: Firme kaj komplete ekstermi la aviadilojn de la malamiko, kiuj aŭdacas entrudiĝi, permesi al neniu el ili reiron. Venas unu, faligu unu, venas du, faligu paron!


Ekis la batalo. Trovante sin en malfavora situacio, la ruzaj malamikoj faris per granda rapideco grandan turniĝon unun post alia, provante eskapi de la puno de niaj aeraj fortoj. En tiu kriza momento, eksonis ĉe la oreloj de la komandantoj kaj batalantoj la instruo de Prezidanto Maŭ: **"Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidas faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam esti subigita de malamikoj."** Tuj ĉiuj sentis sin plenaj de kuraĝo kaj bravege ekfaris atakon kontraŭ la aviadiloj de la malamiko. Nun la entrudiĝintaj usonaj aeraj rabistoj trovis nenian rimedon por fuĝi, kaj obusoj salvon post salvo rekte flugis al la aviadiloj de la malamiko. Jen unu el ili eligis densan nigran fumon kaj falis malsupren ruliĝante. En la sama tempo, fortaj kanonpafoj trafis la alian, kaj ree aperis strio de nigra fumo en la ĉielo, kaj la malamika aviadilo kvazaŭ kajto, kies fadeno rompiĝis, ankaŭ ruliĝis kaj nude malkaŝis sian papertigran vizaĝon.

La aeraj trupoj de nia heroa Popola Liberiga Armeo finis tiun elstaran eksterman batalon per brila venko. Tio estas alia triumfokanto de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong.

Antaŭ la Majtago, alia informo pri triumfo venis de nia heroa Popola Liberiga Armeo. En la 29-a de aprilo, nia aera trupo faligis unu militan rekognoskan aviadilon senpilotan de la usona imperiismo super iu loko de Guanghi-provinco. Tiu estas la dekdua aviadilo de tia speco faligita de nia armeo depost novembro de 1964.

Renkontinte sinsekvan fortan baton de nia armeo, la usonaj rabistaj aviadiloj nevolonte subiĝis al sia malvenko kaj ree entrudiĝis posttagmeze de la 1-a de majo en la aeran spacon super iu loko de Guanghi-provinco por fari militprovokon. Tiuj du rabistaj atakaviadiloj de tipo A-4B ree estis faligitaj de niaj aeraj fortoj per unu fojo.

Dum la mallongaj ok tagoj, la aeraj trupoj de nia heroa Ĉina Popola Liberiga Armeo sume faligis kvin militaviadilojn de la usona imperiismo, kiuj entrudiĝis en nian teritorian aeron. Tio estas la venko de la granda proleta kultura revolucio, la venko de la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong!



Batalaviadilo de la usona imperiismo tipo F-4B. Du tiaj estis faligitaj de niaj aeraj fortoj posttagmeze de la 24a de aprilo 1967.

HONG MIN:

Novaj Produktaĵoj de Pekina Speciala Metiarto

EN la movado de la granda proleta kultura revolucio, la vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj, kiuj okupas sin pri speciala metiarto, plie armas sin per la penso de Maŭ Zedong, disvolvis la revolucian ribelspiriton kaj faris aŭdacan renovigon pri la tradicia speciala metiarto de Pekino rilate ĝiajn enhavon kaj krean teknologion. Ili serioze efektivigis la penson de Maŭ Zedong pri literaturo kaj arto en la praktikon, kuraĝe laboradis super sia studo kaj tiel kreis revoluciajn metiartaĵojn kiuj spegulas la spiriton de socialisma epoko.

Ni prenu la Pekinan Fabrikon de Jad-skulptaĵoj kiel ekzemplon. En la komenco de la granda proleta kultura revolucio, sintrovis en la tuta fabriko nur du grupoj kun pli ol 40 anoj, kiuj klopodis pri kreaĵoj kun revoluciaj temoj. Nun, pli ol 300 oficistoj kaj laboristoj de la du laborejoj de homfiguroj kaj floroj ĉiuj sin okupis pri produktaĵoj kun socialismaj revoluciaj temoj.

En la Fabriko de Artaj Homfiguroj, antaŭ la granda proleta kultura revolucio, produktaĵoj kun revoluciaj temoj okupis nur 30 procentojn de la tuto, sed nun jam 100 procentojn. Iuj el la novaj produktaĵoj prikantas nian grandan gvidanton Prezidanton Maŭ, la aliaj heroojn kiajn Giaŭ Julu, Liu Jingĝjun, Vang Gie, Ĉen Jongguj, Lej Feng kaj bravuloj de la putodrila trupo n-ro 32111, kiuj sange luktis kontraŭ fajrego, dum la triaj prezentas ruĝajn gvardianojn, sturmantojn de la granda proleta kultura revolucio. Krome, estas multaj kiuj prikantas batalojn de la revolucia popolo de la tuta mondo.

Klozoneo estas pekina tradicia metiartaĵo. En la pasinteco plejparto el ili temis nur pri imperiestroj, generaloj, ĉefministroj, sinjoridoj kaj belulinoj, aŭ floroj, birdoj, insektoj kaj fiŝoj. Nun la klozonea fabriko kreis kvar klozoneajn bildojn, kiuj prezentas scenojn el la revolucia baledo *Blankhara Knabino*. Unu el ili montras, kiel Hi-er, la filino de iu subpremata malriĉa kamparano, alte levis incensbrulilon rektstarante, akre rigardis la bienulon Huang Ŝiĵen per okuloj plenaj de indigno, kaj volis mortbati per ĝi tiun fiulon kun besta koro. Huang Ŝiĵen vestita en nigra robo teren falis pro teruro. La heroa figuro de Hi-er kaj la konfuzita figuro de Huang Ŝiĵen donas fortan kontraston.

En la Pekina Lakgravura Fabriko, mi vidis lakgravuran bildon "Prezidanto Maŭ akceptas la ruĝajn gvardianojn", kiu longas je 1.8 metroj kaj larĝas je 0.8 metro. La bildo prezentas al ni vivan scenon, kiel nia estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ akceptis sur la pordego Tian-anmen la ruĝajn gvardianojn el diversaj lokoj de nia lando en la granda proleta kultura revolucio. La granda figuro kaj afabla mieno de Prezidanto Maŭ kun alta staturo kaj brile ruĝa vizaĝo sentigas al ni eksterordinaran intimecon. La akceptataj ruĝaj gvardianoj alte tenas la ruĝajn libretojn *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en la manoj, kaj ĉies vizaĝo estas plena de senlima feliĉo, kvazaŭ oni povus aŭdi ilian plenemocian huraadon: "Vivu Prezidanto Maŭ! Vivu Prezidanto Maŭ!" kaj laŭtan kanton: *Navigadon en Maro Oni Dankas al la Direktilisto.*

Laŭ la diro de respondeculo de la Kompanio de Specialaj Metiartaĵoj de Pekino, tiu kompanio okazigis la Pekinan Metiartan Ekspozicion en oktobro kaj novembro de la pasinta jaro, kie montriĝis el 22 metioj pli ol 360 pecoj da eburaj, jadaj, klozoneaj produktoj kaj artaj homfiguroj kun novaj temoj. En la komenco de tiu ĉi jaro, la pekinaj metiartaj fabrikoj produktis aron da novaj metiartaĵoj kaj sendis ilin al la Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio en Kantono, 1967. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la pekinaj metiartaj laborantoj iris al fabrikoj kaj kamparoj por vivi kaj labori kune kun la laboristoj kaj kamparanoj, por ke ili pli bone spegulu la novan fizionomion de diversaj flankoj de nia lando en la epoko de Maŭ Zedong kaj pli bone priskribu la heroajn figurojn de la laboranta popolo de nia epoko. La Pekina Klozonea Fabriko sendis unu grupon konsistantan el junaj projektantoj kaj maljunaj metiartistoj al revoluciaj sanktaj lokoj Jan-an, Gingangmonto, Ŝaŭŝan, kaj al pitoreskaj vidindejoj, kia Gujlin, por akiri sperton pri vivo. Ankaŭ la Pekina Fabriko de Jad-skulptaĵoj sendis du grupojn al Hiŝuangbanna, Junnan-provinco kaj Daliang-monto, Siĉuan-provinco por lerni el la vivo de la naciaj malplimultoj. Tiuj senditoj, kiuj profundiĝis en la praktikan vivon en diversaj lokoj, projektis post sia reveno al fabriko nemal-

multajn novajn desegnojn, kiuj prezentas revoluciajn sanktejojn kaj heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Nun oni jam komencis fari produkton laŭ parto de la novaj projektoj.

Iu juna projektanto de la Pekina Fabriko de Jadskulptaĵoj diris, ke en la pasinteco, kiam ili projektis artaĵojn por reprezenti la vivon de la taj-popolo, ili nenion faris krom iri al la Nacia Kultura Palaco, por pririgardi iliajn vestojn kaj fotojn tie ekspoziciatajn, tamen pri iliaj ideologio, sentoj kaj kutimoj ili tre malmulte konis, tial estas malfacile krei bonajn metiartaĵojn. Ĉifoje, ili alvenis al Hiŝuangbanna kaj laboris kaj vivis kelkan tempon kune kun la taj-popolo kaj akiris plian konon pri ili. Ili estis ege kortuŝitaj, precipe kiam ili propraokule vidis, kian profundan amon la taj-popolo havas al la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kaj kiel aktive kaj entuziasme ili lernas la verkojn de Prezidanto Maŭ. Lastatempe, laŭ sia propra travivaĵo ilia grupo de krea laboro jam projektis serion da novaj jadgravuraĵoj, kiu en kontrasto spegulas la pasintan kaj nunan vivon de la taj-popolo, kaj ili jam faris la unuan argilan provaĵon.

Jang Guanghua, juna projektanto de la Pekina Lakgravura Fabriko ofte venis en postlabora tempo al Tian-anmen-placo kaj interparolis kune kun ruĝaj gvardianoj el diversaj anguloj de nia lando, por ke li sukcese produktu la novan lakgravuraĵon "Prezidanto Maŭ akceptas la ruĝajn gvardianojn". Iutage li vidis, ke iu ruĝa gvardiano sin apogis ĉe la ŝtonbalustrado de la Orakva Ponto kaj longe suprenrigardis la grandan koloran portreton de Prezidanto Maŭ sur la pordego Tian-anmen. Li rigardadis kaj rigardadis, kaj li eĉ ne volis foriri dum longa tempo. Interparolante kun li, Jan Guanghua eksciis, ke la juna ruĝa gvardiano estas junulo de nacimalplimulto de la sudokcidenta landlima regiono. Li venis al Pekino kaj deziris vidi Prezidanton Maŭ, sed lin ne trafis la bonŝanco, ĉar jam forpasis la tempo, kiam Prezidanto Maŭ akceptis la ruĝajn gvardianojn. Tial li alvenis al Tian-anmen-placo por rigardi la portreton de Prezidanto Maŭ, kaj tie li jam rigardadis tutan antaŭtagmezon. Ekde la granda proleta kultura revolucio, antaŭ la pordego Tian-anmen aperis multe da similaj, emociaj ekzemploj pri varma amo al Prezidanto Maŭ. Tiuj kortuŝaj okazaĵoj, kiujn Jang Guanghua propraokule vidis, donis al li grandan inspiron en lia kreado de la lakgravuraĵo "Prezidanto Maŭ Akceptas la Ruĝajn Gvardianojn".

* * *

Tiuj novaj metiartaĵoj enkorpigitaj de la penso de Maŭ Zedong pri literaturo kaj arto rikoltis varmajn laŭdojn kaj altan takson en la Pekina Metiarta Ekspozicio kaj la Foiro de Eksportaj Varoj, inter kies vizitantoj troviĝas pli ol 300 gastoj el pli ol 40 landoj.

Ĝuste kiel la membroj de la Delegacio de la Somalia Parlamento diris post la vido de tiuj metiartaĵoj: "Tiuj kreaĵoj kuraĝigas la volon de la ĉina popolo kaj ankaŭ la popolojn sub la kateno de imperiismo. Ĉio ĉi tio estas atingoj akiritaj sub la gvido de la penso de Maŭ Zedong."



EMISIO DE MEMORIGAJ POŜTMARKOJ: "VIVU LA ĈIAMVENKA PENSO DE MAŬ ZEDONG"

Nova serio de memorigaj poŝtmarkoj "Vivu la Ĉiamvenka Penso de Maŭ Zedong", disradianta la brilon de la penso de Maŭ Zedong, estas emisiita en Pekino je la 20-a de aprilo, ĉijare. Por celebri la fondiĝon de la Pekina Revolucia Komitato kaj kontentigi la sopiron de miloj kaj miloj da revoluciaj popolanoj, la Ministerio de Poŝto kaj Telekomunikoj emisiis tiun serion da poŝtmarkoj.

Tiu serio de poŝtmarkoj konsistas el dekunu pecoj kaj ĉiu el ili portas apartan desegnon. La unua desegno estas la brila figuro de nia plej estimata kaj amata gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu, kun vizaĝo brile ruĝa, en armeana uniformo kaj kun la braksigno de ruĝgvardio, staras sur la pordego Tian-anmen kaj vigle levas sian manon salute al la revolucia popolo. Kaj la aliaj dek ĉiuj estas ore brilantaj vortoj de Prezidanto Maŭ.

Brilaj Ekstermaj Bataloj

— Pri la milita situacio de suda Vjetnamio en la unuaj 3 monatoj de la kuranta jaro

"Ĉiuj reakciularoj estas paperaj tigroj."

Maŭ Zedong

(Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong, aŭgusto 1946)

En la unuaj 3 monatoj de tiu ĉi jaro, la trajto de la milito en suda Vjetnamio estas jena: Unuflanke, la usona imperiismo freneze klopodis realigi t. n. planon de dua "strategia kontraŭofensivo seksezona" kaj senĉese atakis la liberigitajn regionojn per granda kvanto da trupoj, vane intencante ekstermi la ĉefajn trupojn de la popolaj armitaj fortoj por efektivigi la intrigon "premdevigi kapitulacon per milito"; aliflanke, la heroa sudvjetnama popolo pluapaŝe disvolvis la potencon de la popola milito, vaste kondukis gerilan militon, sinsekve frakasis plurajn grandskalajn "balaadojn", sukcese faris multajn ekstermajn batalojn, grandnombre ekstermis aktivajn fortojn de la usona armeo, kaj tiamaniere ili malsukcesigis la planon de "strategia kontraŭofensivo seksezona" kaj donis fortegan baton al la granda intrigo de la usona imperiismo "premdevigi kapitulacon per milito".

ENLASI LA MALAMIKOJN POR ILIN EKSTERMI

Ekde la komenco de februaro, dufoje la usonaj agresaj trupoj grandaskale "balais" la liberigitan

La popolaj armeanoj de la norda parto de Vjetnamio decidis nepre venki la usonajn agresantojn.



regionon en la provinco Tay Ninh. En la unua fojo pli ol 8,000 usonaj armeanoj sin ĵetis en la batalon, kaj en la dua pli ol 45,000 soldatoj de la usona armeo kaj ĝiaj komplicaj armeoj (t. e. preskaŭ la tuta armita forto en la orienta regiono de la suda parto). Antaŭ la dua "balaado", la usona armeo "faris intensan laboron por rigore teni sekreton", vane intencante "ekstermi" la ĉefan forton de la Sudvjetnama Liberiga Armeo per unu fojo.

Kontraŭ la malica plano de la malamikoj la armitaj fortoj de la Sudvjetnama Liberiga Armeo aplikis la militan principon "enlogi la malamikon profunden". Kiam dekmiloj da malamikoj, subtenataj de aeroplanoj kaj kanonoj, entrudiĝis kun ŝvelanta aroganteco, la ĉefaj trupoj de la Sudvjetnama Liberiga Armeo ĝustatempe translokiĝis kaj vanigis la surprizatakon de la usona armeo. Kiam la malamikoj dise faris "traserĉadon", la Sudvjetnama Liberiga Armeo sin turnis al surprizatakoj por doni neatenditajn fortajn batojn al la malamikoj. Krom tio, ĝi kondukis proksiman aŭ noktan batalon kontraŭ la usonaj trupoj kaj detruis iliajn komandan sistemon kaj provizadon, tiel ke la malamikoj ne povis subteni sin unu la alian. Tia kuraĝa proksimbatalo tute senefikigis la aeroplanojn, kanonojn kaj aliajn modernajn armilojn de la usona armeo. Iu usona oficiro, kiu partoprenis tiun "balaadon", konfesis malgraŭvole sian embarason, dirante: "Ni ĉiam atendis kaj atendis, kaj iun tagon ni subite trovis, ke ni jam estis sieĝitaj de la liberiga armeo", kaj destinitaj al ekstermiĝo.

MISTERAJ GERILAJ TAĈMENTOJ

En tiu periodo la gerilaj taĉmentoj aktivadis des pli mistere. Ili jen atakis de antaŭe, jen persekutis de malantaŭe, jen enŝteliĝis en la internon de fortikaj punktoj de la malamikoj por fari surprizatakon. Ili donis fortegajn batojn al la aeroplanoj, tankoj kaj kirasaŭtoj de la usona armeo, vaste instalis subterajn minojn kaj starigis ĉie foskaptilojn, malfaciligante la movadon de la malamikoj je ĉiu colo. Timante surprizatakon de la armita forto de la liberiga armeo kaj minojn enterigitajn de la gerilanoj, la usonaj piratoj ofte faris tian aranĝon, ke la kirasaŭtoj antaŭiris por malfermi la vojon kaj malantaŭe "homoj iris unu sekvante alian kaj samtempe zorgeme observis la vojsurfacon". Eĉ agante tiel, amaso da usonaj piratoj ne povis eviti sian pereon rezulte de mineksplodo.

La afero iris jene, **vi batalas laŭ via maniero kaj ni laŭ la nia; ni batalas kiam ni povas venki, kaj fortiriĝas kiam ni ne povas.** La armeo kaj popolo de la provinco Tay Ninh ĉiam tenis iniciativon sur la batalejo, batis la malamikojn kondukante ilin je la nazo, frakasis ĝiajn du "balaadojn" kaj akiris grandan venkon, en kiu pli ol 8,300 malamikoj estis ekstermitaj.

BRILAJ EKSTERMAJ BATALOJ

En tiu periodo, la sudvjetnamaj liberigaj armitaj fortoj montris sian neordinare altnivelan kapablon por ekstermaj bataloj. Ili ekstermis ne nur tutan roton aŭ tutan batalionon da malamikoj, sed ankaŭ tutan regimenton. Je la 19-a de marto, en intensa atakado kontraŭ regimento de la usona 9-a infanteria divizio norde de Bau Bang, la liberigaj armitaj fortoj formis plurajn kolonojn, rapide sturmis en la malamikajn trupojn, sin direktis rekte al la komandejo de la malamika artilerio kaj la haltejo de peztipaj militveturiloj, kaj samtempe forte pafis la diskurantajn usonajn piratojn. Post unuhora batalo, la liberigaj armitaj fortoj jam komplete kaj ĝisfunde ekstermis la regimenton, kiu enhavis unu infanterian batalionon kaj du kirasitajn batalionojn. Ili povis ne nur ekstermi grandan trupon da malamikoj, sed ankaŭ doni solidan kaj celtrafan baton, kaj rapide finis la batalon malebligante la helpon de aliaj malamikoj. Je la 21-a de marto, la armitaj fortoj de la liberiga armeo en Bien Hoa tiamaniere ekstermis unu batalionon de la pupa armeo en 25 minutoj. En la 24-a de la sama monato, la liberigaj armitaj fortoj detenis kaj atakis brigadon de uson-pupaj militveturiloj sude de Da Nang, kaj post kelkminuta batalo ili jam ekstermis du rotojn de la malamiko kaj detruis kaj difektis 127 diversspecajn militveturilojn.

Tiuj brilaj, rapidaj eksterm-bataloj plene montras, ke la batalforto kaj batalstilo de la sudvjetnamaj liberigaj armitaj fortoj jam plialtiĝis ĝis nova nivelo.

BATALI LA MALAMIKON EN ĜIA NESTO

La trupoj kaj popolo de suda Vjetnamio unuflanke frakasis la "balaadon" de malamikoj, aliflanke eniris la regionojn okupatajn de la malamiko por ataki iliajn kazernojn, bazojn kaj fortikajn punktojn, kaj tio ĵetis la malamikon en ĉiaman panikon. De la 5-a de februaro ĝis frua mateno de la 6-a la liberigaj armitaj fortoj de la provinco Quang Nam samtempe atakis kelkajn fortikajn punktojn de la usona armeo kaj ekstermis 345 usonajn agresantojn, kies plejparto estis oficiroj. Je la 13-a de marto, la liberigaj armitaj fortoj en la provinco Ben Tre forte atakis militan subdistrikton de la malamiko en la gubernio Moc Cay, detruis tri

malamikajn fortikajn punktojn kaj ekstermis 300 malamikojn. En la lastaj monatoj, la liberigaj armitaj fortoj en la provinco Quang Tri faris vastajn atakojn kaj kaŭzis al dekmiloj da tie garnizonantaj usonaj agresantoj grandajn perdojn, tiel ke la malamiko trovis sekurecon en neniu loko. La okcidenta gazetaro konfesis, ke en certaj regionoj la ĉefaj fortoj de la usonaj agresantoj estas "solide alnajlitaj" kaj "neniel povas moviĝi". Ekde februaro la liberigaj armitaj fortoj faris, unu post alia, pli ol 40 fortajn atakojn kontraŭ aerodromoj kaj provizaj bazoj de la usona armeo en Da Nang, Po Lay Cu, Chu Lai, Tra Cu, Vinh Long, Nha Trang, Bien Hoa, Long Binh k. c. Interalie la aerodromo de usona armeo en Da Nang suferis du fortajn atakojn en 17 tagoj. En la atako de la 27-a de februaro, pli ol 1,000 usonaj armeanoj estis ekstermitaj, kaj 94 aviadiloj kaj pli ol 200 militveturiloj estis detruitaj. La sudvjetnamaj liberigaj armitaj fortoj ne nur atakis fortikajn punktojn kaj kazernojn de la malamiko, sed ankaŭ penetris en la internon de la malamiko por rekte bati ĝian plej altan komandejon. Antaŭtagmeze de la 13-a de februaro, la liberigaj armitaj fortoj unuafoje starigis bombojetilojn en Sajgono kaj pafis la ĉefkomandejon de la usona armeo agresanta Vjetnamion. La obusoj eksplodis apud la ĉefkomandejo, kaj la usona ĉefkomandanto Westmoreland preskaŭ perdis sian vivon.

LA SUDVJETNAMA POPOLO NEPRE AKIROS LA FINAN TRIUMFON

Alfronte la potencan forton de la popola milito, la pli ol 400,000 usonaj agresantoj troviĝas en pasiveco kaj ricevas atakon en ĉiu loko. La "eskalada" strategio de Johnson fariĝis vojo, per kiu la usonaj agresantoj paŝopostpaŝe iras al sia tombejo. Post sia inspektado en suda Vjetnamio, Rivers, la prezidanto de la Armea Komitato de la Domo de Reprezentantoj de Usono malesperigite diris: "Ni nun okupiĝas pri konsuma milito en suda Vjetnamio, ĝi estas milito kun karaktero simila al tiu, kiu preskaŭ elpremis ĉion de la francoj. La perdo de niaj homfortoj kreskas kun ĉiu tago." Ankaŭ Fulbright, la prezidanto de la Komitato por Eksterlandaj Aferoj de la Senato de Usono konfesis, ke la agresa milito kontraŭ Vjetnamio nun kondukata de Usono nur rapidigos la "pereigon".

La milita situacio en suda Vjetnamio dum la unuaj 3 monatoj de la kuranta jaro montris, ke la sudvjetnama situacio estas bonega. Ju pli la sudvjetnamaj armeo kaj popolo batalas, des pli fortaj ili fariĝas, kaj ili firme tenas la iniciativon sur la batalejo. Tute egale kiom da trupoj la usona imperiismo plu sendos al suda Vjetnamio kaj kiel freneze ĝi provos disvastigi la militon, nenio povos savi ĝin el la malvenko en suda Vjetnamio.

La indignantaj armeo kaj popolo de la norda parto de Vjetnamio donis pezan baton al la milita "eskalado" de la usonaj agresantoj. Jen restajo de usona pirata aviadilo de ili faligita.



Sangodora Negoco

KIAM Lenin kondamnis antaŭ pli ol 40 jaroj la usonan imperiismon pri ĝia sinriĉigo el milito, li diris kun senkompara indigno: **"Ĉiu dolaro estas makulita per homa sango."** Oni ne atendis, ke la renegata kliko de la sovetunia reviziismo ankaŭ sange makulos la rublon hodiaŭ, kaj eĉ per la sango de la vjetnama popolo!

Laŭ la malkaŝo de usonaj gazetoj, la reviziisma kliko de Sovetunio provizis la usonan imperiismon per tre granda kvanto da magnezio, rara milita materialo necesa por fari napalmajn bombojn kaj aviadilojn uzatajn por masakri la vjetnaman popolon. Ĝi ofertis tiun gravan materialon al Usono en la tempo, kiam la lasta troviĝis en akra manko de tiu materialo por produkti siajn urĝe bezonatajn rabistajn aviadilojn kaj modernajn bombojn! Vidu, ĝis kia grado degeneris tiuj perfiduloj!

Ĉu la sovetunia reviziisma kliko ne senĉese pretendas ke ili subtenas la nacisavan batalon de la vjetnama popolo kontraŭ Usono? Fakte, tiu, kiun ili subtenas, estas neniu alia ol la morta malamiko de la vjetnama popolo, la usona imperiismo!

Ĉu la reviziisma kliko de Sovetunio ne afekte riproĉas ke la freneza bombado fare de la usona imperiismo kontraŭ Vjetnamio estas "barbaraĵo"? Fakte ĝi ja aktive helpas la usonajn agresantojn fari tiajn barbaraĵojn!

Kompreneble, tio ne estas io stranga.

Ĉar la sovetunia reviziisma kliko sekvas la principon de rublo en komando kaj profito en la unua loko, do, laŭ ĝia vidpunkto tio estas "justa negoco" ke oni liveras varon per unu mano kaj ricevas monon per la alia, kiam oni trovas akireblan profiton; kaj kial zorgi, ĉu la varo estas magnezio, tungsteno, bario, titanio aŭ uranio?

Ĉar la reviziisma kliko de Sovetunio volas "plenamplekse kunlabori" kun la usona imperiismo, do, laŭ ĝia vidpunkto, estas ĝuste nemalhavebla tia "ekonomia kunlaboro" de "reciproka plenigo de mankoj"; kaj kial zorgi, al kiu ĝi utilas kaj al kiu ĝi malutilas?

Ĉar la sovetunia reviziisma kliko false subtenas la vjetnaman popolon sed vere perfidas ĝin, do, ĉu tio ne estas konforma, laŭ ĝia vidpunkto, al la celo estingi la revolucian fajregon de la vjetnama popolo, ke ĝi helpas la usonajn imperiistojn fabriki pli da aviadiloj kaj bomboj por pli intense "eldevigi pacan intertraktadon per bombado"?

Dum la vjetnama popolo faras heroan sangan lukton kontraŭ la usonaj agresantoj por la venko de sia kontraŭusona nacisava afero, la reviziisma gvida kliko de Sovetunio senhonte faras negocon kun la usona imperiismo per la sango de la vjetnama popolo. Kia malnobla, abomeninda kaj malaminda ago! Ĉar ĝi povas fari tian malpuran fiagon por servi al la usona imperiismo, kiajn aliajn pli malpurajn perfidajn agojn ĝi ne faros?

KURANTAJ AFEROJ

En Konstruado

16-TUNA DU-CILINDRA VINĈMAŜINO POR PUTBORADO


Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Pezmaŝina Fabriko de Ginan venkis diversajn malfacilojn kaj sukcesis provfabriki novan produktaĵon, nome 16-tunan du-cilindran vinĉmaŝinon por putborado.

Tiu ĉi relative grandtipa ekipaĵo por minejo taŭgas por konstruado de profunda ŝakto. Dank' al ĝia apliko, oni ne nur povas pli bone ekspluati subterajn riĉfontojn, sed ankaŭ plirapidigi kaj sekurigi la konstruadon de ŝaktoj.


ŜAŬŜAN FORSTIGIS PLI OL 2000 HEKTAROJN PRINTEMPE DE 1967

Dank' al sia energia klopodado, la vastaj revoluciaj amasoj de malriĉ-kamparanoj, malsuperaj mez-kamparanoj kaj revoluciaj kadroj de Ŝaŭŝan, la hejmloko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, forstigis pli ol 2000 hektarojn en la lasta printempo, starigante novan rekordon en kvanto. Kaj la forstiga laboro montriĝis ankaŭ bonkvalita.

En la pasintaj jaroj, diverslokaj popolanoj de la tuta lando alsendis multajn specojn de valoraj arbidoj. Ankaŭ multaj eksterlandaj amikoj, kiuj ne trovis longa la vojaĝon de dek mil lioj por viziti Ŝaŭŝan, propramane plantis sennombrajn arbojn de amikeco. Konstruado kaj verdigo de Ŝaŭŝan ja estas komuna volo de la tutlanda popolo kaj de la popolo de la tuta mondo. En la granda proleta kultura revolucio, la vastaj revoluciaj amasoj de malriĉ-kamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de la Lotuslageta Komunumo de Ŝaŭŝan sole jam plantis pli ol 1,170,000 arbojn, superante la planitan nombron je 80%.



La Sanga Lukto de Heroa Putodrila Trupo N-ro 32111 kontraŭ Fajra Maro



La heroaj vunditoj de la putodrila trupo n-ro 32111 estas transportataj al hospitalo per helikopteroj speciale senditaj de la aera armeo de PLA.

KURAĜI suriri glavmonton kaj entrudiĝi en fajran maron estas heroa karakterizaĵo de la popolo de nia lando en la granda epoko de Maŭ Zedong.

La bravuloj de la heroa putodrila trupo n-ro 32111 rigardas la studon de verkoj de Prezidanto Maŭ kiel la unuan bezonon de la vivo, faras la penson de Maŭ Zedong sia animo, turnas la plenumadon de la instrukcioj de Prezidanto Maŭ en siajn konsciajn agojn, kaj prenas la interesojn de la revolucio kiel sian unuan vivon. Ili estingis maron da fajro kaj sekurigis la riĉaĵon de la ŝtato per sia sango kaj vivo!

"LASI LA INSTRUKCIOJN DE PREZIDANTO MAŬ ENGRAVURIĜI EN LA CERBON, SOLVIĜI EN LA SANGO KAJ ENRADIKIĜI EN LA AGADON"

Je la unua horo, matene de la 22-a junio 1966, bolis plenvapore la putejo de la putodrila trupo n-ro 32111. La unua kaj kvara grupoj estis en dejoro. La laboristoj ĉiuj fiksis siajn rondigitajn okulojn al la putkapo kun grandaj ŝvitgutoj sur la vizaĝo. La laboro de fermo de la puto por provi la gaspremon estis en irado. Post sukcesa plenumo de tiu procedo kaj ŝanĝo de la putkapo, la unua granda gasputo kun alta produkto kaj alta premo, kiun ili sukcesis drili en la nova strukturo, baldaŭ povos esti transdonata al uzado por produktado, kaj la petrolaj batalantoj povos tiam raporti la ĝojigan informon al la granda gvidanto kaj al la patrolanda popolo.

En tiu emocia momento, refoje ekaperis en ilia imago la sceno de akcepto de la glora tasko: En iu februara vespero ĉi-jare, alvenis pere de la supera gvidinstanco, la batalalvoko farita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la oficistoj kaj laboristoj de petrola batalfronto pri serĉado de gaso kaj petrolo. Tuj la oficistoj kaj laboristoj urĝe kolektiĝis sur la putejo, kaj la batalalvoko de Prezidanto Maŭ skuis ĉies koron. Resonadis en la stelplena ĉielo aklamoj: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

En la kunveno plena de memfido kaj energio, la petrolaj batalantoj ĵuris al la Partio kaj Prezidanto Maŭ:

"Ni lasos la instrukciojn de Prezidanto Maŭ engravuriĝi en la cerbon, solviĝi en la sango kaj enradikiĝi en la agadon."

"Ni estas petrolaj batalantoj de Prezidanto Maŭ, kiuj serĉas gason kaj petrolon por la patrolando kaj ekmarŝos ĝis ĉielrando kaj marangulo,

sen kuntiro de brovoj, per nemoligeblaj kruroj, tuj ĉe ricevo de ordono!"

En la antaŭtagmezo de la tago, ili komencis la vojaĝon al la nova putejo trans montoj je distanco de pli ol mil lioj. Atinginte la cellokon, ili delasis siajn tornistrojn kaj komencis labori sub la steloj, sen demandi pri tranoktejo kaj manĝado, ĵurante en si trovi pli da gaskampoj kaj petrolkampoj por la patrolando. Ili diris:

"La kapo povas esti forhakita kaj la sango povas esti finfluigita, se ne estos plenumita la tasko de trovo de gaso kaj petrolo, ni mortos sur la levmaŝina planko kaj enteriĝos en petrolkampo!"

Ili manĝis sub la ĉielo kaj tranoktis sur la kampo, tagnokte luktis, ne preterlasante minutojn kaj sekundojn, kaj plenumis laborojn ordinare por tri monatoj dum la daŭro de unu monato, tiel ke en la nova strukturo, en kiu absolute ne ekzistas natura gaso laŭ burĝaj "aŭtoritatuloj", ili kaptis grandan "gastigron" — sukcesis drili en plej alta rapideco kaj plej bona kvalito la unuan gasputon kun alta produkto kaj alta premo.

Tiu puto estis drilita dum la alta tajdo de la granda proleta kultura revolucio kaj en la situacio de nova plenampleksa antaŭensalto en diversaj frontoj tra la tuta lando. La natura gaso kuŝanta de miliardoj da jaroj sub la tero estas malkovrita por aldoniĝi kiel nova forto al la lukto por la socialisma konstruado de la patrolando.

Disvastiĝis la ĝojiga novaĵo kaj oni sciigis unu alian sin intervizitante.

En la profunda nokto de la 21-a de junio, la vicestro de la unua grupo Ĝang Jongking, kiu laboris kun malsano, ankoraŭfoje studis la brilan verkon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* antaŭ ol li iris al la putejo por deĵori. Li nete skribis sur la supro de la paĝo: "Ni revoluciuloj ĉiuj vivas por plene kaj ĝisfunde servi al la popolo." Post la skribo li metis sur sin la laborveston kaj aluminian kaskon kaj marŝis per grandaj paŝoj al la hele lumigata putejo.

Observinte la manometron, li serioze diris al la kamaradoj:


"Nia puto estas la unua drilita en la nova strukturo. La kondiĉoj de la tertavolo estas ankoraŭ ne tre klaraj por ni. La premo leviĝas sufiĉe rapide ĉi-nokte. Ni devas firme gardi nian postenon kaj resti centprocente devkonsciaj al la Partio kaj popolo. Kiel ŝraŭbon ni fiksu nian koron al la putkapo. Ni staru firme sur la posteno antaŭ ĉia ajn okazaĵo!"



Ĵus rekonsciiĝinte en la hospitalo, Ĵan Ŝuĵong tuj petis la flegistinon voĉlegi por li el la Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong.

Al klasaj fratoj koro ligiĝas kun koro. Multaj sin anoncas por oferi siajn sangon kaj haŭtojn al la batalamikoj, kiuj glore vundiĝis en la batalo kontraŭ la fajrego.





Ĝang Ĝongmin komencas skribi siajn notojn pri verkoj de Prezidanto Maŭ per la vundita mano ĵus povanta preni plumon.

Tuj estis formita fajra maro larĝa kaj longa je pli ol 50 metroj kaj alta je pli ol 30 metroj. La putturo el ŝtalo alta je pli ol 40 metroj falis post triminuta atako de la flamoj kaj la dizelo transformiĝis en feran bulaĵon. La rokego troviĝanta fore je dekoj da metroj ĉe la montdeklivo ruĝiĝis kaj la arboj cindriĝis.

La granda gaskampo alfrontis la danĝeron de neniiĝo.

Tamen fajro povas detrui ŝtalon kaj rokon sed ne la ruĝajn korojn de petrolaj laboristoj, kiuj estas fidelaj al Prezidanto Maŭ, al la penso de Maŭ Zedong, al la Partio kaj al la popolo.

En tiu ekstreme urĝa momento, fronte al la subita atako de la terura fajrego, la kamaradoj kiuj laboris en la putejo, tute ne konsideris pri sia vivo kaj sekureco kaj ĉiuj sinforgese ĵetis sin en la lukton kontraŭ fajrego. La sola penso, kiu okupis ilin, estis: estingi la fajron! sekurigi la gasputon! sekurigi la ŝtatan riĉaĵon!

FAJRO POVAS BRULDETRUI ŜTALON SED NE LA RUĜAN KORON DE PETROLAJ LABORISTOJ

Kiam la laboristoj fermis la puton por provi la gaspremon kaj estis pretaj por fari la provon de malferma fluo, subite kun tondra eksplodego krevis parto de la senjunta ŝtaltubo de fremdlanda deveno en la loko proksima al la putkapo pro la premo treege rapide altiĝanta kaŭze de la furioza baraktado de la "gastigro" fermita en la puto, kiu havis eksterordinare grandan produkton kaj tre altan premon.

La treege altprema gasfluo ŝprucanta el la malfermaĵo puŝis la ŝtonerojn kaj terbulojn tiel fortege ke ili sin ĵetis kvazaŭ salvitaj kugloj antaŭen al la drilinstalaĵo kaj dizelĉambro kaj disrompis eksplodrezistan ampolon sub la levmaŝina planko, kaj tuj kaŭzis brulegon. Je distanco de 20 lioj oni aŭdis la eksplodon kaj de 40 lioj oni vidis la fajrolumon.

La furiozaj, fortaj gasfluo kaj flamoj, tempeste balais la putejon, impete sin puŝis kontraŭ la rokego ĉe la apuda monto kaj turnis sin returne, bolante kaj muĝante en la aero kaj sur la tero.

La vicgrupestro de la unua grupo Ĝang Jongking, modela kompartiano kaj transpostenigita PLA-ano, sturmis al la valvo n-ro 4 por ĝin malfermi, kvazaŭ li estus sturmanta al malamiko en batalkampo por lukti per bajoneto.

La valvoj n-roj 4, 5 kaj 8 estis por ellasi gason. Se la gaso estos elkondukita ekster la putejon tra tiuj valvoj, la brulego multe reduktiĝos.

Antaŭ tiuj valvoj, baris la muĝantaj, varmegaj flamoj. Kiam Ĝang Jongking alproksimiĝis al la valvo, la potenca gasfluo el la krevaperturo, kun granda forto kaj flamoj, lin peze batis, tiel ke lia alta korpo ekŝanceliĝis kaj estis ĵetita en fajromaron je distanco de 20 futoj.

Ĝang Jongking estis en hospitalo antaŭ kelkaj tagoj. Kiam li ankoraŭ ne tute resaniĝis, li jam petis de la kuracisto elhospitaliĝon. Kiam la lasta ne konsentis, li diris: "Nun estas la plej grava kaj plej urĝa tempo por ni petrolaj laboristoj en plenumado de la alvoko de Prezidanto Maŭ pri serĉado de gaso kaj petrolo. Maj Hiande persistis en batalo eĉ kiam lia cerbo estis vundita. Mia posteno estas sur la putejo sed ne sur la lito!"

En la tria tago post lia forlaso de la hospitalo, li oferis sian vivon por la afero de la Partio.

Alia transpostenigita PLA-ano Vang Ping, la vic-ĉefdrilisto, tuj sturmis senhezite al la valvo n-ro 4, kiam li vidis la falon de Ĝang Jongking. Nur post kelkaj paŝoj li jam estis forte faligita sub la turo de la fajra ŝtormo.

Per sia tuta forto, kaptinte trabon de la turo, malcedeme levis sin tiu KJL-ano (membro de Komunisma Junulara Ligo), kiu spertis grandan suferon en la malnova socio, kaj havis senliman amon al la Partio kaj senkomparan malamon kontraŭ la klasaj malamikoj. Kun flamoj sur la tuta korpo, li refoje sturmis al la valvo, ĝis la fajrego forglutis lian vivon.


Al la 19-jara drilisto Vang Zuming estis asignita la tasko gardi la valvon n-ro 2. Li diris al la grupestro, kiam li komencis la deĵoron: "Estu trankvila la Partio, mi kontraŭstaros ĝisfine, eĉ se la ĉielo falus. Kiu revolucias, ne timas morton; kiu timas morton, ne povas revolucii." Tiu juna heroo plenumis sian vorton. Li mortis staranta apud la valvo kun manoj firme tenantaj la manradon kvazaŭ pino sur alta monto!

Fajro povas bruldetrui ŝtalon sed ne la ruĝajn korojn de petrolaj laboristoj. Luo Huataj, kiu havis la taskon rigardi la manometron, Vu Ĝongki, la gardanto de la dizelĉambro, kaj Deng Mukjuan, kiu havis la taskon ŝanĝi la valvon n-ro 1, ĉiuj brave persistis en luktado sur siaj postenoj en la sieĝo de ardaj flamoj kaj heroe oferis sian vivon por la Partio kaj popolo.

Ĉiuj kamaradoj de la kvara grupo, kiuj sturmis al la putkapo por protekti ĝin, estis senescepte brulvunditaj de la flamoj. Pro bato de fortega, flamanta gasfluo, Huang Ĉenghoŭ estis faligita en fosaĵon. Ne malproksime de li estis valvo de akvokondukilo. Li rampis al ĝi, ruliĝante kaj gratante la teron. Kiam liaj manoj kaptis la manradon, ili estis tuj morditaj de la arde varma fero. Tamen, li eltenis la doloregon kaj malfermis la valvon.

Ĵan Ŝuĵong, kiu estis reĵetita de la gasfluo ekster la fajromaron, denove sin ĵetis en la dizel-

Laŭta kantado pri la granda gvidanto Prezidanto Maŭ



ĉambron por serĉi sian klasan fraton Vu Ĝongki, kiu ankoraŭ restis en ĝi sieĝita de flamoj, kaj grave vundiĝis glore.

Al ĉefinĝeniero kaj vickomandanto Ĝang Ĝongmin, membro de la partia komitato de la mineja distrikto, kiu ĝuste plenumis sian taskon sur la loko, estis forbruligitaj la haroj kaj vunditaj la vizaĝo kaj brusto. Liaj du manoj estis preskaŭ plene bruldifektitaj. Sed li forgesis la doloregon, lia tuta penso estis trovi la fajrofonton kaj ke en la vivmorta momento la membro de komunista partio povas nur sturmi antaŭen sed ne retroiri. Ŝanceliĝe li refoje sin ĵetis al la fajra maro. Iu kamarado alkuris de malantaŭe kaj lin dorsoportis for de la fajro. Sed nia heroo maltrankvile kriegis: "Ne zorgu pri mi, fermu la valvon n-ro 3! rapide! rapide!"

FAJROLUMO ESTAS ORDONO MEM

La valvo n-ro 3 troviĝis en la centro de la fajra maro. Fermo de la valvo n-ro 3 ebligos haltigon de la gasfonto kaj estingon de la fajro.

La kamaradoj de la putodrila trupo n-ro 32111, armitaj per la penso de Maŭ Zedong, spiteme iris al la tigrohava monto, kvankam ili klare sciis ke sur la monto estas tigro; ili sturmis al la fajra maro, spite de la scio ke fajro brulas. Unu falis, pli multaj alkuris!

La eksplodo alarmis la aliajn kamaradojn de la trupo en la loĝejo. Kaptinte litkovrilojn, vatitajn vestojn, jutsakojn kaj aliajn objektojn utiligeblajn por estingi fajron, ili rapidis al la putejo kvazaŭ tigroj sinĵetantaj al ĉasaĵo.

Fajrolumo estas ordono mem. Kie estis plej danĝere, tien homoj alsturmis; kie estis la ŝlosila punkto, tien homoj sin ĵetis. La fajrejo fariĝis batalejo kaj la ĉiellekanta fajro estis la malamiko. Ĉiuj tiutempe sentis ke Prezidanto Maŭ estas ĉe ili, kaj ke la penso de Maŭ Zedong komandas la batalon!

Lej Hongbing, la vica politika direktanto nove elektita el inter laboristoj, la unua sturmis en la fajran maron kun malseka litkovrilo sur la kapo. Sed li tuj estis reĵetita de la potenca gasfluo je distanco de pli ol dek futoj, kiam li ĵus eniĝis en la fajron; ankaŭ la litkovrilo estis forblovita. La aliaj sekvantoj estis same reĵetitaj unu post alia.

Trovante ke ne eblas fermi la valvon n-ro 3, Lej Hongbing provis malfermi la sekurigan valvon n-ro 8, kiu troviĝis ĉe la dekstra flanko de la putejo kune kun aliaj kamaradoj, por konduki la gasfluon



Vicestro de la heroa putodrila trupo n-ro 32111 Liu Ŝoŭjong faras raporton en mitingo de la revoluciaj amasoj en Pekino.

ekster la putejon. Ĝuste kiam li sturme venis antaŭ la valvon, li falis svena pro la sufoko de hidrogeno sulfida.

Ĉefdrilisto Ĝang Ĝigie dorsoportis lin el la fajro. Kiam Lej Hongbing reakiris sian konscion, la unua penso, kiu venis al li, estis: "La plej alta devo de la kadro estas doni ekzemplon en vivmorta momento. Mi devas persisti ĝis la momento, kiam restos al mi ankoraŭ la spiro."

Lej Hongbing trifoje svenis kaj trifoje li obstine relevis sin kaj sturmis en la fajron. Sub la protekto de akvoŝpruco, kune kun kelkaj aliaj kamaradoj, li fine malfermis la sekurigan valvon n-ro 8.

Dum la sama tempo, victrupestroj Peng Giaĝi kaj Liu Ŝoŭjong kune kun kamaradoj Hu Debing, Hju Guangji k. a. formis batalgrupon por malfermi la sekurigan valvon n-ro 5 ĉe la maldekstra flanko de la putejo.

Pro la treege granda fajro, ili kvinfoje malsukcesis alproksimiĝi al ĝi. Tiam Peng Giaĝi kaj Hju Guangji alportis fajroestingan akvotubon en la fajran maron por ŝirmi per ĝi la antaŭstarantajn kamaradojn. La flamoj bruligis ilin dolorege, la hidrogeno sulfida sufokis ilin, kaj la forta gasfluo ilin ŝancelis. Tamen, pensante ke la antaŭsta-

rantaj kamaradoj bezonegas la subtenon de la akvo en ĉiu sekundeto, ili persistis kun kunpremitaj dentoj ĝis la sekuriga valvo n-ro 5 fine estis malfermita.

LA VIVO ESTAS VALORA, SED LA AFERO DE LA PARTIO ESTAS PLI VALORA

Ambaŭ sekurigaj valvoj estis malfermitaj kaj parto de la natura gaso estis kondukita ekster la putejon. Tiam la bravuloj profitis la akiritan venkon por ataki la valvon n-ro 3 per koncentritaj fortoj.

7-8 akvotuboj koncentrite elŝprucigis potencajn akvokolonojn, kiuj faris breĉon en la fajra maro. Multaj bravuloj amase ensturmis en ĝi kun malsekaj litkovriloj kaj jutsakoj.

Sed la valvo n-ro 3 jam deformiĝis pro la brulego. La alkurintaj kamaradoj ne povis ĝin turni, kaptante la varmegan manradon kaj uzante sian tutan forton. Alia grupo alkuris kun du grandaj tubpreniloj kaj ili povis turni la valvon nur du cirklojn, kurbiginte la trunkojn de la preniloj.


La bravuloj svenis unu post alia pro la ardaj flamoj, sufoka venengaso kaj maldensa aero. Tamen, kiel ajn granda estis la fajro, ĝi ne estas pli granda ol la saĝo de la laboristoj, armitaj per la penso de Maŭ Zedong. Kiel ajn altaj estis la flamoj, ili ne estas pli altaj ol la volo de la petrolaj laboristoj. Kiel ajn ruĝa estis la fajro, ĝi ne estas pli ruĝa ol la penso de la petrolaj laboristoj, kiuj estas fidelaj al Prezidanto Maŭ, fidelaj al la penso de Maŭ Zedong, fidelaj al la Partio kaj fidelaj al la popolo. Ili luktis obstine — kiam unu sturmis, tuj aliaj lin sekvis.

Kiam la nova laboristo-lernanto Hju Guangji, kiu venis de la kamparo nur antaŭ duona jaro, luktis en la fajro nur du minutojn, li tuj svenis pro la venena gaso. Hu Debing lin dorsoportis el la fajro. Kiam Hju Guangji rekonsciiĝis, li kvazaŭ aŭdis la intiman parolon de la granda gvidanto: "Sturmu! Vi diableto! Decidu vi firme, ne timu sinoferon, konkeru ĉiujn malfacilojn, kaj batalakiru la venkon!" Tuj li ekstaris kaj refoje ĵetis sin en la fajrejon.

Tiutempe, ankaŭ Hu Debing mem svenis. Kiam li reakiris sian konscion, li vidis ke la kamaradoj sturmis en la fajrejon unu grupo post alia, kaj la forto tute revenis al li. Li sturmis en la saltantajn flamojn al la valvo n-ro 3 post la kamaradoj kaj persiste turnis la manradon. Li pensis:

"Nun estas la tempo de provado por mi, la tempo en kiu la Partio min plej plej bezonas!

La herooj de la putodrila trupo n-ro 32111 alvenis al la apudeco de Prezidanto Maŭ kaj krias svingante siajn brakojn: "Vivu Prezidanto Maŭ!"



La homa vivo estas valora, sed la afero de la Partio estas pli valora. Dum mi havas forton movi min, mi ne ĉesos vin fermi. Ĉiu plia sekundo, ĉiu plia cirklo estos kontribuo por estingo de la fajro!"

IMITI LA EKZEMPLON DE HEROOJ, IRI LA VOJON DE HEROOJ KAJ PLENUMI BRAVAĴON DE HEROOJ

Post la fermo de la valvo n-ro 3, la fonto de gaso fluanta el la tubbreĉo estis haltigita kaj la fajro en la putejo reduktiĝis.

Sed, la premo de la naturgaso en la puto rapide leviĝis, kaj la putkapo povis eksplodi en ĉiu momento. Spite de la vundoj kaj doloro, la bravuloj daŭre luktis kune kun la provizoraj helplaboristoj, familianoj de la laboristoj kaj najbaraj komunumanoj, por protekti la putkapon.

Al Moŭ Maŭhiu, edzino de iu laboristo nomata Heng Siŝu, venis subite informo: "Via edzo estas vundita!" Ŝi ekmemoris la vortojn, kiujn ŝia edzo diris antaŭ sia iro al deĵoro: "Hodiaŭ ni kaptos gastigron, okaze de io neatendita, la plej grava afero estos protekti la havaĵon de la ŝtato." Sen la ŝtataj interesoj, de kie venos privataj interesoj? Ŝi tiel pensis, kaj do ne iris al sia edzo, daŭrigante la alportadon de akvo.

Foje post foje, Moŭ Maŭhiu alportadis al la fajrejo akvon kaj baritan pulvoron.

En la arda luktado, KJL-ano kaj vicĉefdrilisto Vang Joŭfa sin ĵetis en la fajregon kaj surkovris per malseka litkovrilo la putkapon, troviĝantan sub la levmaŝina planko. Sed la kovrilo rapide estis trabruligita. Tiel okazis al alia litkovrilo.

Sed li klare konsciis ke, se eksplodos la putkapo, la drila ilaro pezanta dekojn da tunoj sin ĵetos al la ĉielo, la tuta gaskampo estos detruita, kaj pli grandaj oferoj okazos al la centoj da klasfratoj, kiuj luktas kontraŭ la fajro sur la putejo.

Tiu orfo de la malnova socio kaj eksanasknabo de terposedanto foje skribis en sia taglibro kun emocio post suriro de laborposteno:

Mian vivon donis al mi la Partio. Ĉiuj miaj ĉeloj apartenas al la Partio. Mi povas fordoni ĉion mian, sed neniam la interesojn de la Partio.

Grandaj amasoj da leteroj venis el diversaj lokoj de la lando por esprimi la plej korajn konsolojn al la bonaj batalantoj de Prezidanto Maŭ.



En la ardaj flamoj li kuraĝigis sin:

"Vang Joŭfa, vi filo de kamplaboristo, vi infano kreskinta sub la nutrado de Prezidanto Maŭ, vi oferu vian vivon, sed neniam perdu vian revolucian animon."

Li tuj sentis la boladon de sia sango en la tuta korpo! Li kaptis unu malsekan litkovrilon kaj sin ĵetis en la flamojn. La malseka litkovrilo estis kaj granda kaj peza, kaj la putkapo altis pli ol homa kresko, tiel ke la kovrilo tuj falis glite de sur la putkapo ĉiufoje post surmeto. Li faris sian plejeblon per sia tuta forto, tamen la kovrilo ĉiam subglitis kaj tiel estis ankaŭ li mem.

Vang Joŭfa ekmemoris la instruon de Prezidanto Maŭ: **"Subpremu ĉiujn malamikojn, sed neniam estu subigita de la malamikoj."** Li pensis pri la noblaj figuroj de Huang Giguang kaj Kiu Ŝaŭjun kaj tuj venis al li senlima kuraĝo kaj forto. Li rektigis sin, ĉirkaŭvolvis sin per la litkovrilo, kaj tuj li ekĵetis sin kune kun la kovrilo al vomejo de fajro, kriegante: "Brulu! Vi brulu!" Kaj li refoje svenis.

Tiel li tutkore kaj plenanime imitis la ekzemplon de herooj, iris la vojon de herooj, kaj plenumis la bravaĵon de herooj.

VENKO APARTENIS AL LA HEROOJ DE LA PUTODRILA TRUPO N-RO 32111

Post 30-minuta vivmorta lukto, dank' al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, per sia vivo kaj sango kaj la kolektiva kuraĝo kaj saĝo, la herooj sukcesis estingi la ĉiellekantan fajregon, sekurigis la gravan havaĵon de la ŝtato, kaj plenumis senmortan, meritplenan faron por la Partio kaj popolo.

Post la estingo de la fajro, la victrupestro Peng Giaĝi iris inter la homamasoj tra la putejo, plena de fumo kaj vaporo, laŭte kriante:


"Kolektiĝu kamaradoj de la trupo 32111!"

La bravuloj aliris el post la falinta putturo aŭ apud bruligita pumpilĉambro kaj vicstariĝis en putejo kun levitaj kapoj kvazaŭ neŝanceleblaj rokoj ĉe marbordo. Pensante pri la klasfratoj kiuj aŭ oferis sian vivon aŭ grave vundiĝis, ili ne povis reteni siajn larmojn. Sed la malĝojo tuj transformiĝis en batalan forton.

"Kamaradoj, ni venkis!"

"Ni venkis. . . ."

La heroeco de la bravuloj, per kiu ili protektis la havaĵon de la patrolando, sentigis senliman fieron kaj senliman kuraĝon. La brilo de ilia komunisma penso ruĝe lumigis la altajn montojn ĉirkaŭe kaj heligis la lazuran ĉielon super la kapo.



Alte tenante la ruĝan flagon kaj heredante la nefinitan revolucian taskon de la martiroj, la laboristoj zorge purigas la putkapon kaj decidis atente prizorgi la grandan gasputon savitan kontraŭ sango kaj vivoj de la herooj.

Ĝi estas alia triumfa kanto de la granda penso de Maŭ Zedong, firmamenton sonoriganta.

Per sia propra agado, la petrolaj batalantoj de nia lando ankoraŭfoje pruvis ke la batalantoj nutrataj de la penso de Maŭ Zedong havas plej altan idealon, plej grandan sinoferemon kaj plej grandan batalforton! Ili povas venki ĉian malfacilon, subigi ĉian malamikon kaj krei ĉian homan miraklon!

La ĉieloskua heroaĵo de la putodrila trupo n-ro 32111 rapide disvastiĝis tra la tuta petrola fronto, tra la ĉirkaŭaj urboj kaj vilaĝoj. Ĉiuj laŭdas ilin kiel bonajn batalantojn de Prezidanto Maŭ, bonajn filojn de la patrolando, kolektivajn Huang Giguang, Kiu Ŝaŭjun, Oŭjang Haj, Maj Hiande. . .

En la tago de estingo de la fajro dekoj da kamionoj ŝarĝitaj per personoj, putturo, instrumentoj kaj materialoj kuris al la putejo en longa vico de trans montoj.

La "gastigro" estis subigita. Nova putturo rapide stariĝis sur heroa batalkampo renkonte al brila matena suno kaj al la novaj venkoj!




Laŭtparolilo Uzita sur Fronto

Tiu parolilo estas planita kaj farita de batalantoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo dum la Huajhaj-operacio en la periodo de la Enlanda Liberiga Milito. Ili uzis ĝin kiel armilon por demoralizi malamikojn. Ĝi estis farita el pecoj da foruzita benzinujo. Por favorigi la propagandon el tranĉeo de fronto al la malamiko, la batalantoj faris ĝin en formo tre zigzaga, tiel ke la sono disaŭdiĝu plimalproksimen.

Politiko pri demoralizado de la malamiko signifas propagandi ĉiurimede al reakcia armeo la revolucian veron, por ke vekiĝu trompitaj oficiroj kaj soldatoj de la malamikaj trupoj. Tiu politiko estis ellaborita de kamarado Maŭ Zedong en la unua periodo de fondiĝo de la revolucia armeo de la ĉina popolo surbaze de la karaktero kaj batalsperto en la popola milito. Ĝi jam ricevis evidentajn efikojn en la pasinta revolucia milito.

Dum la Huajhaj-operacio, ĈPLA kondukis grandskalan ofensivon kontraŭ la kuomintangaj trupoj, kaj samtempe disvolvis vastan politikan atakon en multaj formoj de propagando per la parolilo, dissendo de flugfolioj kaj kapitulacigaj leteroj. Kiel rezulto, grandnombro da malamikaj trupoj ribelis kaj aliĝis al nia flanko.



EL Popola ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 7 (109) 1967

Ĉefa Enhavo

Vortoj de Prezidanto Maŭ pri Komunista Partio

Prezidanto Maŭ Celebris la "Majan Feston" Kune kun Trimiliona Amaso

Ni Vidis la Grandan Gvidanton Prezidanto Maŭ

Dahaj Hangŝing Kaŭ Dŭošoŭ (*kanto*)

Salutletero al Prezidanto Maŭ

Pekino, Urbo Ĉiam Brilanta per la Penso de Maŭ Zedong

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Kamaradino Giang King k. a. Akceptis Japanajn Gastojn

Sturmanto en Revolucio kaj Modelo en Laboro

La Eminenta Komunisto — Liu Hulan

La Historia Fono de la Tri Eldonoj de la Nigra Libro *Memkulturo*

Ĝisfunde Kritiku la Nigran Libron *Memkulturo*

Nepre Irota Vojo al Komunismo

Trafe Pafis la Herooj de la Aeraj Fortoj

Novaj Produktaĵoj de Pekina Speciala Metiarto

Brilaj Ekstermaj Bataloj


Sangodora Negoco

La Sanga Lukto de Heroa Putodrila Trupo N-ro 32111 kontraŭ Fajra Maro

Sur la kovrilo — Nia Granda Gvidanto Prezidanto Maŭ

Sur la dorskovrilo — Kantona Lernejo de Kamparana Movado

Prikanto al la Herooj en la Fajra Maro




1) Dum la granda proleta kultura revolucio aperis sur la petrola batalfronto de Ĉinio heroa kolektivo, disradianta brilan lumon de la penso de Maŭ Zedong — Putodrila Trupo n-ro 32111.




2) Subite kreviĝis senjunta ŝtaltubo sur iu nove drilita gasputo kaj furioza gasfluo tuj kaŭzis ĉiellekan brulegon.



3) La tuta granda gaskampo alfrontis la danĝeron de ruiniĝo. La laboristoj de la tuta trupo senprokraste sin ĵetis al la putejo. La granda penso de Maŭ Zedong komandis ilin batali.




4) Ĝang Ĝongmin, membro de la partia komitato de la mineja distrikto, vickomandanto kaj ĉefinĝeniero, estis brulvundita je la tuta korpo.




5) Por ĉesigi la elfluon de la gaso oni devis fermi valvon n-ron 3. Sed la valvo jam aliformiĝis pro la brulego. La kamaradoj tutforte luktadis por ĝin fermi.




6) Rekonsciiĝinte post sveno pro la venengaso, laborist-lernantoj Hju Guangji kaj Hu Debing persiste sturmis al valvo n-ro 3.




7) La flamo reduktiĝis post la fermo de la valvo, sed la gaspremo ĉe la puto leviĝis. Ĉe ĉiu ajn momento la puton trafis danĝero de eksplodo. KJL-ano Vang Joŭfa plurfoje provis sed malsukcesis kovri la flamantan puton per malsekigitaj litkovriloj.




8) Kriante: "Fajru! Vi fajru!" Vang Joŭfa eksaltis kaj **ĵetis** sin kun litkovriloj sur la fajron ĉe la puto.



9) Moŭ Maŭhiu, edzino de iu laboristo, estis transportanta barit-pulvoron. Subite ŝi aŭdis: "Via edzo estas vundita!" Ŝia koro ektremis. Sed ekmemorante, ke **"Volante lukti, oni ne povas eviti vivoferojn..."** ŝi persistis ĉe sia batalposteno per pli rapidaj paŝoj.



10) Dank' al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la herooj estingis la ĉiellekan brulegon kaj sekurigis la havaĵojn de la ŝtato. La partia komitato atribuis al trupo n-ro 32111 la gloran titolon "PROLETA REVOLUCIA HEROISMA PUTODRILA TRUPO".



Ruĝaj ribeluloj de la Harbina Fervoja Administrejo surtrajnigas la materialojn destinitajn por subteni la agrikulturan plejfronton.

